X-18679/6

Esperanto

6a JARO



6a JARO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA

JARLIBRO

1914

LEONARD ROMASZEWSKI

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

10, Rue de la Bourse, GENÈVE

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

Oficiala Jarlibro, dum januaro. Senpaga por Esperantianoj. Prezo (afranke) : 2 fr. 50 p nemembroj.

Aldono al Oficiala Jarlibro, aperas dum junio-julio, kun ĉiuj korektoj en la Adresaro de la Delegitoj. Prezo (afranke) : 0 fr. 25.

Esperanto, 16-paĝa, duonmonata gazeto, oficiala organo de U. E. A. Senpaga por garantiantoj kaj esperantiaj entreprenoj (esperantistoj, organizajoj). Abono : 5 frankoj. Luksa eldono : 6 fr. 25.

Kongresa Dokumentaro, aperas ĉiujare dum oktobro aŭ novembro, kun ĉiuj raportoj, decidoj kaj protokoloj de la kongreso de U. E. A. Senpaga por kongresanoj kaj helpkongresanoj. Prezo (afranke) : 1 fr. 25.

Oficiala Bulteno, aperas laŭ la bezonoj, por administraj informoj. Senpaga por Delegitoj, Subdelegitoj kaj Konsuloj.

Financa kaj statistika Informilo, aperas kvaronjare, entenas la kvaronjarajn bilancojn, statistikojn, k. t. p. Senpaga por komitatanoj kaj fakestroj.

Interŝanĝa Bulteno, aperas dumonate. Oficiala organo de la Universala Interŝanĝa Asocio. Senpaga por ĝiaj membroj.

Propagandaj broŝuroj kaj folioj.
Oficiala skribmaterialo.
Oficialaj insignoj.

Vidu en la anoncoj la specialan katalogon de la Universala Esperantia Librejo.

LEONARD DUDKIEWICZ

GRAVA!

E. S.

I. — Dankante vin pro via kotizaĵo, ni havas la honoron sendi al vi vian membrokarton kaj jarlibron por 1914.

II — KOTIZAĴO POR 1915. — Por ke ne okazu interrompoj en viaj membrorajtoj kaj por ebligi regulan financan administradon de nia Asocio, vi bonvolu afable repagi vian kotizaĵon por 1915 antaŭ la 1 marto 1915. Se, je tiu dato, vi ne pagis ĝin, nek sendis vian formalan eksiĝon, ni prezentigos al vi per la poŝto aŭ alimaniere kvitancon da Fr. 2,50 por la kotizaĵo kun la specialaj elspezoj por ĝia enkasigo.

III. — VARBADO. — Por ke nia Asocio fariĝu pli kaj pli grava kaj potenca, estas necese, ke konstante ĝi pligrandigu la nombron de siaj membroj. Ni do insiste petas vin, ke vi konsideru kiel devon, varbi dum la venonta jaro almenaŭ du membrojn, inter la personoj kiuj iel ajn bezonas la servojn de U. E. A. aŭ sin interesas pri Esperantismo. Vi uzu por tio la du aldonitajn varbilojn.

IV. — BONVOLA KUNLABORADO. — Se vi rimarkis eraron en la jarlibro ; se vi konas iun kiu povus fariĝi Del. en loko kie ne estas ; se vi konas firmon, asocion, k. c., kiu povas nin helpi ; se vi deziras fari al ni proponon, k. c., sendu la aldonitan respondilon.

Kun samideana saluto kaj antaŭa danko.

U. E. A.

Varbinto : ..... Esperantiano N° .....

Strato : ..... Loko : .....

VARBILO

Bonvolu enskribi . . . . . { Sinjoron (1). Sinjorinon. Fraŭlinon. | Firmon (1). Societon.

Nomo .....

Antaŭnomo .....

Profesio .....

Adreso { *Strato* ..... *N°* ..... / *Loko* ..... *Lando* .....

Kiel (1) :

1e **Membro** : ordinara (2,50 Fr.), subtenanta (5 Fr.), dumviva (125 Fr.).

2e **Esperantia Entrepreno** : unujara (12,50 Fr.), esperantista organizaĵo (7,50 Fr.).

3e **Membro de fako** : interŝanĝa, studenta, (1,25 Fr. + la membra kotizaĵo).

4e **Abonanto de « Esperanto »** : ordinara eldono (5 Fr.), luksa (6,25 Fr.).

Mi ĉi-kune sendas la monsumon da Fr. ..... por la { kotizaĵo (1). / abono.

La Varbinto,

(1) Trastreku tion, kio ne taŭgas.

N. B. — Vi detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Del. de via loko aŭ al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève.

La Del. zorge konservu tiun ĉi varbilon kaj sendu al la Centra Oficejo de U. E. A. laŭ peto.

Varbinto : ..... Esperantiano N° .....

Strato : ..... Loko : .....

VARBILO

Bonvolu enskribi . . . . . { Sinjoron (1). Sinjorinon. Fraŭlinon. } Firmon (1). Societon.

Nomo .....

Antaŭnomo .....

Profesio .....

Adreso { *Strato* ..... *N°* ..... / *Loko* ..... *Lando* ..... }

Kiel (1) :

1e **Membro** : ordinara (2,50 Fr.), subtenanta (5 Fr.), dumviva (125 Fr.).

2e **Esperantia Entrepreno** : unujara (12,50 Fr.), esperantista organizajo (7,50 Fr.).

3e **Membro de fako** : interŝanĝa, studenta, (1,25 Fr. + la membra kotizaĵo).

4e **Abonanto de « Esperanto »** : ordinara eldono (5 Fr.), luksa (6,25 Fr.).

Mi ĉi-kune sendas la monsumon da Fr. .....

por la { kotizaĵo (1). / abono. }

La Varbinto,

(1) Trastreku tion, kio ne taŭgas.

N. B. — Vi detranĉu tiun ĉi varbilon kaj sendu ĝin kun la mono al la Del. de via loko aŭ al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève.

La Del. zorge konservu tiun ĉi varbilon kaj sendu al la Centra Oficejo de U. E. A. laŭ peto.

RESPONDILO

por niaj bonvolaj kunlaborantoj

Bonvolu afable skribi ĉi tie viajn rimarkojn, korektojn, aldonojn por la jarlibro, adresojn de varbotaj membroj, firmoj, socieloj, delegitoj, k. c., kaj viajn diversajn proponojn pri la jarlibro, pri U. E. A., pri la Esperantisma movado, k. c.

Detranĉu tiun ĉi paperon kaj sendu ĝin al U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève (Svisujo).

LEONARD ROMASZEWSKI

Deka Universala Kongreso de Esperanto

KVINA KONGRESO DE U.E.A.

PARIS — 2-10 Aŭgusto 1914 — PARIS

Por ke la « Deka » bone sukcesu, estas nepre necese, ke la Organiza Komitato sciiĝu, kiel eble plej baldaŭ, pri la nombro de la Kongresanoj.

Pro tio, tuj konigu al la Komitato vian aliĝon laŭ jena adreso :

DEKA KONGRESO DE ESPERANTO
3, place Jussieu, **PARIS (France).**

Kune sendu vian kotizon per poŝtmandato, ĉeko aŭ transpagilo.

ATENTU !

Ĝis la 1ª de Junio 1914, tiu kotizo estas 15 frankoj (10 frankoj por familianoj : edzino kaj infanoj).

Post la 1ª de Junio 1914, tiu kotizo estos 25 frankoj (20 frankoj por familianoj).

Eĉ se vi ne estas certa, ke vi povos veni al la Kongreso, tamen **tuj aliĝu,** ĉar se vi ne ĉeestos, oni repagos al vi vian antaŭpagitan kotizon, deprenante nur unu frankon por oficejaj elspezoj. Sufiĉos, ke vi tion petos, sendante vian provizoran karton, antaŭ la 1ª de aŭgusto 1914.

Sekve, nenion riskante, vi ricevos grandan profiton, se vi aliĝos antaŭ la 1ª de junio 1914. Sed vi ricevos pli grandan profiton, se vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ, ĉar **la ĉiumonatan Kongresan Gazeton, ĉiu kongresano (escepte la familianoj) ricevos senpage nur depost la tago de sia aliĝo.**

La unua numero aperos la 1ªn de januaro 1914, kaj ĝin ricevos nur la Kongresanoj kies aliĝoj estos senditaj **antaŭ la 31 de decembro 1913.**

LEONARD RUDNICZEWSKI

Duliniaj anoncetoj : 2 frankoj.

JARLIBRO DE U. E. A.

TARIFO DE L'ANONCOJ

1 paĝo : 50 frankoj.

1/2 paĝo : 25 frankoj.

1/4 paĝo : 12,50 frankoj.

1/10 paĝo : 6,25 frankoj.

Rabato da 10 % al Esperantiaj Entreprenoj. — La anoncoj por 1915 estas ricevataj ĝis la 15 novembro 1914.

Esperantia Biblioteko

Oficiala Serio Nº 11

UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA
JARLIBRO

6a Jaro. 1914 6a Jaro.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Rue de la Bourse, 10, GENÈVE

EX LIBRIS JOAN. KWOLEK

★

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.



V-18679

LEONARD ROMICZEWSKI

Grava rimarko. — La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti reprezentata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U. E. A.

ENHAVO

Antaŭparolo 7
Kalendaro 1914 9

1ª Parto : **ENCIKLOPEDIETO**

Kronologio 11
Luno 11
Eklipsoj 11
Festoj 12
Kelkaj datoj por 1915 13
Suno, luno, planedoj 13
Horo 13
Tajdo 15
Mezuroj kaj Pezoj 16
Diversaj unuoj 17
Mondformato 18
Mono 18
Kompara tabelo de la ĉefaj monunuoj 20
Internaciaj poŝtaj tarifoj 21
Ĉefaj internaciaj institucioj 22
Internaciaj kongresoj 30
Esperantistaj kongresoj 32
Internaciaj ekspozicioj, foiroj kaj festoj 32
Notindaj datoj el la historio de Esperanto 33
ANONCOJ . . . . . XIII-XX

2ª Parto : **INFORMOJ PRI U. E. A.**

Historio 35
Celo 36
Organizo 37
Statistikaj informoj 38

Servoj de U. E. A. 40
Informpetoj 40
Dum vojaĝo 41
Komerco 42
Gvidfolioj kaj gvidlibroj 43
Studentoj 46
Interŝanĝistoj 47
Esperanto-Oficejoj 47

Statuto kaj regularoj 49
Statuto de U. E. A. 49
Tabelo de la kotizaĵoj 60
Financa regularo 61
Regularo pri la kolektado kaj administrado de la garantia kapitalo 62
Regularo de la Universala Interŝanĝa Asocio 65
Regularo de la Universala Studenta Asocio 66
Interkonsento kun naciaj societoj Esperantistaj 67
ANONCOJ . . . . . XXI-XXVIII

3ª Parto : ADRESARO DE U. E. A.

Centra Organizo 69
Honora membraro 69
Komitato 69
Centra Oficejo de U. E. A. 70
Fakaj asocioj 71
Reprezentantoj de naciaj societoj Esperantistaj 72
Dumvivaj membroj 73
Garantiantoj 73

Distrikta organizo 75
Listo de distriktaj Delegitoj 75

Regiona organizo 79
Listo de la Delegitoj, Vicdelegitoj, Esperanto-Oficejoj, k. t p. 79
Listo de la Esperantiaj regionoj 165

Esperantiaj Entreprenoj 175
Fakaj Societoj 175
Esperantistaj organizaĵoj 177

Gazetoj 203
Neesperantistaj organizaĵoj 203
Komercaj firmoj 207
Indekso de la Entreprenoj laŭ specialeco 221
ANONCOJ . . . . . XXIX-XXXVI

4ª Parto : STATISTIKAJ KAJ TURISMAJ INFORMOJ

Ĝeneralaj rimarkoj 229

Eŭropo 233
Aŭstrio-Hungario 233
Belgujo 237
Britujo 240
Bulgarujo 246
Danujo 247
Finnlando 249
Francujo 252
Germanujo 258
Grekujo 266
Hispanujo 268
Italujo 271
Nederlando 275
Norvegujo 277
Portugalujo 279
Rumanujo 282
Rusujo 283
Serbujo 287
Svedujo 288
Svisujo 291

Nord-Ameriko 295
Kanado 295
Meksikujo 297
Usono 299
Aliaj landoj 303
ANONCOJ . . . . . XXXVII-XLIX

LEONARD ZAMENHOF

ANTAŬPAROLO

La lasta eldono de nia Jarlibro, pliriĉigita je multaj novaj informoj, estis tre favore akceptita de nia membraro. Tiun eldonon ni penis ankoraŭ plibonigi kaj samtempe ne tro pligrandigi, tiel ke la Jarlibro de U. E. A., kiu antaŭ ĉio havas praktikan celon, restu libreto facile kunportebla.

La enciklopedia parto estis kompletigita speciale per koncizaj informoj pri la ĉefaj internaciaj institucioj. La statistikaj kaj turismaj informoj pri la diversaj landoj estis revidataj kaj kontrolataj. Oni trovos novajn artikolojn pri la Balkanaj kaj Nord-Amerikaj landoj. Laŭ peto de diversaj personoj ni presigis indekson de la Esperantiaj Entreprenoj laŭ specialeco. Fine, ni aldonis geografian karton, kiu per si mem estas trafa propaganda dokumento pri la ĝisnuna disvastiĝo de nia Asocio.

Sinceran dankon ni esprimas al ĉiuj personoj, kiuj bonvolis nin helpi por la redaktado kaj korektado de tiu eldono (1). Ni esperas, ke de niaj membroj ĝi estos same akceptata kaj precipe *uzata* kiel la antaŭaj eldonoj. Kiel ni diris en nia raporto ĉe la kvara Kongreso de U. E. A. : « El ĝi ni celas fari verkon esence utilan kaj praktikan, facile kunporteblan kaj tralegeblan. Gi devas havi popularan karakteron. Ne verko enpolvigota en biblioteko ĝi devas esti, sed libreto por la ĉiutaga uzado, libreto malpurigota de la manoj, kiuj ĝin ofte foliumas, ĉar ĝi respondas al praktikaj bezonoj ».

LA DIREKTORO.

---

(1) Specialan dankon meritas S^ro V. Traĉevskij, el Kiew, kiu afable bonvolis desegni la geografian karton. Rilate al ĝi, ni atentigas, ke ĝi estis farita kelkajn semajnojn antaŭ ol estis preparita la listo de la Delegitoj. Tial ĝi iafoje ne tute koincidas kun ĝi. Tio cetere ne estas grava, ĉar la karto celas nur esti ekstera propagandilo.

KALENDARO POR LA JARO 1914

Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Augusto	Septembro	Oktobro	Novembro	Decembro
1 Ĵ.	1 **D.**	1 **D.**	1 Me.	1 V.	1 L	1 Me	1 S.	1 Ma	1 Ĵ.	1 **D.**	1 Ma.
2 V.	2 L.	2 L.	2 J.	2 S.	2 Ma.	2 J.	2 **D.**	2 Me.	2 V.	2 L.	2 Me.
3 S.	3 Ma	3 Ma.	3 V.	**3 D.**	3 Me.	3 V.	3 L.	3 J.	3 S.	3 Ma.	3 J
4 **D.**	4 Me.	4 Me.	4 S.	4 L.	4 Ĵ.	4 S.	4 Ma.	4 V.	4 **D.**	4 Me.	4 V.
5 L.	5 Ĵ.	5 J.	5 **D.**	5 Ma.	5 V.	5 **D.**	5 Me.	5 S.	5 L.	5 Ĵ.	5 S.
6 Ma.	6 V.	6 V.	6 L.	6 Me.	6 S.	6 L.	6 J	6 **D.**	6 Ma.	6 V.	6 **D.**
7 Me.	7 S.	7 S.	7 Ma.	7 Ĵ.	7 **D.**	7 Ma.	7 V.	7 L.	7 Me.	7 S.	7 L.
8 J.	8 **D.**	8 **D.**	8 Me.	8 V.	8 L.	8 Me.	8 S.	8 Ma.	8 J.	8 **D.**	8 Ma.
9 V.	9 L.	9 L.	9 J.	9 S.	9 Ma.	9 J.	9 **D.**	9 Me.	9 V.	9 L.	9 Me.
10 S.	10 Ma.	10 Ma.	10 V.	10 **D.**	10 Me	10 V.	10 L.	10 Ĵ.	10 S.	10 Ma.	10 J.
11 **D.**	11 Me.	11 Me.	11 S.	11 L.	11 Ĵ.	11 S.	11 Ma.	11 V.	11 **D.**	11 Me.	11 V.
12 L.	12 J.	12 J.	12 **D.**	12 Ma.	12 V.	12 **D.**	12 Me	12 S.	12 L	12 J.	12 S.
13 Ma.	13 V.	13 V.	13 L.	13 Me.	13 S.	13 L.	13 Ĵ.	13 **D.**	13 Ma.	13 V.	13 **D.**
14 Me.	14. S.	14 S.	14 Ma.	14 Ĵ.	14 **D.**	14 Ma.	14 V.	14 L.	14 Me.	14 S.	14 L.
15 J.	15 **D.**	15 **D.**	15 Me.	15 V.	15 L.	15 Me.	15 S.	15 Ma.	15 Ĵ.	15 **D.**	15 Ma.
16 V.	16 L.	16 L.	16 Ĵ.	16 S.	16 Ma.	16 Ĵ.	16 **D.**	16 Me.	16 V.	16 L.	16 Me.
17 S.	17 Ma.	17 Ma.	17 V.	17 **D.**	17 Me.	17 V.	17 L.	17 Ĵ.	17 S.	17 Ma.	17 J.
18 **D.**	18 Me.	18 Me.	18 S.	18 L.	18 Ĵ.	18 S.	18 Ma.	18 V.	18 **D.**	18 Me.	18 V.
19 L.	19 J.	19 J.	19 **D.**	19 Ma.	19 V.	19 **D.**	19 Me.	19 S.	19 L	19 J.	19 S.
20 Ma.	20 V.	20 V.	20. L.	20 Me	20 S.	20 L.	20 Ĵ	20 **D.**	20 Ma.	20 V.	20 **D.**
21 Me.	21 S	21 S.	21. Ma.	21 Ĵ.	21 **D.**	21 Ma.	21 V.	21 L	21 Me.	21 S.	21 L.
22 J.	22 **D.**	22 **D.**	22. Me.	22 V.	22 L.	22 Me.	22 S.	22 Ma.	22 J.	22 **D.**	22 Ma.
23 V.	23 L.	23 L.	23. Ĵ.	23 S	23 Ma.	23 J.	23 **D.**	23 Me.	23 V.	23 L	23 Me.
24 S.	24 Ma.	24 Ma.	24 V.	24 **D.**	24 Me.	24 V.	24 L	24 Ĵ.	24 S.	24 Ma.	24 Ĵ.
25 **D.**	25 Me.	25 Me.	25 S.	25 L	25 Ĵ.	25 S.	25 Ma	25 V.	25. **D.**	25 Me.	25 V.
26 L	26 Ĵ.	26 J.	26 **D.**	26 Ma.	26 V.	26 **D.**	26 Me.	26 S.	26 L.	26 J.	26 S
27 Ma.	27 V.	27 V.	27 L.	27 Me.	27 S.	27 L.	27 Ĵ.	27 **D.**	27 Ma.	27 V	27 **D.**
28 Me.	28 S.	28 S.	28 Ma.	28 Ĵ	28 **D.**	28 Ma.	28 V.	28 L	28 Me.	28 S.	28 L.
29 J.		29 **D.**	29 Me.	29 V.	29 L.	29 Me.	29 S.	29 Ma.	29 J.	29 **D.**	29 Ma
30 V		30 L.	30 J.	30 S.	30 Ma.	30 Ĵ.	30 **D.**	30 Me.	30 V.	30 L	30 Me.
31 S.		31 Ma.		31 **D.**		31 V.	31 L.		31 S.		31 J.

LEONARD ROMASZEWSKI

1ª PARTO

ENCIKLOPEDIETO

Kronologio

La jaro **1914** de la Gregoria Kalendaro (enkondukita la 15. okt. 1582) respondas al la jaroj sube montritaj :

5674 de l'moderna hebrea Kalendaro (jaro 5675 komencas la 2. okt. 1914).

1914 de l'rusa Kalendaro (komencas la 14. jan. 1914).

1332 de l'mahometana Kalendaro (jaro 1333 komencas la 19. nov. 1914).

Luno

NL = Nova luno. PL = Plena luno.
UK = Unua kvarono. LK = Lasta kvarono.

Januaro	Februaro	Marto	Aprilo	Majo	Junio	Julio	Aŭgusto	Septemb.	Oktobro	Novembro	Decembro
4 UK	3 UK	5 UK	3 UK	3 UK	1 UK	7 PL	6 PL	4 PL	4 PL	2 PL	2 PL
12 PL	10 PL	12 PL	10 PL	9 PL	8 PL	15 LK	14 LK	12 LK	12 LK	10 LK	10 LK
19 LK	17 LK	18 LK	17 LK	16 LK	15 LK	23 NL	21 NL	19 NL	19 NL	17 NL	17 NL
26 NL	25 NL	26 NL	25 NL	25 NL	23 NL	29 UK	28 UK	26 UK	25 UK	24 UK	24 UK
					30 UK						

Eklipsoj

24 februaro. — Ringoforma suneklipso videbla el Suda Nov-Zelando kaj Sud-Ameriko.

12 marto. — Parta luneklipso, videbla el Okcidenta Eŭropo.

21 aŭgusto. — Plena suneklipso, parte videbla el Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Nordorienta Azio, Okcidenta kaj Norda Afriko.

4 septembro. — Parta luneklipso, videbla el Pacifika Oceano.

Festoj

Ĉefaj religiaj festoj.

Katolikaj kaj protestantaj :
- 12 aprilo : Pasko.
- 21 majo : Ĉieliro.
- 31 majo : Pentekosto.
- 25 decembro : Kristnasko.

Nur Katolikaj :
- 15 aŭgusto : Maria ĉieliro.
- 1 novembro : Ĉiuj Sanktuloj.

Ortodoksaj :
- 6/19 aprilo : Pasko.
- 15/28 majo : Ĉieliro.
- 25/7 majo/junio : Triunuo.
- 25/7 dec./jan. : Kristnasko.

Aliaj ĉefaj naciaj festoj

Aŭstrio : 18 aŭg., Naskiĝo de l'imperiestro. — *Belgujo :* 8 apr. Reĝa festo ; 21 jul., Nacia festo. — *Bulgarujo :* 19 febr., Liberiĝo de Bulgarujo ; 2ª aŭg., Surtroniĝo de Ferdinando Iª. — *Britujo :* 3 jun., Naskiĝo de l'reĝo. — *Danujo :* 3 jun., Reĝa festo ; 5 jun. Festo de la Konstitucio. — *Francujo :* 14 jul., Nacia festo. — *Germanujo :* 27 jan., Naskiĝo de l'imperiestro. — *Grekujo :* 25/7 mart./apr., Sendependeco. — *Hispanujo :* 23 jan., Reĝa festo. — *Hungario :* 20 aŭg., Sta Stefano. — *Italujo :* 1 jun., Festo de la Konstitucio. — *Nederlando :* 31 aŭg., Naskiĝo de l'reĝino. — *Portugalujo :* 31 jan., Suferantoj de la Respubliko ; 5 okt., Proklamo de la Respubliko ; 1 dec., Aŭtonomio de Portugalujo ; 25 dec., Familio. — *Rumanujo :* 24/6 febr., Unuiĝo de Moldavio ; 23/6 apr./maj., Sta Georgo ; 10/23 maj., Nacia festo ; 26/8 okt./nov., Sta Demetrio. — *Rusujo :* 23/6 apr./maj., Festo de la carino ; 6/19 maj., Naskiĝo de l'caro ; 14/27 maj., Kronado de l'caro ; 7 jun., Naskiĝo de la carino ; 30/12 jul./aŭg., Naskiĝo de la carido ; 21/3 okt./nov., Surtroniĝo de l'caro ; 6/19 dec., Festo de l'caro — *Svedujo :* 21 jan., Naskiĝo de l'reĝo ; 6 aŭg., Morto de Gustav-Adolfo. — *Svisujo :* 1 aŭg., Fondo de la Konfederacio. — *Usono :* 22 febr., Naskiĝo de Washington ; 30 maj., Decor. Day ; 4 jul., Sendependeco ; 7 sept , Labor Day.

Kelkaj datoj por 1915

En la Gregoria Kalendaro : Pasko, 4 aprilo ; Ĉieliro, 13 majo ; Pentekosto, 23 majo.

Suno, luno, planedoj

La suno estas 1.253.000 foje pli granda ol la tero. Ĝia meza distanco de la tero estas 150 milionoj de km. La luno estas 49-foje pli malgranda ol la tero. Ĝia distanco estas 386.000 km.

Jen informoj pri la planedoj :

PLANEDO	RONDIRO ĉirkaŭ la suno		Meza distanco de la suno (per milionoj de km.).	GRANDECO kompare kun la tero
	Jaroj	Tagoj		
Merkuro . . .	—	88	58	19 foje pli malgranda
Venuso	—	224	108	1/10 — —
Marso.	1	321	227	7 foje — —
Jupitero . . .	11	314	775	1.289 — — granda
Saturno, . . .	29	166	1.424	654 — — —
Uranio	84	6	2.864	87 — — —
Neptuno . . .	164	286	4.487	105 — — —

La distanco de la plej proksima stelo (*Sirius*) estas de la tero 83 trilionoj de km. (550.000-foje pli ol la distanco de la suno).

La rapideco de la lumo estas 300.000 km. po sekundo.

Horo

La plimulto de la civilizitaj nacioj kalkulas la horon laŭ la Greenwich'a meridiano. Por havi en diversaj landoj aŭ lokoj la

tajdoj estas montrata en la kolono B de la ĉi-suba tabelo, por diversaj havenoj.

HAVENOJ	A	B	HAVENOJ	A	B
Dunkerque	0h	5m40	Hamburg	6h	2m
Harwich	0	3 80	Granville	6	12 50
Cuxhaven	1 20	3 40	Hull	6 30	6 80
Leith	2	5 40	Cherbourg	7 30	5 60
Bremerhaven	2	4	Le Havre	9	6 90
London	2 15	6 80	Dieppe	10 30	8 80
Hœk von Holland	2 30	2	Belfast	10 30	3 10
Ijmuiden	3 15	2	Dover	11	6 20
Saint-Nazaire	3 30	5 30	Liverpool	11	9
Queenstown	4 30	3 80	Boulogne	11	8 30
Plymouth	5 15	5 10	Calais	11 15	6 40
Saint-Malo	6	11 30	Portsmouth	11 15	4 50

EKZEMPLO. — Je kioma horo okazos la alta maro la 18 aŭgusto 1914 en Dover ?


La lasta nova aŭ plena luno antaŭ la 18 aŭgusto estas la 6 (plena luno); ĝis la 28 forpasos 18 — 6 = 12 tagoj. La horo de la plena maro en Cherbourg, Harwich, k. a., estos 12 × 0,8 = 9,6, t. e. 9 h. 30 proksimume. La plena maro okazos en Dover je 9 h. 30 + 11 = 20 h. 30 aŭ 8 h. 30 ĉu matene, ĉu vespere, kaj proksimume; sed, ĉar tiu tago estas la 12ª post la plena luno, la eraro estos verŝajne malgranda.


Mezuroj kaj Pezoj.

METRA SISTEMO

La metra sistemo estis starigita en Francujo per leĝo de 7 apr. 1795; ĝi estas deviga en Francujo de 1837. Ĝi estas poste alprenita de la pli multaj civilizitaj regnoj.

Pezo :	*Longo :*
1 tuno (t.) = 1.000 kilogramoj.	1 miriametro (mm.) = 10.000 metroj.
1 kilogramo (kg.) = 1.000 gramoj.	1 kilometro (km.) = 1.000 metroj.
1 hektogramo (hg.) = 100 gramoj.	1 hektometro (hm.) = 100 metroj.
1 dekagramo (dag.) = 10 gramoj.	1 dekametro (dam.) = 10 metroj.
1 **gramo** (g.) (= pezo de 1 cm³ de distilita akvo je 4°).	1 **metro** (= 1/40.000.000 de l'terglobo meridiano).
1 decigramo (dg.) = 0,1 gramo.	1 decimetro (dm.) = 0,1 metro.
1 centigramo (cg.) = 0,01 gramo.	1 centimetro (cm.) = 0,01 metro.
1 miligramo (mg.) = 0,001 gramo.	1 milimetro (mm.) = 0,001 metro.




UNIVERSALA-ESPERANTO-ASOCIO
Centra Eŭropo
Longitudo de Greenwich Ekvatora projekcio
698 lokoj
1:6.000.000
15.XI.1913j

Enhavo :	*Surfaco :*
1 kilolitro (kl.) = 1 000 litroj.	1 hektaro (ha.) = 10.000 metroj².
1 hektolitro (hl) = 100 litroj	1 kvadratkilometro (km²) = 1.000 m².
1 dekalitro (dal.) = 10 litroj.	1 areo (a,) = 100 m².
1 litro (l.)(= enhavo de 1 dm³)	1 centiaro (ca.) = 1 m².
1 decilitro (dl.) = 0,1 litro.	1 kvadratmetro = 1 m².
1 centilitro (cl.) = 0,01 litro.	
1 mililitro (ml.) = 0,001 litro.	

ALIAJ MEZUROJ KAJ PEZOJ

Britaj :			*Rusaj :*		
1 inĉo.	= 2,5	cm.	1 verŝoko	= 4,435	cm.
1 futo.	= 30,5	cm.	1 saleno.	= 2,134	m.
1 jardo	= 91,4	cm.	1 arŝino.	= 0,711	m.
1 mejlo	= 1.852	m.	1 deciatino . . .	= 109,25	a.
1 akro	= 40,468	a.	1 vedro	= 12,30	l.
1 galono	= 4,54	l.	1 funto	= 410	g.
1 funto	= 454	g.			

Diversaj unuoj

1 mejlo mara (1/60 de grado) = 1.852 m. — 1 nodo mara (1/120 de mejlo) = 15,435 m. — 1 klafto = 1,624 m.

La nombro de la nodoj mezurataj en 30 sekundoj respondas al la pohora rapideco de la ŝipo esprimata per mejloj. Ekz. : 25 nodoj en 30 sekundoj montras rapidecon de 25 mejloj hore (t e. 46,300 km).

La interna volumo de ŝipo, utila por transportado de komercaĵoj estas mezurata per la *internacia komerca tuno* kiu valoras 2,830^{m3}.

Por militŝipoj oni kalkulas la pezon per *metraj tunoj* da 1 000 kg. en Francujo, aŭ per tunoj da 1 016 kg. en Anglujo kaj multaj aliaj landoj.

La potenco de maŝino estas kalkulata per *ĉevalforto* montrata per la literoj H. P. (*horse power* en angla lingvo). Ĝi estas la potenco de maŝino kiu levas 75 kgr. je alteco da 1 m. dum 1 sekundo.

Mondformato

Elpensita de S^ro K. Bührer. — *Matematike adaptita de* P^ro W. Ostwald.
Oficiale alprenita de U. E. A. *por ĝiaj presajoj.*

Unueco de formatoj estas utila al la presistoj pro la simpligo de la aranĝoj por kompostado kaj presado ; ĝi ŝparas multan lokon al la librovendistoj kaj privatuloj, ebligante la enmeton de presaĵoj en bretarojn kaj skatolojn de nešanĝebla grandeco ; la komercisto profitas tiel ke laŭbezone li povas senpene kunigi en koverto aŭ bindaĵo parton de siaj diversaj presaĵoj ; la mondformataj presaĵoj estos ankaŭ pli volonte konservataj de l'ricevinto.

Tabelo de la dimensioj [1].

Rilato : $1 : \sqrt{2} = 1 : 1{,}414$.

N^o	Centimetroj.		N^o	Centimetroj	
I.	1 : 1,41	Por surskribetoj, markoj, numeroj, k. t. p.	VIII.	11,3 : 16	Pošformato.
II.	1,41 : 2		IX.	16 : 22,6	Por verkoj.
III.	2 : 2,83		X.	22,6 : 32	Por kartaroj, artfolioj, k. t. p.
IV.	2,83 : 4		XI.	32 : 45,3	
V.	4 : 5,66		XII.	45,3 : 64	
VI.	5,66 : 8	Por enirbiletoj.	XIII.	64 : 90,5	Por afiŝoj.
VII.	8 : 11,3	Por membrokartoj.	XIV.	90,5 : 128	

Se specialaj formatoj estas nepre bezonataj, oni kreu ilin duobligante unu ciferon de la proporcio. Ekz. : 11,3 : 16. 11,3 : 32. 11,3 : 64, k. t. p.

La ciferoj ĉi tie donitaj rilatas al broŝuritaj libroj, jam triflanke plene tranĉitaj. La eldonado de ne tranĉitaj kaj tial ne tuj legeblaj broŝuroj estas kontraŭ la ideoj de la mondformatanoj.

Mono.

En la aldonita kompara tabelo oni trovas la proksimuman valoron de la diversaj monunuoj uzataj en la ĉefaj landoj

Por siaj internaj monaj interrilatoj, la Esperantista publiko kutime uzas la spesmilan sistemon, elpensitan de D^ro de Saussure. La bazo de tiu sistemo estas difinita pezo da oro esprimita per integra nombro de gramoj : 10 Sm. egalvaloras ormoneron da 8 gramoj laŭ proporcio 11/12. 1 Spesmilo (Sm.) = 100 Spescentoj (Sc.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 1000 Spesoj (S.).

Ĉar la sistemo estas en sia nomigado tute simila al la vico : kilometro, hektometro, dekametro, metro, estas konsilinde montri la dek- kaj centonojn de Sm. per ciferoj dekstre de la Sm., kaj apartigitaj per komo. Ekz. : 3,45 Sm. (3 Sm. kaj 45 Sd.). La maniero ĉiam uzi tri ciferojn, ekz. 3,450 Sm. estas komplika kaj erariga.

Malgraŭ la ora bazo, la sole ebla science, la Sm. nek forigas la kurzdiferencojn inter la diversaj landoj nek havas konstantan valoron kompare kun iu nacia monero. Tamen ĝi utilas por sufiĉe precize esprimi malaltajn sumojn kaj ĝenerale kiel proksimuma komparilo de valoroj, laŭ la rilato : 1 Sm. = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = 1 rublo = 2,40 aŭstriaj kronoj = 1,80 skandinavaj kronoj = 1,20 nederlanda guldeno = 1/2 dolaro, k. t. p.- U. E. A. kalkulas oficiale la Sm. laŭ la firma proporcio : 1 Sm. = 2,50 svisaj frankoj.

En internaciaj prezaroj, k. t. p., oni notu la prezojn en naciaj moneroj kaj aldonu la Sm. kiel helpilon por rapida *proksimuma* taksado. (Pro la deviga neprecizeco de la Sm., komplikaj ciferoj kiel ekz. 0,256 Sm. ne utilas). Por ke la ricevonto nek ricevu tro malmulte, nek la sendanto elspezu tro multe, oni ĉiam skribu sur la poŝtmandatoj kaj ĉekoj la sumojn en la nacia valoro de la ricevonto, ekz. por Germanujo en Mark. La kurzon inter la eksterlanda kaj enlanda mono kalkulas la poŝto aŭ banko.

---

(1) Por pliaj teoriaj klarigoj, vidu en *Jarlibro 1913* (paĝ. 16-17).

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

KOMPARA TABELO DE LA CÊFAJ MONUNUOJ

Nomo de la lando	Valoro en	Aŭstria krono =	Brita Funto =	Franca Franko =	Germana Marko =	Nederlanda Guldeno =	Portugala Milerjso =	Rusa Rublo =	Sveda Krono =	Usona Dolaro =
Aŭstrio-Hungario	Krono = 100 heleroj	—	£ 24	Kr 0,95	Kr. 1,17	Kr. 2	Kr. 5,33	Kr. 2,53	Kr. 1,33	Kr. 4,93
Britujo . . .	1 Funto = 20 ŝilingoj = 12 pencoj	10 1/2 p.	—	ŝ. 9 1/2	ŝ. 1	1 ŝ. 8 p	4 ŝ. 5 p 1/2	2 ŝ. 1 p.	1 ŝ. 1 p. 1/4	4 ŝ. 2 p.
Francujo . .	1 Franko = 100 centimoj	Fr 1,05	Fr. 25, 22	—	Fr. 1,23	Fr. 2,08	Fr. 5,60	Fr. 2,66	Fr. 1,39	Fr. 5,18
Germanujo .	1 Marko = 100 pfenigoj	M. 0,85	M. 20, 50	M. 0,81	—	M. 1,69	M 4,55	M. 2,14	M. 1,13	M. 4,21
Nederlando .	1 Guldeno = 100 cents	G. 0,50	G 12, 12	G 0,48	G. 0,59	—	G. 2,68	G. 1,28	G 0,66	G. 2,50
Portugalujo.	1 Milrejso = 1.000 rejsoj	M 0,187	M. 4,500	M. 0,178	M. 0,220	M. 0,371	—	M. 0,47	M. 0,247	M. 0,925
Rusujo. . .	1 Rublo = 100 kopekoj	R. 0,394	R. 9,48	R. 0,37	R. 0,46	R. 0,78	R. 2,10	—	R. 0,52	R. 1,94
Svedujo . . .	1 Krono = 100 oere	Kr. 0.75	Kr. 18, 14	Kr. 0,72	Kr. 0,88	Kr. 1,50	Kr 4,03	Kr. 1,91	—	Kr. 3,72
Usono	1 Dolaro = 100 cendoj	D 0,20	D. 4,86	D 0,19	D. 0,23	D. 0,40	D. 1,08	D. 0,51	D. 0,26	—

RIMARKO. — Kiam oni volas kompari la valoron de monero de unu lando kun tiu de alia, oni serĉu la lokon, kie la vertikala linio krucigas la horizontalan Ekz : Se oni deziras scii la valoron de germana « marko » laŭ angla monsistemo, oni serĉu la lokon, kie la germana marko de la vertikala linio IV renkontas la horizontalan linion Britujo (2). La moneroj estas submetataj al kurzdiferencoj.

Belgujo, Bulgarujo (100 stotinki), Grekujo (100 lepka), Italujo, Rumanujo (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francujo ; Danujo, Norvegujo same kiel Svedujo ; Aŭstralio same kiel Granda Britujo ; Kanado same kiel Usono.

Internaciaj poŝtaj tarifoj

La monunuo de la Universala Poŝta Unio estas la franca franko, po 100 centimoj. Al valoro de 5 centimoj (verda poŝtmarko) la poŝto egaligas 5 pfennig, 5 heller, 1/2 penny, 1 cendo, 2 kopekoj, 5 œre. Al valoro de 10 centimoj (ruĝa poŝtmarko) ĝi egaligas 10 pfennig, 10 heller, 1 penny, 2 cendoj, 4 kopekoj, 10 œre. Al valoro de 25 centimoj (blua poŝtmarko) ĝi egaligas 20 pfennig, 25 heller, 2 1/2 pence, 5 cendoj, 10 kopekoj, 20 œre.

Tarifo por leteraĵoj.

Leteroj. — 25 centimoj por la unua dudeko da gramoj ; ĉiu plia dudeko aŭ parto de ĝi 15 centimoj.

Poŝtkartoj. — 10 centimoj por ĉiu karto ; sekve karto kun respondkarto kostas 20 centimojn. Ne-afrankitaj leteroj kaj kartoj kostas la duoblon.

Presaĵoj. — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; maksimuma pezo : 2 kg. La dimensio ne superu 45 centimetrojn laŭ iu direkto. Rulaĵforma presaĵo ne superu diametre 10, longe 75 centimetrojn.

Aferpaperoj (dokumentoj ne havantaj la karakteron de nuna kaj persona korespondo, ekz. : aktoj, manuskriptoj, malnovaj leteroj).— 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; minimuma afranko : 25 centimoj ; maksimuma pezo : 4 kg. Pri dimensioj vidu sub *Presaĵoj.*

Specimenoj. — 5 centimoj por ĉiu kvindeko da gramoj aŭ parto de ĝi ; minimuma afranko : 10 centimoj ; maksimuma pezo : 350 gramoj. La dimensio ne superu longe 30, larĝe 20, dike 10 centimetrojn.

La Centra Oficejo de U. E. A. ne akceptas la ne- aŭ nesufiĉe afrankitajn leterojn, por kiuj ĝi devus pagi monpunon.

Presaĵoj, aferpaperoj kaj specimenoj devas esti afrankitaj almenaŭ parte ; por nesufiĉe afrankitaj tiaspecaj sendaĵoj la ricevanto pagas la duoblan sumon de l'manko.

Presaĵoj, aferpaperoj kaj specimenoj enhavu nek leteron nek skribitan noton, kiu posedas la karakteron de vera kaj persona korespondo ; ili estu facile kontroleblaj rilate la enhavon.

Respondkuponoj. — Minimuma vendprezo : 28 centimoj ; ŝanĝvaloro : 25 centimoj (afranko de internacia letero). Nuntempe ili estas aĉeteblaj kaj ŝanĝeblaj en ĉiuj Eŭropaj landoj, (escepte Montenegro, Rusujo kaj Serbujo), en britaj, danaj, francaj, germanaj, italaj kaj nederlandaj kolonioj, en Brazilujo, Ĉilio, Costa Rica, Egiptujo, Haiti, Honduras, Japanujo, Liberia, Meksikujo, Siamo, Tunizio, Usono. —

Tamen ni konsilas al niaj ĉiulandaj membroj ilin ĉiam akcepti, ĉar ili povos ilin uzi por pagi ŝuldetojn al alilandaj membroj aŭ al la Centra Kaso de U. E. A.

Poŝtmandatoj. — Tarifoj kaj specialaj reguloj varias laŭ la landoj kiuj partoprenas en ĉi tiu servo. Oni ĉiuokaze petu informojn de poŝtoficejo.

Sur la kuponon de la mandato oni ne forgesu skribi la nomon de l'sendanto kaj la celon de l'pago Por kelkaj landoj (Britujo kaj kolonioj, Rusujo, Usono) tio ne estas ebla; tiuokaze estas nepre necese akompanigi ĉiun mandaton per klariga poŝtkarto. Hispanujo ne havas poŝtmandatojn

Poŝtpakoj, rembursoj, rekuvroj. — La tarifoj kaj reguloj varias laŭ la landoj. Oni petu informojn de poŝtoficejo.

Telegramoj. — La tarifoj por telegramoj varias laŭ landoj kaj vojo, trairota de telegramo. Oni petu informon de poŝtoficejo.

Oni atentu, ke Esperanto estas por telegrafado nur interkonsentita lingvo. Unu vorto enhavu maksimume 10 literojn. Vorto kun pli ol 10 literoj estas pagota laŭ la tarifo por cifera lingvo, t. e. ĉiu kvino da literoj aŭ parto de ĝi estas konsiderata kiel unu vorto.

Radiotelegramoj. — Pri tarifoj oni petu informon de poŝtoficejo. Radiotelegramoj estas sendeblaj el lando al lando, el surmara ŝipo al lando, el lando al surmara ŝipo, el surmara ŝipo al surmara ŝipo.

Ĉefaj Internaciaj Institucioj

Dum la dua parto de la XIX[a] kaj la komenco de la XX[a] jarcento kreiĝis multnombraj internaciaj institucioj (ekzistas nun ĉ. 500). Rilate al ilia organizo oni povas ilin apartigi je : A. *Oficialaj institucioj*, kreitaj laŭ interkonsento inter regnoj kaj pagataj de ili (Ekz. U Poŝta Unio), B. *Neoficialaj institucioj*, kreitaj laŭ privata iniciato ; la monrimedojn liveras kotizoj de membroj (individuoj aŭ societoj) kaj, iafoje, monhelpoj de registaroj (Ekz. I. Labor-Oficejo). Kelkaj institucioj konsistas nur el individuoj, aliaj nur el societoj, la pli granda parto el ambaŭ. La plej gravaj internacie havas konstantan oficejon kun pagata oficistaro. Multaj estas federacioj de naciaj societoj, kun nura sekretario, kies kompetenteco kaj laboro estas tre limigata ; tial, ilia internacia buĝeto estas ofte malgrava, ĉar la ĉefan laboron plenumas la naciaj societoj. Fine, aliaj institucioj konsistas nur el konstantaj komitatoj, kies tasko estas la preparado de la kongresoj kaj publikigo de la kongresaj aktoj.

Oni trovos ĉi-sube la liston de la ĉefaj institucioj ; pri la plej gravaj ni publikigis mallongan noton. Por pluaj informoj, vidu la *Annuaire de la Vie internationale* (Jarlibro de la I. vivo), eldonita de la Unio de la I. Asocioj, el kiu estas ĉerpita la pli granda parto de la subaj notoj.

MALLONGIGOJ

Adr. = Adreso. — *I.* = Internacia. — *U.* = Universala.

Oficialaj I. institucioj

Konstanta arbitracia kortumo. — Sidejo en Hago (Pacpalaco). Kreita de la unua Packonferenco, celas arbitracii la internaciajn malkonsentojn ne solvitajn per diplomata vojo, de 1902 ĝis 1912, 12 aferoj juĝitaj.

U. Poŝta Unio (U. P. U.). — Kreita en 1874, 103 landoj kun 1 300.000.000 loĝantoj. 300.000 oficejoj. 1.500.000 agentoj. 28.000.000.000 korespondaĵoj (en 1910), 700.000.000 pakaĵoj, 78.000.000.000 fr. de valoroj interŝanĝitaj. Buĝeto : 125.000 frankoj. Oficejo de U. P. U. en *Bern*.

U. Telegrafa Unio (U. F. U.). — Kreita en 1865, 50 administracioj kun 1.000.000 000 loĝantoj. Oficejo de U. F. U. en *Bern*. Ekzistas. 2.600 submaraj kabloj, longeco 500.000 km.

Industria Propreco. — Kreita en 1883. De 1893 ĝis 1912, 12.000 markoj enregistritaj. Oficejo por la protektado de la industria Propreco en *Bern* (Helvetiastr., 7).

Arta kaj Literatura Propeco. — Kreita en 1886. Oficejo en *Bern*, kunigita kun la Oficejo de la Industria Propreco sub la nomo Oficejo de la Intelekta Propreco.

Unio por la publikigo de la dogantarifoj. — Kreita en 1888, celas publikigi ĉiujn. dogantarifojn kaj iliajn ĉiutempajn modifojn, aperigas bultenon en kvin lingvoj, jam eldonis 500 tarifojn (100 volumoj). Buĝeto : 130.000 fr. Adr. : *Bruxelles* (rue de l'Association, 38).

I. Agrikultura Instituto. — Kreita en 1905 laŭ la iniciato de la Reĝo de Italujo, celas kunigi kaj publikigi ĉiujn informojn, statistikojn, k. t. p., pri produktaĵoj, malsanoj de vegetaĵoj, ekspluatkondiĉoj, salajroj, agrikultura kredito kaj kooperado, eldonas 5 diversajn bultenojn kaj monografiojn. Buĝeto : 1.500.000 fr. Adr. : *Roma*.

I. Oficejo de la Pezoj kaj Mezuroj. — Kreita en 1875, celas konservi la I. pez- kaj mezurnormojn, periode kompari ilin kun la naciaj, k. t. p. Buĝeto : 100.000 fr. Adr. : *Paris* (Parc Saint-Cloud).

U. Sanitara Unio. — Kreita en 1907, publikigas ĉiujn informojn pri la sanitaraj leĝaroj, statistikojn kaj bibliografiojn pri epidemioj, eldonas monatan bultenon. Buĝeto : 200.000 frankoj. I. Oficejo de publika higieno en *Paris* (boulevard Saint-Germain, 195).

Panamerika Unio. — Kreita en 1889, celas liveri informojn pri la Amerikaj Respublikoj kaj plimultigi iliajn interrilatojn, eldonas monografiojn kaj monatan bultenon en kvar lingvoj. Buĝeto : 125.000 dolaroj. Adr. : *Washington* (70th and B. Streets N. W.).

Centramerika Oficejo. — Adr : *Guatemala* (8ª Calle Poniente, 1).

I. Asocio geodezia. — Adr. : Instituto Geodezia, *Berlin*.

I. Asocio sismologia. — Adr. : *Strassburg*.

I. Komitato por maresplorado. — Adr. : *Kopenhag* (Jens Kœfœdg., 2).

I. Komitato por la mondkarto. — Adr. : *London* (Geographical Section, War Office).

Neoficialaj I. institucioj

INTERNACIA VIVO, PACO :

Unio de la I. Asocioj. — Kreita en 1910, celas studi la faktojn de la I. vivo, prepari la efektivigon de I. tutmonda organizaĵo, faciligi la rilatojn inter I. asocioj kaj institucioj, kunordigi kaj harmoniigi iliajn penadojn, unuigi la metodojn kaj teknikajn lingvojn, krei I. centron. Eldonas revuon (*La Vie internationale*), jarlibron (*Annuaire de la Vie internationale*, 2.650 paĝoj), kongresajn aktarojn, monografiojn kaj verkojn pri I. vivo. Oficejo de la I. Asocioj kun I. Muzeo en *Bruselo* (rue de la Régence, 3 *bis*).

I. Instituto de Bibliografio. — Kreita en 1895, celas studi la demandojn pri dokumentado kaj sisteme organizi ĝin, starigis universalan bibliografian repertorion, dokumentadan kaj ikonografian repertoriojn, eldonis multajn bibliografiojn (pli ol dek milionoj da slipoj) Adr. : *Bruxelles* (rue du Musée, 1).

Fondaĵo Carnegie por la I. paco. — Kreita en 1910 per donaco de Sro Carnegie (10.000.000 dolaroj) por favori la internacian pacon. Tri sekcioj : rilatoj kaj edukado (helpado al pacsocietoj, porpaca agado), ekonomio kaj historio (studoj pri la militoj kaj militkaŭzoj), juro internacia. Buĝeto : 450.000 dolaroj. Adr. : *Washington* kaj *Paris* (rue Pierre-Curie, 25).

Fondaĵo Nobel. — Kreita en 1900 laŭ testamento de Dro Nobel. Ĉiujare estas donata unu premio por fiziko, ĥemio, medicino kaj

paco. La kapitalo de la fondaĵo estas 43 1/2 milionoj da fr. ; la premioj valoras ĉ. 190.000 fr. Adr. : *Stockholm* (Norrlandsgatan, 6).

Interparlamenta Unio. — Fondita en 1888, kunigas la diverslandajn parlamentanojn kaj celas favori la ideon pri internacia arbitracio. 3.000 membroj. Buĝeto : 80.000 fr. Adr. : *Bruxelles* (avenue de Longchamps, 251).

Konstanta Pac-Oficejo. — I. sekretariejo de la diversaj pacifistaj societoj, preparas la packongresojn, eldonas monatan gazeton en tri lingvoj. Buĝeto : 14.000 fr. Adr. : *Bern* (Kanonenweg).

I. Oficejo de la naciecoj — Adr. : *Paris* (rue Taitbout, 3).

I. Ligo de la popolrajtoj. — Adr. : *Paris* (place Saint François-Xavier, 1).

Franco-Germana Instituto — Adr. : *Paris* (rue des Entrepreneurs).

I. Arbitracia Ligo. — Adr. : *London* (St. Stephen's House, Embankment W.).

I. Arbitracia kaj Paca Asocio — Adr. : *London* (225-5 Strand. W. C.).

Europa Federacia Ligo — Adr. : *London* (39, St. Jame's Street, Piccadilly. W).

SOCIALAJ MOVADOJ :

I. Instituto por la disvastigo de la sociaj spertoj. — Celas konigi la sociajn, moralajn, intelektajn progresojn de la diversaj landoj kaj instigi al metodaj reformoj. Eldonas en kvin lingvoj monatan revuon (Dokumentoj de la Progreso), aranĝas paroladojn. Buĝeto : 20.000 fr. Adr. : *Paris* (rue Claude-Bernard, 59)

I. Sekretariejo de la naciaj sindikataj federacioj. — En 1910, la sindikata movado reprezentis 9 808.000 organizitajn laboristojn, el kiuj 6.212.000 aliĝis al la I. centro. La sekretariejo kunigas la dokumentojn pri la sindikata movado en la diversaj landoj kaj preparas la konferencojn. Adr. : *Berlin* (Engel Ufer, 15). — Krom tio ekzistas multnombraj internaciaj federacioj, kiuj kunigas metiajn naciajn unuiĝojn. Multaj el tiuj internaciaj federacioj organizas kongresojn. Plej gravaj laŭ membronombro estas la metallaboristoj (940.000), la ministoj (726 000), la transportlaboristoj (468 000), la masonoj (450.000), la lignolaboristoj (287.000), la fabriklaboristoj (192.000), la tipografoj (130.000).

I. Asocio por la leĝa protektado de la laboristoj. — Kreita en 1900, celas kunligi ĉiujn interesulojn pri leĝa laborista protektado, starigis *I. Oficejon de la Laboro*, eldonas monatan bultenon kun

informoj pri la laboristaj diverslandaj leĝaroj, publikigas verkojn pri laboristaj demandoj. 5.400 membroj. Buĝeto : 80.000 frankoj. Kelkaj registaroj monhelpas. Adr. : *Basel* (Clarahof, Rebgasse, 1).

I. Instituto de la mezaj klasoj. — Kreita en 1903, studas la problemon de la mezaj klasoj el la ekonomia vidpunkto, eldonis diversajn verkojn. Kelkaj registaroj monhelpas. Adr. : *Bruxelles* (rue du Commerce, 101).

I. Kooperativa Ligo — Federacio de kooperativaj grupiĝoj (950), organizas kongresojn. Buĝeto : 180.000 fr. Adr. : *London S. W.* (St-Stephen's House, 146, Cannon Row, Embankment. W.

I. Socialista Oficejo — Adr. : *Bruxelles* (rue J.-Stevens, 17).

I. Asocio kontraŭ senlaboreco. — Adr. : *Gand* (Coupure, 54).

I. Oficejo de la hejma laborado. — Adr. : *Bruxelles* (Urbodomo).

I. Asocio por la dimanĉa ripozo. — Adr. : *Genève* (rue de Candolle, 19).

I. Konsilantaro de la virinoj. — Adr. : *Berlin W.* (Neue Ansbacherstr., 7).

I. Ligo por la virina voĉdonrajto. — Adr. : *Rotterdam* (Kruisgade, 92).

I. Asocio kontraŭ la negoco de la blankulinoj. — Adr. : *London W. C.* (St-Mary's Chambers, 161 a Strand).

I. Ligo kontraŭ la trouzo de alkoholaĵoj. — Adr. : *Berlin W.* (Uhlandstr , 146).

I. Oficejo kontraŭ alkoholismo. — Adr. : *Lausanne* (Av. Dapples, 24).

I. Federacio de la Blua Kruco. — Adr. : *Genève* (Taconnerie, 3).

Religiaj kaj filozofiaj movadoj :

Ordeno de la Bontemplanoj. — Celas kunigi ĉiujn batalantojn kontraŭ alkoholo. 9.500 loĝioj, 600.000 membroj. Buĝeto : 250.000 fr. Adr. : *Glasgow* (160, Hill Str.). De 1905-1907 ekzistas *Sendependa Ordeno de la Bontemplanoj*, apartigita de la unua. 14.000 membroj. Adr. : *Roggwill-Bern* (Svis.).

Kristana Unio de junaj viroj. — Celas kunigi ĉiujn junulojn konfesantajn Kristanajn principojn. 8.522 unioj, 940.000 membroj, precipe en anglolingvaj landoj. 4.000 oficistoj salajritaj, 1.300 domoj. Adr. : *Genève* (rue Général-Dufour, 3),

Christian Endeavor (Kristana Celado). — 4.000.000 membroj, precipe en anglolingvaj landoj. Adr. : *Boston* (Tremont-Temple).

Kristana Unio de junulinoj. — Adr. : *London* (George Str., 26).

Savarmeo. — Kreita en 1876, celas savi la homojn per Jesuo Kristo kaj bonfari. 9.000 postenoj, 16.000 oficiroj, 53.000 regionaj oficiroj, 5.000 oficistoj, 25.000 muzikistoj, 9.000 kantistoj, 1.000 bonfaraj institucioj, 78 gazetoj. Adr. : *London* (Queen Victoria Str., 101).

Teozofia Societo. — Fondita en 1875, kunigas naciajn grupiĝojn. Ĉirkaŭ 30.000 membroj kaj 800 loĝioj. Adr. : *Adyar* (Hindujo).

U. Izraelida Ligo. — Kreita en 1860, celas helpi al la emancipo de la Izraelidoj, fondis multajn lernejojn precipe en Oriento. Buĝeto : 1.600.000 fr. Adr. *Paris* (rue de la Bruyère, 45).

I. Sionista organizo. — Celas restarigi en Palestino patrujon por Izraelidoj, entreprenis diversajn koloniigajn laborojn. Buĝeto : 11 000.000 markoj. 60 diverslingvaj organoj, semajna revuo. Adr. : *Berlin, W. 15* (Sächsische Str., 8).

I. Ordeno por etiko kaj kulturo. — Adr. : *Zürich* (Bolleystr., 56).

I. Unio de la etikaj societoj. — Adr. : *London* (Sout Bill Park, 63).

I. Unio kontraŭ la duelo. — Adr. : *Budapest* (Dorottya ut., 6).

I. Federacio de liberpensuloj. — Adr. : *Bruxelles* (Ch. de Bœndal, 350).

I. Antivivisekcia Konsilantaro. — Adr. : *London* (32, Sackville Str. W.).

I. Pozitivista Societo. — Adr. : *Paris* (rue Antoine-Dubois, 2).

I. Spiritista Oficejo. — Adr. : *Liège* (quai des Pêcheurs, 8).

I. Vegetara Unio. — Adr. : *Bruxelles* (rue des Drapiers, 30).

Helpado, Edukado :

I. Unio de la amikinoj de l'junulino. — Kreita en 1877, celas helpi al la junulinoj vojaĝantaj, 80 stacidomaj helpantinoj. Adr. : *Neuchâtel, Svisujo* (avenue Léopold-Robert, 5).

I. Katolika Asocio por la protektado de la junulino. — Kreita en 1907, celas protekti la katolikajn junulinojn kontraŭ la vojaĝdanĝeroj, starigis stacidomajn postenojn, rifuĝdomojn, k. t. p. (2.572 institucioj diversaj). Adr. : *Fribourg, Svisujo* (rue Saint-Pierre, 16).

I. Komitato de la Kongresoj de publika kaj privata helpado. — Adr. : *Paris* (rue de Miromesnil, 49).

I. Komitato de la Ruĝa Kruco. — Adr. : *Genève* (Corraterie, 24).

I. Unio por la protektado de la infanetoj. — Adr. : *Bruxelles* (rue de la Limite, 27).

I. Oficejo de la popolaj edukentreprenoj. — Adr. : *Bruxelles* (avenue Voltaire, 3).

I. Oficejo de la instruistaj federacioj. — Adr. : *Syngem-Belgujo*.

I. Federacio de la Studentoj. — Adr. : *Ithaca-Usono* (Highland Place, 110).

I. Interŝanĝo de Studentoj. — Adr. : *London* (Caxton House, Tothill Str.).

Societo de I. Interŝanĝo de junuloj. — Adr. : *Paris* (boulevard Magenta, 36).

INTERNACIA KORESPONDADO :

Concordia. — Adr. : *Paris* (rue Christine, 9).

Welt-Verein. — Adr. : *München* (Auenstr., 64).

I. Union. — Adr. : *Leipzig* (Wasserturmstr., 29).

Kosmos. — Adr. : *Amsterdam* (Post, 145).

I. Societo de la intelektuloj. — Adr. : *Catane-Sicilio* (Via Umberto, 22).

Kosmopolit. — Adr. : *Leipzig* (Tröndlinring, 1).

JURO :

Instituto de I. juro. — Kreita en 1873, studas ĉiujn demandojn pri internacia juro, civila, komerca, diplomata aŭ milita, eldonas jarlibrojn. Adr. : *Gent* (rue Savæn, 11).

I. Unio pri punjuro. — Adr. : *Berlin* (Vosstr., 13).

I. Asocio por la protektado de la industria propreco. — Adr. : *Berlin* (Wilhelmstr., 57/58).

I. Mara Komitato. — Adr. : *Anvers* (rue des Escrimeurs, 30).

I. Asocio de leĝfarado kaj politika ekonomio. — Adr. : *Berlin N. W.* (Tile Wardenbergstr., 9).

I. jura Asocio. — Adr. : *London* (Mitre Court Bldgs, 1, Temple)

SCIENCO :

I. Instituto sociologia. — Adr. : *Paris* (Bd Saint-Germain, 115).

I. Instituto statistika. — Adr. : *London* (Adelphi Terrace, 9, W. C.).

I. Instituto kolonia, — Adr. : *Bruxelles* (rue Veydt, 36).

I. Elektro-teknika komisiono. — Adr. : *London* (Victoria Str., 28, S. W.).

Sociologia Instituto Solvay. — Adr. : *Bruxelles*.

I. Oficejo pri eduka dokumentado. — Adr. : *Ostende, Belgujo* (rue des Hospices, 7).

I. Instituto de socia bibliografio. — Adr. : *Berlin* (Spichernstr., 17).

I. Aŝocio de la perioda gazetaro. — Adr. : *Bruxelles* (rue de Robiano).

I. Asocio de la psikaj esploroj. — Adr. : *Paris* (rue de l'Estrapade, 3).

Centra meteora Oficejo : Adr. : *Anvers* (avenue Margrave, 122).

I. Societo de la elektristoj. — Adr. : *Paris* (rue de Staël, 12-14).

I. Asocio de la ĥemiaj societoj. — Adr. : *Gross-Bothen, Saksujo*.

I. Meteorologia komitato. — Adr. : *Berlin* (Prusa Met. Instituto).

I. Etnografia Instituto. — Adr. : *Paris* (rue de la Boétie, 85).

I. Botanikista Asocio. — Adr. : *Harlem, Nederlando*.

I. Entomologia Asocio. — Adr. : *Frankfurt a/M.* (Rheinstr., 25).

I. Komitato de la medicinaj kongresoj. — Adr. : *Hago* (Grood Str., 10).

I. Farmacia Asocio. — Adr. : *Hago* (Schenkweg, 4).

I. Asocio kontraŭ la kankro. — Adr. : *Berlin* (Magdeburgerstr., 14).

I. Asocio kontraŭ la tuberkulozo. — Adr. : *Berlin* (Berlinerstr., 137).

I. Ĥirurgia Societo. — Adr. : *Bruxelles* (rue de la Loi, 72).

I. Dentista Federacio. — Adr. : *Genève* (rue de Candolle, 3).

I. Asocio de l'Malvarmo. — Adr. : *Paris* (avenue Carnot, 9).

I. Asocio de la Kongresoj de l'vojo. — Adr. : *Paris* (avenue d'Iéna, 1).

I. Komisiono de la eldonistoj. — Adr. : *Bern* (Luisenstr., 24).

I. Muzika Societo. — Adr. : *London* (Bernero Str., 19, Oxford Str. W.).

KOMERCO, KOMUNIKADO :

I. Societo por la disvolvo de la komerca instruado. — Kreita en 1900, eldonas revuon, aranĝas ĉiujare, en malsama lando, kursojn de komerca kulturo. 1.650 membroj. Adr. : *Trieste* (Piazza Liptia).

I. Komitato de la kongresoj de Komercaj Ĉambroj. — Adr. : *Bruxelles* (rue Royale, 140).

I. Asocio de la fervojaj kongresoj. — Adr. : *Bruxelles* (rue de Louvain, 11.

I. Asocio de la navigaciaj kongresoj. — Adr. : *Bruxelles* (rue de Louvain, 38).

TURISMO, SPORTOJ :

I. Asocio de la fiŝkaptistoj. — Adr. : *Bruxelles* (Montagne de la Cour, 17).

I. Asocio de la hotelistoj. — Adr. : *Köln* (Am Hof, 41-45).

I. Olimpia Komitato. — Adr. : *Paris* (rue Oudinot, 20).

I. Ligo de la turistaj asocioj. — Adr. : *Baarn, Nederlando.*

I. Ciklista Unio. — Adr. : *Paris* (boulevard des Italiens, 6).

I. Aernaviga Federacio. — Adr. : *Paris* (rue François-Ier).

Internaciaj Kongresoj.

Ni ĉi-sube publikigas, laŭ informoj liveritaj parte per la eldonaĵoj de la Oficejo de la Internaciaj Asocioj en Bruselo, parte per niaj Delegitoj, la liston de la diversaj kongresoj dum 1914. La dato de multaj ne estis ankoraŭ fiksita kiam ni ekpresigis nian Jarlibron. La Esperantianoj, kiuj bezonas pluajn informojn, sin turnu al la Delegitoj de la koncernaj lokoj.

TABELO DE LA MALLONGIGOJ

Kongreso	K.	Kunveno	Kv.
Internacia	I.	Komisiono	Km.
Universala	U.	Kunsido	Ks.
Ĝenerala	G.	Interkonsento	Ik.
Konferenco	Kf.	Unuiĝo	Ui.
Komitato	Kt.		

LOKO	TITOLO	DATO
Amsterdam	I. K. de savado.	
Angers	I. K. de Skoltoj.	Aŭgusto.
Batavia	I. K. de kaŭĉuko.	Septembro.
Berlino	I. K. de urologio (3ª).	
Berno	I. K. de publiklaboroj (4ª).	Aŭgusto.
Berno	I. K. de laktindustrio (6ª).	
Berno	K. I. por la leĝa laborista protektado (8ª).	
Berno	I. K. de neŭrologio kaj psikiatrio (2ª).	Septembro.
Bruselo	I. K. de la popolaj banoj (2ª).	
Bruselo	I. K. de la drogistoj.	Aŭgusto.

LOKO	TITOLO	DATO
Budapest	I. K. de la tramoj kaj duagradaj fervojoj (18ª).	Aŭgusto.
Frankfurt s/M	Kv. I. Asocio de jura kaj ekonomia filozofio (3ª).	Junio.
Hannover	I. K. por la mezaj klasoj.	
Leipzig	I. K. de la perioda gazetaro (4a).	
Lourdes	I. K. Eŭkaristia.	Septembro.
Londono	I. K. dentista.	Aŭgusto.
Londono	I. K. veterinara (10ª).	Aŭgusto.
Londono	I. K. de la turistaj asocioj.	
Lyon	I. K. aeronavigada.	
Luksemburgo	I. K. de la librotenadaj sciencoj (4ª).	
Madrido	I. K. de Universala Poŝta Unio.	Septembro.
Neuchâtel	I. K. de etnologio kaj etnografio.	Junio.
Nov-Jorko	I. K. de ĥirurgio (4ª).	
Parizo	I. K. de la helpado al frenezuloj (6ª).	
Parizo	I. K de la hotelistoj.	
Parizo	I. K. Olimpia.	
Parizo	I. K. ciklista (29ª).	Februaro.
Parizo	I K. de la I. Societo de muziko (5ª).	Junio.
Parizo	I. K. de la Komercaj Ĉambroj.	Junio.
Parizo	I. K. de la matematika instruado.	Junio.
Parizo	I. K. de la matematikistoj.	Aprilo.
Peterburgo	I. K. de sismologio.	Septembro.
Peterburgo	I. K. de la arkitekturistoj (10ª).	
Peterburgo	I. K. agrogeologia.	
Peterburgo	I. K. de oftalmologio (12ª).	Aŭgusto.
Praha	Tutslava K. de abelistoj.	
Romo	I. K. feminista.	Maĵo.
Romo	I. K. de acetileno (7ª).	
Santiago	I. K. de Sudamerikaj studentoj.	
Stockholm	Kf. Interparlamenta.	Julio.
Stockholm	I. K. Krist. Unioj de junulinoj.	Junio.
Sydney	I. K. Christ. Endeavor (5ª).	
Vieno	I. K. de la Paco.	
Vieno	I. K. socialista (9ª).	
Vieno	I. K. de profesiaj malsanoj.	Septembro.
Vieno	I. K. de la nemiistoj de la ledo.	Junio.
Vieno	I. K. de la lignolaboristoj.	
Washington	I. K. de amerikanistoj (19a).	
Zürich	I. K. de konstruado kaj publiklaboroj (4ª).	

Esperantistaj Kongresoj.

LOKO	TITOLO	DATO
Bologna	Itala Esp. Kongreso (5ª).	
Bourg	Kongreso de Esp. Federacio Burgonjo kaj Juro kaj de la Esp Rodana Federacio.	31 Majo - 1 Junio.
Cannes	Kongreso de Provenca Esp. Federacio.	Aprilo.
Chicago	Nordamerika Esp. Kongreso.	
Franzensbad . .	Aŭstria Esp. Tago (4ª).	31 Majo - 1 Junio.
Horsens	Dana Esp. Kunveno (6ª).	31 Majo - 1 Junio.
Leipzig	Germana Esp. Kongreso (9ª).	30 Majo - 2 Junio.
Lourdes	Katolika Esp. Pilgrimo (5ª).	Aŭgusto.
Paris	*U. Kongreso de Esp.* (10ª).	2-10 Aŭgusto.
Paris	*Kongreso de U. E. A.* (5ª).	2-10 Aŭgusto.
Paris	Kongreso de S. f. p. E.	2-10 Aŭgusto.
Praha	Kunveno de Bohema Esp. Asocio.	Januaro.
Sankt-Gallen . .	Kunveno de Svisa Esp. Societo.	
Sant Feliu de Guixols .	Kongreso de Kataluna Esp. Federacio (5ª).	31 Majo - 1 Junio.
Sheffield.	Brita Esp. Kongreso.	31 Majo - 2 Junio.
Szeged.	Hungara Esp. Kongreso (3ª).	31 Majo - 1 Junio.

Internaciaj ekspozicioj, foiroj kaj festoj.

LOKO	TITOLO	DATO
Beaune	Grandaj vinfestoj.	Novembro.
Berlin	Unua Varietea ekspozicio.	Majo.
Bern.	Svisa nacia ekspozicio.	Majo-Oktobro.
Briançon	I. skiada konkurso (8ª).	6-19 Februaro.
Bristol.	I. ekspozicio.	Majo-Oktobro.
Chemnitz	Foiro kvartaga.	19 Jul. - 1 Sept.
Genève	Jubilea festo (kuniĝo kun Svisujo).	Junio.
Genova	I. ekspozicio pri maraferoj, mara higieno kaj Itala elmontro kolonia.	Marto-Novembro.
Holešov (Moravio).	Etnografia ekspozicio.	
Leipzig	I. ekspozicio por libroindustrio kaj grafikaj artoj.	
Leipzig	Nov. jara foiro.	3-16 Januaro.
Leipzig	Paska foiro.	19 Apr. - 10 Majo.
Leipzig	Minaela foiro.	30 Aŭg. - 20 Sept.
London	I. Kaŭĉuka ekspozicio.	24 Jun. - 9 Jul.
London	Anglo-Amerika ekspozicio.	Majo-Oktobro.
London	Ekspozicio de infana bonfarado.	
Lyon	I. urba ekspozicio.	Majo-Oktobro.
Nottingham . . .	Universala ekspozicio.	Majo-Oktobro.
Praha	I. ekspozicio de aŭtomobila industrio.	

Notindaj datoj el la historio de Esperanto kaj U. E. A.

1859. Zamenhof, Lazaro Ludoviko, naskiĝas en Bjelostok (Rusujo-Polujo).

1878. Zamenhof festas kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la « lingwe universala ».

1887 (junio). Apero de la broŝuro : Dro Esperanto, *Lingvo Internacia.*

1889. Apero de la unua gazeto en Esperanto : *La Esperantisto*, en Nürnberg.

1892 (marto). Fondo de la Societo *Espero*, en St-Petersburgo.

1898 (jan.). Fondo de la Societo por la propagando de Esperanto en Francujo.

1899. La raporto *La lingvo internacia* de E. Naville estas prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.

1901. Generalo Sébert kaj Ch. Méray prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.

1902. Fondo de la Svisa Esperanta Societo.

1903 (febr.) Fondo de Hispana Societo por la propagando de Esperanto. Fondo de la Brita Esperanto Asocio.

1905. Unua kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.

1905. Akcepto de la deklaro pri Esperantismo.

1905. Elekto de Lingva Komitato (L. K.).

1906. La dua kongreso de Esperanto aprobas la proponon de Sro Carles pri la kreo de « konsuloj ».

1906. Fondo de la Germana Esperanto-Asocio en Braunschweig.

1906. Dua kongreso de Esperanto en Ĝenevo.

1907 (febr.). *Esperanto*, la nuna oficiala organo de U. E. A., reaperas sub la gvidado de H. Hodler.

1907. Th. Rousseau instigas la kreon de Esperanto-Oficejoj.

1907 (majo). R. de Saussure publikigas la internacian monosistemon (Spesmila sistemo).

1907. Tria kongreso de Esperanto en Cambridge.

1908 (1a majo). Oficiala fondo de U. E. A.; provizora elekto de Delegitoj.

1908. Kvara kongreso de Esperanto en Dresdeno.

1908. Unua kunsido de U. E. A. dum la kvara Esperanto-Kongreso.
1909 (majo). Fondo de Ĉekbanko Esperantista de C.-F. Höveler. (Ĉefeĉ).
1909. Kvina kongreso de Esperanto en Barcelono.
1909. Dua kunsido de U. E. A. dum la kvina Esperanto-Kongreso.
1910 (julio). Unua kongreso de U. E. A. en Augsburg.
1910. Sesa kongreso de Esperanto en Washington.
1910. Unua kongreso de la katolikaj Esperantistoj en Parizo.
1910 (nov.). Unua elekto de Distriktaj Delegitoj de U. E. A.
1911. Sepa kongreso de Esperanto en Antverpeno.
1911 (aŭgusto). Dua kongreso de U. E. A.
1912. Oka kongreso de Esperanto en Krakovo.
1912. Tria kongreso de U. E. A. en Krakovo.
1912. Financa reformo de U. E. A.
1913. Naŭa kongreso de Esperanto en Berno.
1913. Kvara kongreso de U. E. A. en Berno

LEONARD ROMANOWSKI


Ica

AKTIENGESELLSCHAFT-DRESDEN

Plej granda kaj plej malnova fabriko por kamero- kaj kinokonstruado. Akcia kapitalo 4,000,000 markoj. Jara produkcio : pli ol 120,000 kameroj. Pli ol 1,500 oficistoj kaj laboristoj.

Cameras

Kameroj en ĉiuj ekzistantaj formatoj, por platoj kaj firmoj, kun ĉiuj fermilsistemoj kaj nesuperebla optika aparato je ĉiuj prezoj, por ĉiuj celoj de fotografado en la servo de scienco, teĥniko, industrio, arto, sporto kaj por amatoroj. Vendado de la aparatoj per ĉiuj fotovendejoj de la mondo je originalaj prezoj. Ĉiuj imageblaj bezonaĵoj por la fotografado, la pozitiv- kaj negativprocedo.



Ilustrita ĉefkatalogo nº 380
TUTE SENPAGE

CAREW & CAREW

TAJLOROJ

137, Oxford Street, **LONDON** (Anglujo)

Ni invitas ĉiujn alilandajn samideanojn en Londono, ke ili vizitu nian magazenon. Ili nepre ricevos zorgeman atenton.



KOSTUMOJ VIRAJ :
25. » Sm. ĝis 55 Sm.

KOSTUMOJ VIRINAJ :
31.50 Sm. ĝis 63 Sm.

Sendu por ŝtofspecimenoj, folio por memmezuro, kaj ilustrita katalogo afrankite. Al ĉiu Esperantiano estos permesata rabato de 10 %

Legu la jenan ateston de la Ĉef-Delegito por Londono :

Mi estas tre kontenta pri la kostumo kiun vi faris por mi ; la ŝtofo kaj la fabrikiteco estas bonegaj.

Speciala noto :
Ni tre volonte respondos al informpetoj pri ĉiaj aferoj.



MATENA VESTO de 31.50 Sm.

ORDINARA VESTO de 25 Sm.

OATEN & OATEN, 137a, Oxford Street., W.

DENTISTA ĤIRURGEJO

Sub la persona zorgado de Sro F. OATEN. (Elpensinto de la Sendolora Anestezio « Certaine ».)


Li havis Dento-Hospitalan instruadon « cum curriculum » kiel estas rekonata de la Reĝa Kolegio de Ĥirurgoj.

Sendoloraj denteltiroj garantiataj po duono da ordinara prezo

HOLDEN FRATOJ

LIVERAS

Botojn, Ŝuojn,
Sandalojn, Pantoflojn,
Kaŭĉukajn Ŝuojn
Ŝtrumpojn kaj Ŝtrumpetojn.



Ĉiuj ekskluzive laŭ la tipo " Naturformo "

SKRIBATESTOJ

Feliĉa estas la nacio, kiu havas tiajn Botistojn, kiaj vi.
Dro Antoni NIEDZIEWYDSKI, T. E. K. A.
Newton Abbot, Anglujo, 5-6-1913.

Estimataj Sinjoroj,
Mi tre dankas vin por la ŝuoj, kiujn mi jam ricevis hieraŭ matene. Ili estas belaj kaj multe komfortaj, kaj mi estas tiel kontenta, ke mi rekomendos viajn komercajojn al aliaj samideanoj.
Rhoda E KREMNITZ.
Paris, 3an aŭgusto 1913.

Karaj Samideanoj,
La botojn, pri kiuj mi estas kontenta, mi ricevis vendredon pasintan... Mi dankas vin, ĉar la botoj tute bone vestas miajn piedojn. Samideane, J. DURIEUX.
Troyes, 19an de majo 1913.

Estimataj Sinjoroj,
Mi bone ricevis viajn sendajojn, kaj la ŝuoj aliras bone, mi estas kontenta... Sendu do al mi kelkajn katalogojn, kiujn mi disdonos al aliaj anoj. Mi sendas al vi miajn sincerajn salutojn. F. DORE.
Staročerkasko, Dona provinco, Rusujo, 23an nov. 1912.

Estimataj Sinjoroj,
Menditajn ŝuojn mi recevis en bona stato, 21an de nov... Proksimanjaron mi mendos ĉe vi denove. Attestime. Anna M. GRINEVA.

HOLDEN FRATOJ

3, Harewood Place, Oxford Circus, LONDON W.

Katalogoj senpage. — Oni parolas Esperante.

ESPERANTISTOJ!

LERNU LA ANGLAN LINGVON

sen Instruisto

Per la MARLBOROUGH Serio de MEM-INSTRUAJ Lernolibroj

Enhavoj : Vortaroj, Konversaciaj Frazoj, Gramatiko, Komerco, Vojaĝado, Juraj kaj Religiaj Frazoj, Fotografado, Biciklado Aŭtomobilismo, Amuzaĵoj, Mono, Pezoj kaj Mezuroj, k. t. p.

Por FRANCOJ
L'Anglais pour les Français
Prezo : fr. **1.50**. Sm. **0.60**
(Tolo) fr. **2.25**. Sm. **0.90**

Por GERMANOJ
Der Englische Dolmetscher
Prezo M. **1.25**. Sm. **0.60**
(Tolo) M. **1.75**. Sm. **0.90**

Por ITALOJ
L'Inglese Imparato da Sè
Prezo L. **1.50**. Sm. **0.60**
(Tolo) L. **2.25**. Sm. **0.90**

Por HISPANOJ
El Ingles para Cada Cual
Prezo P. **1.50** Sm. **0.60**
(Tolo) P. **2.25** Sm. **0.90**

FRAZLIBROJ POR VOJAĜANTOJ

ESPERANTO-ANGLA. { Prezo. *6* p. Sm. **0.25**. (Tolo) *1* ŝ. Sm. **0.50**.
ESPERANTO-ITALA. { Prezo. L. **1**. » Sm. **0.40** (Tolo) L. **1.50** Sm. **0.60**

Enhavoj : Prononcado, Konversaciaj Frazoj (Temoj aranĝitaj alfabete), Tabeloj de Mono, Pezoj kaj Mezuroj, la Numeroj, Listoj diversspecaj kaj Vortaroj de ĉiutage uzataj vortoj.

Riceveblaj ĉe **Anglaj kaj Kontinentaj Librejoj**.

Por plena listo petu Katalogon nº 54, senpage, de

E. MARLBOROUGH & Cº, 51, Old Bailey, LONDONO (Anglujo)

FINNAJN SKIOJN de plej bona kvalito en la mondo liveras subskribinto. Mi petas Esperantistojn tuj konatiĝi kun miaj malkaraj prezoj kaj decaj kondiĉoj.

Fiko VESA. — ABO (Finnlando). — *Plej malkare !*

AGENTECOJN prizorgas samideano por ĉiuj landoj, nomas devenojn, k. t. p. Senpage, nur unu respondkup. Lagerkarte 93, Berlin SO. 26.

PSIĤO-GRAFOLOGIA INSTITUTO " Riga Stelo ", Ĉerkovnaja, 4ª, Riga. — *Grafologia portreto.* — 1 Sm.

LIBROJ NE NOVAJ

por Esperanto-Studentoj

JE DUONAJ PREZOJ

Speciala Provizo da **Verkoj Alilandaj**, konsistanta el pli ol 300,000 libroj, en **ĉiu lingvo** kaj pri ĉiu temo.

Pli ol 1,000,000 libroj estas tenataj, ĝuste klasifikitaj.


NOVAJ LIBROJ je 25 % rabato — **KATALOGO Nº 849 SENPAGA** — **Oni sendas laŭaprobe Citu viajn bezonojn**

Ni aĉetas Librojn kaj donas plej bonajn prezojn

W. & G. FOYLE 121-123, Charing-Cross Road LONDON (Anglujo)

Telegramoj : " FOYLIBRA " LONDON

1e ARITMETIKA MAŜINO KUN GRIFELKESTO




(MODELPATENTO)

La maŝino konsistas el ferkovrilo, kiu portas sur la malsupra flanko du stangojn kun po 10 globoj. Ĝi sin lasas almeti sur ĉiu pupitro inter la inkujoj.

Prezo : 0.5 Sm. (1 marko), je pli granda mendo : 5, 10, 15 % rabato.

2e Aritmetika maŝino kun cilindraj aksoj por instali sur la katedro

(MODELPATENTO)



La maŝino speciale konvenas por la transmara eksporto ; ĉar ĝi estas, kaŭze de sia malgranda volumeno, multe pli malkara pri la ŝiptransporto ol la grandaj stablomaŝinoj.

Prezo : 3 Sm. (6 markojn).

Ambaŭ aparatoj riceveblaj ĉe la instruisto

Heinr. HALFMANN, REMSCHEID (Rejnlando).

« La aparatoj estas ekstreme utilaj por la unua instruado aritmetika. »
Rektoro BLASBERG, Remscheid.

La LASTA RIMEDO

por ĉiuj suferantoj je piedoj

ĉu platpiedo, ĉu podagro, ĉu reŭmatismo estas la ortopedia boto farita de specialisto.

MULTJARAJ SUKCESOJ

Normalaj botoj kaj ŝuoj por ĉiuaĝaj infanoj zorgeme faritaj en mia metiejo je moderaj prezoj.

Ili konservas la piedojn sanaj

Interesa broŝuro senpage kaj afrankite

Oni postulu apartan katalogon por infanetoj, knaboj kaj knabinoj

Joh. JAJSZYCEK

Krukenbergstr., 18, **HALLE** (Saale), **Germanujo**

PSORIASO, seka ekzemo sur la tuta korpo

« Mi havas la honoron konigi al vi, ke post uzado de viaj letere receptitaj medikamentoj mi estas plene liberigita de miaj malsanoj : **seka ekzemo (psoriaso)** kaj **harperdo**, kio devigas min je granda danko. »

Sino Frieda WEGMANN,
Letten-Wülflingen (kantono Zurich), la 9 septembro 1912.

Supra letero atestita de la Gemeindeammanamt, Wülflingen,
Ulr. KELLER, Amman.

Adreso : **Sanatorio « Vibron », Wienachten apud Rorschach**
(SVISUJO)

SKRIBU tuj al
Georg REINER
BERLIN-RUMMELSBURG (A.)
kaj petu la novan esperantan prezaron pri **poŝbruligiloj, razaparatoj,** k. t. p.

OLIVAJ OLEOJ

GARANTIITE PURAJ

Octave PELLETIER, NICE

Kortega liveranto por Nederlando

SENKONKURENCA

Membro de la jugantaro en MILANO, LONDON *kaj* PARIS

DIREKTA EKSPEDO AL LA KONSUMANTO

Depost 3 litroj por Francujo
kaj de 4 1/2 litroj por la eksterlando.

BREKKE & HOWLID

9, Scale Lane, **HULL (Anglujo)**

Ĉiuspecaj oleoj, Sardenoj, Haringoj freŝaj en tomato kaj fumaĵigitaj, Anĉovoj, Fromaĝoj, Makaronioj kaj Vermiĉeloj, Alumetoj, Fazeoloj, Butero kaj Sulfurfaboj, Konservitaj Salmoj, Tomatoj, Tomatpistaĵo, Karbeksportistoj, Fiŝfumaĵistoj, Ŝipekipistoj.

Telegramoj : " BREKKES, HULL "

IMPORTO ESPERANTIA ENTREPRENO EKSPORTO

SPICAĴOJ ✧ NUTRAĴPASTOJ ✧ KONSERVAĴOJ ✧ PORKAĴOJ

Fernand DUGOIS

42, Strato Petite-Tannerie, **TROYES** (Aube), **Franclando**

SPECIALECO DE TROYES'AJ TRIPKOLBASETOJ

Viandaj kaj kortobirdaj Pasteĉoj

FABRIKO DE STANDARDOJ KAJ INSIGNOJ

F. DROUAULT, Fabrikisto-Eldonisto ✣ ✣ ✣
323, rue Saint-Martin, PARIS-IIIe

Sendas **SENPAGE** *sian* **SPECIALAN KATALOGON ILUSTRITAN**
Oni povas elekti inter multaj Insignoj kaj Esperantajoj

Modeloj enregistritaj en Francujo kaj aliaj landoj
Reliefaj objektoj, masiva metalo. Riĉaj ĉizoj kaj gravuroj

Insignoj ĉiuspecaj, Broĉoj, Butonoj, Pingloj, Kravat-pingloj, Ĉenpendaĵoj, Butonoj por Manumoj, Pingloj por Ĉapeloj, Juveloj, Medaloj, Metalmarkoj, Diplomoj, Flagoj, Standardoj, Mortotukoj, Brodaĵoj, k. t. p.

Rabato 15 % al la grupoj kaj vendistoj.

Sendo afrankita nur ĝis la Francaj landlimoj. Pago per poŝtmandato aŭ ĉekoj pagotaj en Paris. Tiuj, kiuj deziras malfermigi konton je sia nomo, volu sendi minimuman monprovizon de **10** fr. (Sm. 4 »).

La GRAFIKARTOJ

JUAN COMAS FAURA

Rambla, 81, SABADELL (Hispanujo)

Tipo-Litografiejo. — Presitaĵoj rekte de la ŝtalo.
Reliefoj. — Manufakturo de banderoloj.
Fabrikejo de por-specimenaj karto-libraroj,
la plej grava el Hispanujo.

Eksportado al eksterprovincoj kaj pretermaro.

2ª PARTO

INFORMOJ PRI U. E. A.

Historio

U. E. A. naskiĝis el duobla bezono : praktika kaj idea.

Gi estis fondita en la komenco de jaro 1908, laŭ la iniciato de Sroj Hodler kaj Rousseau. Sed jam antaŭ tiu dato okazis diversaj faktoj, kiuj preparis ĝian fondon. Oni povas citi, el la vidpunkto praktika : la decidon de la IIe Universala Kongreso de Esperanto (Genevo, 1906) pri la starigo de Esperantistaj Konsuloj en ĉiuj urboj, la samtempan kreon de Esperanto-Oficejoj, la fondon de diversaj fakaj societoj, la reaperon de la ĵurnalo *Esperanto* celanta esti la organo de tiuj diversaj praktikaj institucioj, la kunvenon de la konsuloj ĉe la IIIa kongreso de Esperanto, k. t. p. Sed la sperto baldaŭ montris, ke nenia metoda kaj serioza praktika agado povas esti fruktodona sen internacia organizaĵo, kiu kunigos la diversajn iniciatojn kaj kreos praktikan servaron uzeblan de ĉiuj personoj kaj institucioj interesataj en la internacia vivo.

Aliparte la praktikado de la lingvo Esperanto kaj aktiva partopreno en la Esperantista movado kreis inter la ple multaj Esperantistoj fortan ligilon de solidareco kaj nedubeblan komunecon de sentoj kaj ideoj. Tion esprimas la tiel nomata « interna ideo de Esperantismo », kiu mem gvidis la aŭtoron de Esperanto kaj estis ofte aludita de li. Por konkretigi tiun ideon, konstantigi kaj firmigi la ligilojn inter ĝiaj anoj, por realigi Esperantismon kaj ĝin starigi sur neŝancelebla fundamento, estis tiel same necesa unu forta internacia organizaĵo.

Por tiu duobla celo : plifaciligi la interhomajn rilatojn sur

la neŭtrala bazo de Esperantismo, plimultigi la ligilojn inter ĝiaj anoj, estis kreita Universala Esperanto-Asocio.

La unua provizora Statuto de U. E. A. estis akceptita la 28an de aprilo (oficiala fondo). En malmulte da tempo la Asocio faris rapidajn progresojn en ĉiuj landoj. Jam kelkajn monatojn post sia fondo, ĝi kalkulis milon da membroj kun kelkaj centoj da Delegitoj ; dume ĝi organizis diversajn praktikajn servojn por komerco, turismo, junuloj, k. t. p. La unua kunveno de U. E. A. okazis en Dresdeno, la dua en Barcelono. Intertempe la nombro de la membroj senĉese kreskis dum paralele pligrandiĝis la utileco kaj uzo de ĝiaj servoj. Dum la monatoj Julio-Aŭgusto 1910 ĝia Ia kongreso okazis en Augsburg. Tuj poste estis voĉdonita nova Statuto, kiu enkondukis kelkajn ŝanĝojn en la internan organizon de U. E. A. kaj estis aplikata de la komenco de 1911.

Post la 3a Kongreso (Krakovo 1912) estis voĉdonita financa reformo por starigi la Asocion sur tute normalan financan bazon. Ĝiaj ĉefaj punktoj, nome plialtigo de la kotizaĵo ĝis 2,50 Fr. kaj starigo de garantia kapitalo, estis akceptitaj per granda plimulto

Celo.

Laŭ sia Statuto, U. E. A. havas kiel celon :

1e Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso aŭ lingvo ;

2e Krei praktikan servaron konstante uzeblan de ĉiuj homoj kaj korporacioj, kies ekonomiaj aŭ intelektaj interesoj celas trans la limoj de ilia gento aŭ lingvolando ;

3e Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco ;

4e Ellabori neŭtralan organizan fundamenton super kiu ĉiuj progresemaj homoj povos pace interkomunikiĝadi sen reciproka altrudo de siaj gentaj apartaĵoj.

La celo de U. E. A. estas do esence *socia*.

Nia Asocio do ne celas la senperan propagandon de la lingvo Esperanto aŭ ĝian disvastiĝon.

Ĝi estas internacia organizaĵo, kiu uzas Esperanton por siaj interrilatoj same kiel nacia societo uzas nacian lingvon. Por ĝi la lingvo Esperanto estas nur ilo.

U. E. A. ankaŭ ne estas pure praktika organizaĵo havanta nur materialan celon. La praktika servaro, starigata de ĝi, celas antaŭ ĉio plifaciligi la ĉiuspecajn rilatojn inter ĝiaj membroj, doni konkretan kaj vivantan fundamenton al Esperantismo.

Organizo.

U. E. A. estas esence internacia aŭ pli ĝuste *supernacia*, t. e. ĝi havas nenian nacian sekcion. Interne de U. E. A. estas nek angloj, nek francoj, nek germanoj, k. t. p. sed nur *Esperantianoj*.

La organizo de U. E. A. staras sur demokrataj principoj.

La membraro mem elektas siajn ĉefajn reprezentantojn kaj decidas pri la agado de la Asocio. La diversaj postenoj estas komisiataj al personoj, ne al komitatoj, kun klara respondeco kaj iniciato.

Plie, U. E. A. kunigas la bonaĵojn de centralizo kaj malcentralizo, estante internacie centralizata pri la organizo kaj servoj, kaj lasante aliparte memstarecon al la regionoj kaj distriktoj. Konsiderante ne nur la teritorian, sed ankaŭ la fakan grupiĝon, ĝi konformiĝas al la postuloj de la moderna socia vivo.

Pri la detaloj de la organizo, vidu la Statuton kaj la diversajn regularojn, k. t. p. La ĝenerala organizo estas resumata de la suba tabelo :

Regiono :

1e Ĉiujare *regiona kunveno* de la Esperantianoj. Fiksas la regionan agadon de U. E. A.

2e *Delegito* kaj *Vic-Delegito* Balotataj de la membroj por 3 jaroj). Reprezentas U. E. A., starigas la servojn, administras. Elektas *lokajn* helpantojn aŭ *Subdelegitojn*, fakajn helpantojn aŭ *Konsulojn*.

Distrikto :

1ᵉ Ĉiujare *distrikta kunveno* de la Esperantianoj. Fiksas la distriktan agadon de U. E. A

2ᵉ *Distrikta Delegito* (Balotata de la Delegitoj por 3 jaroj). Propagandas por U. E. A., varbas novajn Delegitojn, kontrolas.

Tutmondo :

1ᵉ Ĉiujare *Kongreso* de la Esperantianoj. Fiksas la ĝeneralan agadon de U. E. A.

2ᵉ *Komitato* (10 membroj. Balotata de la Delegitoj por 3 jaroj) Gvidas la Asocion, kreas servojn, faras regularojn.

3ᵉ *Direktoro* kaj *Vic-Direktoro* (Balotataj de la Komitato por 3 jaroj). Administras la Asocion, efektivigas, kontrolas. Estas helpata de *Fakestroj* kaj specialaj *komisionoj*.

Fakoj :

Krom tio, la Esperantianoj povas laŭvole grupiĝi laŭ *fakoj*. Ĉiu fako estas prizorgata de *Komisiono* kaj de *Fakestro*, elektataj de la Komitato de U. E. A.

STATISTIKAJ INFORMOJ

Nombro de servoj :	1909	1910	1911	1912
Komerco	1.120	1.513	2.698	2.835
Junuloj kaj Studentoj	218	402	528	495
Turismo	650	681	1.252	1.362
Helpo al vojaĝantoj	628	1.110	1.704	1.930
Diversaj servoj	940	3.756	4.293	4.674
Sumo	3.556	7.462	10.475	11.296
Movado de la korespondaĵoj de la Delegitoj	5.754	14.651	19.075	25.550
Movado de la korespondaĵoj ĉe la C. O. de U. E. A.)		23.940	34.355	41.087
Sumo	5.754	38.591	53.430	66.637

	1909	1910	1911	1912
Gazetartikoloj pri U. E. A.	326	606	863	865
Paroladoj pri U. E. A	218	464	547	512
Esperanto-Kursoj	»	739	1.036	852
Lernantoj ĉe la Esperanto-Kursoj	»	11.941	17.530	16.082
Lokoj kun Delegitoj	832	872	885	1.179

La statistiko de la servoj dum 1913 estas farota komence de 1914.

Etato de membroj laŭ landoj

	1910	1911	1912	1913
Aŭstrio-Hungario	387	499	494	384
Belgujo	73	89	73	65
Britujo	759	807	936	737
Bulgarujo	99	55	66	5
Danujo	40	45	37	49
Francujo	1.342	1.181	1 215	853
Germanujo	1.479	1.293	1.617	1 208
Grekujo	17	1	1	1
Hispanujo	512	347	470	274
Italujo	169	178	256	119
Nederlando	180	192	249	160
Portugalujo	41	52	58	32
Norvegujo	—	25	37	27
Rumanujo	87	12	13	9
Rusujo	987	956	1.020	715
Serbujo	18	14	9	2
Svedujo	102	56	61	47
Svisujo	166	200	184	162
Turkujo	97	27	34	4
Eŭropo	6.555	6.029	6.850	4 842
Nord-Ameriko	213	253	311	273
Centr-Ameriko	—	16	17	14
Sud-Ameriko	174	116	256	36
Afriko	54	60	54	32
Azio	179	95	214	135
Oceanio	209	191	114	104
Tutmondo	7.384	6.760	7.816	5.446

Grava rimarko. — Tiu statistiko estas farata la 1 julio ĉiujare por la kongreso de U. E. A. La finaj ciferoj, je la 31 oktobro, estas do pli altaj. En 1912, la membronombro atingis 8.800 kaj la 31 oktobro 1913 ĝi atingis **6.275**.

En 1911 la kotizajo estis plialtigita de 36 ĝis 50 sd.

En 1912, sekve de la financa reformo, la kotizaĵo estis duobligita; pro tio la membronombro malkreskis je ĉirkaŭ unu triono.

SERVOJ DE U. E. A.

Laŭ la Statuto, ĉiuj Esperantianoj rajtas uzi la servojn de U. E. A. en la limoj fiksataj de la Regularoj.

Plie, la Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj, krom la ordinaraj rajtoj de la membroj, rajtas uzi servojn speciale difinitajn por ili.

Pri la uzado de la diversaj servoj de la Asocio, la fundamenta principo estas la jena : *ĉiuj servoj mem estas senpagaj, sed ĉiu uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito, rezultansajn de la petita servo* (respondo, specialaj klopodoj, k. t. p.).

INFORMPETOJ

Pri kio oni povas peti informojn : Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungado, salajroj, vojaĝoj, turismo, libertempo, interŝanĝo de junuloj, instruado, studentoj, virinoj, maraj aferoj, lokaj institucioj, k. t. p.

Pri kio oni ne povas peti informojn : Pri komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidenciaj informoj). Tamen, tiuokaze la Delegitoj povas konigi la agentejon de sia loko, kiu sin okupas pri tio.

Kiel oni devas peti informojn : Precize skribi al la Delegito de la koncerna regiono, aldoni al la subskribo la *numeron de la membrokarto* kaj *internacian respondkuponon* (valoro : 10 sd.) *aŭ respond-poŝtkarton* (necesege !).

Kiam oni rajtas plendi : Se informpeto ne estis respondita de la Delegito almenaŭ *kvin* tagojn post ĝia *ricevo*, la petinto rajtas plendi ĉe la Centra Oficejo de U. E. A., kiu faros la necesan enketon. Same pri malbone aŭ nekontentige farita servo.

Pri kio ĉiu devas atenti : 1ᵉ Skribi *tre legeble*, precipe sian adreson (skribotan en nacia lingvo, ne en Esperanto, kaj per latinaj literoj).

2ᵉ Skribi sur la adreso, post la nomo, la titolon *Delegito de U. E. A.*, tiel ke, se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vicdelegito.

3ᵉ Skribi ĉiam *en Esperanto*, sola oficiala lingvo de U. E. A. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

4ᵉ Afranki sufiĉe la leterojn.

Kiel presaĵoj estas respondataj : La *cirkuleroj* aŭ *presaĵaj demandaroj*, enketoj, k. t. p., devas esti respondataj de la Delegitoj, nur se ili estas akompanataj de respondkupono aŭ karto. En okazo de enketo, oni estas petata fari kiel eble plej klaran demandaron.

DUM VOJAĜO

Antaŭ la vojaĝo : Oni faru laŭeble vojaĝplanon, skribu — se necese — al la Delegitoj de la diversaj halturboj por ricevi informojn, mendu la kolekton de la *gvidfolioj* de la vizitotaj urboj.

Dum la vojaĝo : Ĉar la Delegitoj plej ofte ne disponas libere sian tempon, oni skribe *antaŭinformu* la Delegiton pri sia vizito kaj la horo de sia alveturo, almenaŭ *24 horojn antaŭe*.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Li donos al li ĉiujn informojn por plifaciligi lian restadon kaj la vizitadon de la vidindaĵoj, montros al li la Esperantian hotelon, lin prezentos al la Esperantianoj de sia loko, ĉe la grupaj kunvenoj, gastotabloj, k. a.

Por la vojaĝantinoj : En granda nombro da regionoj, la Delegitoj elektis specialan Konsulinon por virinoj. Ŝi havas aparte la taskon respondi la informpetojn senditajn de Esperantianinoj kaj liveri ĉiujn bezonatajn informojn, konsilojn kaj helpojn al la vojaĝantaj membrinoj de U. E. A.

Ĉiu Esperantianino, vojaĝonte, devas almenaŭ 24 horojn antaŭ sia alveno informi la Delegiton de la trapasota regiono, kiu sendos al la stacidomo la Konsulinon por virinoj por akcepto kaj la necesaj servoj.

KOMERCO

En ĉiuj gravaj lokoj, niaj Delegitoj firme promesis disdonigi ĉiujn prospektojn, reklamilojn, katalogojn, prezarojn, gvidlibrojn, broŝurojn, k. t. p., kiujn ili ricevos, kondiĉe ke ili estu redaktataj, ĉu tute, ĉu parte en Esperanto, kaj sendataj de *Esperentiaj Entreprenoj* per la Centra Oficejo de U. E. A. Oni facile komprenos kian profiton, el la reklama vidpunkto, povas de nun eltiri de tiu servo la komercistoj, kiuj deziras konigi siajn produktaĵojn eksterlanden, la societoj, kiuj deziras konigi sian regionon, ekspozicioj, festoj, k. t. p. Dank'al niaj Delegitoj tiuj reklamiloj estas disdonataj eĉ en la plej malproksimaj regionoj, kia ajn estas ilia lingvo.

Tarifo.

Poŝtelspezoj + 2,50 fr. (1 Sm.) po 100 sendaĵoj (por kovertoj kaj adresskribado).

Ekz. :

5.000 cirkuleroj sendotaj al 1.000 Delegitoj aŭ membroj kostos :
50 fr. por kovertoj, adresskribado kaj stampado.
25 fr. por poŝtelspezoj (5 ct. po koverto, ĝis 50 gramoj, poste. 5 ct. por ĉiu plia kvanto de 50 gr.)

Oni povas sendi la reklamilojn ĉu al ĉiuj landoj, ĉu al kelkaj landoj.

Se la prospektoj devas esti speciale faldataj aŭ kunmetataj, la prezo altiĝas laŭ la laboro ĝis 20 %.

*
* *

Aliparte U. E. A. prizorgas pograndan disdonon de *ĉiulingvaj* reklamiloj, prospektoj, katalogoj, gvidlibroj, k. t. p. Ĉiuj Esperantiaj Entreprenoj kiuj deziras uzi la servojn de U. E. A. por disdonigi siajn reklamilojn eksterlanden sin turnu al la Centra Oficejo de U. E. A., kiu laŭ la kvanto de reklamiloj disdonotaj kaj la necesaj informoj starigos kalkulproponon.

GVIDFOLIOJ KAJ GVIDLIBROJ

Gvidfolioj.

Gvidfolio celas liveri al la vojaĝantoj la plej urĝajn informojn, ĉu el Esperantista, ĉu el ĝenerala vidpunkto. Ĝi enhavas : 1° la adreson de la Delegito kaj de la Konsuloj, kaj la horojn, je kiuj ili estas viziteblaj ; 2° la adresojn de la lokaj esperantistaj grupoj, se ekzistas tiaj, kaj iliajn kunvenejojn ; 3° la adresojn de la firmoj, hoteloj, kafejoj, apotekistoj, bankistoj, k. a., rekomendataj al Esperantianoj (oni montras per speciala signo tiujn, kiuj parolas Esperanton) ; 4° kelkajn informojn por viziti la urbon, nomaron de la vidindaĵoj, k. a.

Ekzistas ĝis nun gvidfolioj en la jenaj urboj :

Aŭstrio-Hungario : Bozen-Gries, Budejovice, Jindrichuv Hradec, Kladno, Praha, Prostejov, Roznov.

Belgujo : Spa.

Bulgarujo : Sofia.

Britujo : Bath, Cheltenham, Cromer, Letchworth, Liverpool, London.

Danujo : Aarhus, Kopenhag.

Francujo : Beaune, Bordeaux, Calais. Dijon, Grenoble, Roye, Tours, Vienne.

Germanujo : Bamberg, Berlin, Breslau, Dresden, Elberfeld, Halle, Hannover, Kiel, Krefeld, Merseburg, München, Rostock, Stuttgart, Weinböhla.

Hispanujo : Cartagena, Madrid, San Sebastian, Sevilla.

Rusujo : Kiew, Moskvo, Peterburgo, Saratov, Varsovio, Višni-Voloĉok.

Svedujo : Stockholm.

Svisujo : Davos, Genève, Le Locle, Rorschach.

Prezo :	1 ĝis 10 ekz. . . .	*10 ct.*	(4 sd.)	Por membroj de U. E. A.
	11 — 25 —	*25* —	(10 —)	
	26 — 50 —	*50* —	(20 —)	
	Plena kolekto . . .	*75* —	(30 —)	
	(kun la Universitataj gvidfolioj)			

Oni povas mendi ekz. de sama aŭ de malsamaj urboj laŭvole. Oni pagu per poŝtmandato, transpagilo, respondkuponoj aŭ respondpoŝtkarto 10 ct. Naciaj poŝtmarkoj, krom svisaj, ne estas akceptataj.

La supraj prezoj valoras *nur por la membroj de U. E. A.*, kiuj ĉe la mendo notu sian membronumeron.

* * *

Por ke gvidfolio surhavu la subtitolon : « Publikigita sub la aŭspicioj de U. E. A. », estas necese ke : 1e ĝia manuskripto estu sendata al la Centra Oficejo de U. E. A. por tralego ; 2e ĝi estu presata en la tute sama formato kaj similaj literoj, kiel la ĝis nun eldonitaj gvidfolioj ; 3e U. E. A. ricevu por disdonado al la petantoj 500 ekzemplerojn. U. E. A. prenas ankaŭ mem sur sin la presadon kaj eldonadon de tiuj gvidfolioj, kondiĉe ke la eldonanto : 1e sendu tute pretan manuskripton ; 2e pagu sumon da 17,50 fr. (7 Sm.) por la unua milo kaj 12,50 fr. (5 Sm.) por ĉiu sekvanta milo.

Universitataj gvidfolioj.

Universitata gvidfolio celas utili al la studentoj, kiuj deziras veturi eksterlanden por kompletigi siajn studojn en alilanda universitato. Ĝi enhavas informojn pri la Universitato (programo, kosto, studkondiĉoj), pri loĝejoj por studentoj, pri libertempaj kursoj por alilandanoj, k. t. p.

Ĝis nun ekzistas tiaj gvidfolioj en la jenaj urboj :

Dijon, Grenoble, Innsbruck, Milano, Nancy, Peterburgo, Poitiers.

Prezo : Plena kolekto *25 ct.* (10 sd) por membroj de U. E. A.

Tiuj universitataj gvidfolioj estas eldonataj laŭ la sama principo kaj la samaj kondiĉoj kiel la turistaj gvidfolioj.

U. E. A. liveras plenan kolekton de tiuj universitataj gvidfolioj po 25 ct. (10 sd.).

Gvidlibroj.

Diversaj Esperantistaj aŭ turismaj societoj eldonis Esperante redaktitajn gvidlibrojn, plej ofte ilustritajn. Oni trovos la liston de tiuj gvidlibroj en la klarigaj artikoloj pri la diversaj landoj.

La C. O. de U. E. A. liveras afrankite gvidlibrojn de la jenaj regionoj laŭ la flanke montritaj prezoj

I = ilustrita ; R = resumo Esperanta.

Aŭstrio-Hungario

	Ct.	Sd.
Franzensbad (16 paĝ. 13×19,5. I)	*10*	4
Krakow (68 paĝ. 12×16. I)	*15*	6
Pejzaĝoj en Aŭstrio (117 paĝ. 15×11. I)	*30*	12

Belgujo

Antverpeno (32 paĝ. 12×16,6. I)	*10*	4

Finnlando

	Cl.	Sd.
Vojaĝado en Finnlando (64 paĝ. 12,5×18. I) .	25	10

Francujo

Fervojo Orléans (24 paĝ. 14×24. I)	15	6
Tra la lando Anjou (8 paĝ. 11×19. I).	10	4
Rouen kaj ĉirkaŭaĵoj (107 paĝ. 12,5×16) . . .	70	28
Vichy-Gvidlibreto (24 paĝ, 14,7×9. I)	10	4

Germanujo

Augsburg (12 paĝ. 10,7×16,6. I)	10	4
Bad Reichenhall (32 paĝ. 11,5×16,3. I)	10	4
Breslau (24 paĝ. 11,5×16,5. I)	10	4
Tra Dancigo (16 paĝ. 11,5×16,5. I).	10	4
Düsseldorf am Rhein (24 paĝ. 12,3×22,2. R) . .	10	4
Vizitu Esslingen apud Neckar! (8 paĝ. 12×21,5. I)	10	4
Stuttgart (52 paĝ. 11,5×16. I).	15	6
Wernigerode-Hasserode (8 paĝ. 11×19. I) . . .	10	4

Usono

Los Angeles [Kalifornio] (63 paĝ. 21×15). . . .	25	10

ESPERANTIAJ HOTELOJ

Pri tiu servo, vidu la klarigojn sur paĝo 229.

STUDENTOJ

Universala Studenta Asocio (fako de U. E. A.).

La studentoj povas aliĝi al la fak-asocio *Universala Studenta Asocio*, kreita en 1912.

Gia celo estas plifaciligi la rilatojn inter la ĉiulandaj Esperantianaj studentoj, studi ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por la ĉiulandaj studentoj, propagandi U. E. A. kaj Esperantismon ĉe la studentaron.

La fako estas direktata de Fakestro helpata de Studenta Komisiono.

La Fakestro komunikas kun la membroj per hektografitaj cirkuleroj.

La studentoj, kiuj deziras aliĝi al la Studenta Asocio, devas pagi kotizaĵon da 1,25 fr. (50 sd.) jare (krom la ordinara membra kotizaĵo de U. E. A.). Ĉiuj membroj senpage ricevas la Bultenon.

INTERŜANĜISTOJ

Universala Interŝanĝa Asocio (fako de U. E. A.).

Por la kolektistoj, interŝanĝistoj, personoj dezirantaj korespondadi, estis kreita speciala fako sub la titolo *Universala Interŝanĝa Asocio.*

Ĝia celo estas plifaciligi la interŝanĝadon de korespondaĵoj, ilustritaj poŝtkartoj kaj de aliaj objektoj, kiel poŝtmarkoj, fotografaĵoj k. t. p.

Ĉiu aliĝanto je tiu fako devos subskribi specialan promeson respondi almenaŭ unufoje ĉiun peton de samfakano. (Vidu la regularon.)

La nomaro de la membroj kun ĉiuj informoj pri iliaj petoj aperas en la *Interŝanĝa Bulteno*, kiu estas senpage sendata al ĉiuj membroj.

La speciala kotizaĵo al la Interŝanĝa Fako estas 1,25 fr. (50 sd.) jare.

ESPERANTO-OFICEJOJ

Esperantia Librejo

La Universala Esperantia Librejo, kunigita kun la Cenra Oficejo de U. E. A., eldonas la publikaĵojn de U. E. A. kaj

aliajn librojn, liveras la ĉefajn esperantajn verkojn, insignojn, flagojn, k. t. p.

Esperanto-Oficejo.

En granda nombro de lokoj ekzistas ejo, en kiu oni alcentrigis ĉion, kio koncernas U. E. A. kaj Esperanton en sama regiono. Tiu loko estas nomata *Esperanto-Oficejo.*

Tiuj Oficejoj sidas ĝenerale en privataj magazenoj (librovendejoj, ĵurnalvendejoj, ŝtataj tabakvendejoj, k. t. p.). Iu en ili ĝenerale parolas Esperanton. Ĉe la fenestrego ekzistas afiŝejo, t. e. kadro aŭ kartono videbla de ekstere, sur kiu estas afiŝataj ĉiuj komunikoj ĉu al la publiko, ĉu al Esperantianoj.

En la Esperanto-Oficejo la publiko povas :

1e Aĉeti kaj mendi ĉiuspecajn propagandilojn, lernolibrojn, vortarojn, esperantajn verkojn, poŝtkartojn, muzikaĵojn, k. t. p.

2e Aĉeti, mendi ponumere, kaj aboni la ĉefajn ĵurnalojn, gazetojn, revuojn esperantistajn.

3e Aĉeti kaj mendi insignojn, jarlibrojn kaj propagandilojn de U. E. A., pinglojn, flagojn, k. t. p.

4e Ricevi informojn pri la lokaj Esperantiaj organizoj (adresoj de la Delegito kaj Konsuloj, gvidfolio, k. t. p.).

Ili estas do samtempe utilaj al la eksteresperantia publiko kaj al la Esperantianoj.

STATUTO DE U. E. A.

Akceptita la 1an de oktobro 1910. — Modifita la 1an de oktobro 1912. La Statuto estas reviziota dum 1914.

CELO KAJ PRINCIPOJ

§ 1. — Sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio* (Esperantio) estas fondita Asocio, kiu celas :

1e Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso aŭ lingvo ;

2e Krei praktikan servaron konstante uzeblan de ĉiuj homoj kaj korporacioj, kies ekonomiaj aŭ intelektaj interesoj celas trans la limoj de ilia gento aŭ lingvolando ;

3e Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco ;

4e Ellabori neŭtralan organizan fundamenton super kiu ĉiuj progresemaj homoj povos pace interkomunikiĝadi sen reciproka altrudo de siaj gentaj apartaĵoj.

§ 2. — U. E. A. estas absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.

§ 3. — La sola lingvo oficiala de U. E. A. estas la lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro.

§ 4. — Ĉi tiu statuto fiksas la fundamentan organizon de U. E. A. La aranĝo de la diversaj servoj estos difinata per regularoj ellaborotaj laŭ la formo ĉi tie priskribita.

MEMBROJ

§ 5. — La Asocio konsistas el :
Membroj aŭ Esperantianoj (jaraj aŭ dumvivaj) ;
Esperantiaj Entreprenoj (1-jaraj aŭ 30-jaraj) ;
Esperantiaj Asocioj ;
Honoraj membroj.

§ 6. — Estas membro de U. E. A. (Esperantiano) ĉiu persono, kiu akceptinte tiun statuton kaj dezirante uzi la servojn de la Asocio, elpagas jaran kotizaĵon da 2,50 fr. (1 Sm.) aŭ dumvivan kotizaĵon da 125 fr. (50 Sm.).

§ 7. — Estas Esperantia Entrepreno :

Ĉiu entrepreno, societo, gazeto, korporacio, ktp., kiu akceptinte tiun statuton kaj dezirante partopreni en la servoj de U. E. A. kiel *korporacio*, elpagas jaran kotizaĵon da 12,50 fr. aŭ tridekjaran kotizaĵon da 250 fr.

§ 8. — (Forigita laŭ voĉdonado de 1. oktobro 1912).

§ 9. — Estas Esperantia Asocio :

Ĉiu Asocio kiu plenumas la jenajn kondiĉojn :

1e Ĝia regularo ne kontraŭstaru le celon de U. E. A. formulitan en § 1 de tiu statuto ;

2e Ĉiuj ĝiaj aktivaj membroj estu Esperantianoj, laŭ ĝia regularo aŭ speciala decido.

La Esperantiaj Asocioj ne pagas kotizaĵon.

§ 10. — Estas honoraj membroj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la U. E. A. aŭ kiuj pro sia sperteco kaj morala aŭtoritateco povos doni utilajn konsilojn kaj helpon al la Asocio. Ili estas elektataj de la Komitato.

§ 11. — U. E. A. estas neŭtrala rilate al la Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj kaj neniel sin enmiksas en la agadon, kiu koncernas ilian celon.

RAJTOJ DE L'MEMBROJ

§ 12. — La organizo de la servoj estas fiksata per regularoj al kiuj devas konformiĝi ĉiuj uzantoj sub la sankcioj difinitaj en ili. Specialaj servoj povas esti starigataj por difinitaj kategorioj de membroj.

§ 13. — Ĉiu Esperantiano rajtas :

1e Uzi ĉiujn servojn organizitajn de U. E. A. neformale ezervitajn por aliaj kategorioj de membroj ;

2e Ricevi la oficialan Jarlibron de la Asocio ;

3e Plendi se li ne ricevis la servojn, kiujn li rajtas :

4e Partopreni en la balotoj fiksitaj de tiu statuto.

§ 14. — Ĉiu Esperantia Asocio kaj Entrepreno, krom la ordinaraj rajtoj de la membroj, rajtas uzi specialajn servojn difinitajn por ili ekskluzive kaj priskribitajn en la regularoj. Ili ne havas voĉdonrajton.

§ 15. — Estos eksigebla de U. E. A. :

1e Ĉiu membro aŭ Entrepreno, kiu agis kontraŭ la celo de U. E. A. aŭ en daŭra maniero ne konformiĝis al la regularoj La procedo uzota en tiu okazo estos fiksata de speciala regularo.

2e Ĉiu membro aŭ Entrepreno ne plenuminta siajn financajn devojn.

REGIONA ORGANIZO

§ 16. — La Esperantianaro estas dividata laŭ *regionoj*. La regionoj havantaj komunajn interesojn rilate al la agadkampo de U. E. A. estas kunigataj laŭ *distriktoj*. La limojn de tiuj dividoj fiksas la Centra Oficejo de U. E. A. kun la konsento de la interesatoj.

§ 17. — En ĉiu *regiono* estas Delegito kaj Vicdelegito. Ili estas balotataj de la regionaj Esperantianoj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

Tamen en la regionoj, kie estas malpli ol 20 membroj, ili estos elektataj de la Direktoro de U. E. A. por la sama daŭro.

§ 18. — La regiona Delegito havas la jenan taskon :

1e Li klopodas pri varbado de membroj, ricevas la kotizaĵojn, administras la regionan kason kaj zorgas pri ĉiuj administraj aferoj de sia regiono ;

2e Li klopodas por starigi en sia regiono la diversajn servojn organizatajn de U. E. A. ;

3e Li ricevas ĉiujn komunikaĵojn de la Centra Oficejo, zorgas pri ilia konstanta efektivigo kaj aplikado ;

4e Li reprezentas oficiale la membrojn de sia regiono, ĉu rilate al la Centra Oficejo, ĉu rilate al eksterasociaj aŭtoritatoj.

§ 19. — La Vicdelegito anstataŭas la Delegiton en la okazo se ĉi tiu ial ajn ne povas plenumi sian taskon. En la ordinara tempo la Vicdelegito helpas la Delegiton.

§ 20. — En okazo de morto aŭ eksiĝo de Delegito, la Vicdelegito informas la Centran Oficejon kaj balotigas novan Delegiton en tempolimo de du monatoj.

§ 21. — La Delegito elektas inter la Esperantianoj de sia regiono kaj sub sia respondebleco :

1e Diverslokajn helpantojn aŭ *subdelegitojn ;*

2e Diversfakajn helpantojn aŭ *konsulojn.*

§ 22. — La Subdelegitoj helpas la Delegiton por laŭeble starigi en sia loko la servojn organizatajn de U. E. A., varbi novajn membrojn kaj diskonigi la Asocion.

§ 23. — La Konsuloj havas kiel devon helpi al la starigo de la servoj, kiuj koncernas ilian fakon, kaj diskonigi la Asocion en la samfakaj rondoj.

§ 24. — En la regionoj, kie estas minimume 20 Esperantianoj, la membroj kunvenas unu fojon ĉiujare, laŭeble en novembro. Eksterordinara regiona kunveno devas ankaŭ okazi, se la Delegito aŭ 10 Esperantianoj tion deziras.

§ 25. — La regionaj kunvenoj havas la jenan taskon :

1e Ili aŭdas kaj diskutas la raporton pri la agado de la Delegito kaj liaj helpantoj ;

2e Ili ekzamenas la financan raporton de la regiona kaso ;

3e Ili esploras la diversajn proponojn de la Delegito aŭ de la membroj kaj laŭ ili fiksas la regionan agadon de la Asocio dum la venonta jaro.

La regionaj kunvenoj havas kompetentecon nur pri regionaj aferoj.

DISTRIKTA ORGANIZO

§ 26. — En ĉiu *distrikto* estas distrikta Delegito helpata de distrikta Vicdelegito. Ili estas balotataj de ĉiuj regionaj Delegitoj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

Tamen en la distriktoj, kie estas malpli ol 5 Delegitoj, ili estos elektataj de la Direktoro de U. E. A. por la sama daŭro.

§ 27. — La distrikta Delegito havas la jenan taskon :

1e Li zorgas pri la disvastigo de U. E. A. en sia distrikto kaj diskonigo de la Asocio en la lokoj kien ĝi ne ankoraŭ penetris ;

2e Li alcentrigas la raportojn de la Delegitoj kaj Konsuloj de sia distrikto ;

3e Li sendas regule al la oficiala jurnalo de U. E. A. raporton pri la stato de U. E. A. en sia distrikto ;

4e Li oficiale reprezentas la distriktajn interesojn, ĉu rilate al la Centra Oficejo, ĉu rilate al la eksterasociaj aŭtoritatoj.

§ 28. — En la distriktoj kie estas minimume 100 Esperantianoj, la membroj kunvenas unu fojon ĉiujare, laŭeble en printempo. Eksterordinara distrikta kunveno devas ankaŭ okazi se 50 Esperantianoj tion deziras.

§ 29. — La distriktaj kunvenoj havas la jenan taskon :

1e Ili aŭdas kaj diskutas la raporton pri la agado de la distrikta Delegito kaj liaj helpantoj ;

2e Ili esploras la diversajn proponojn de la distrikta Delegito aŭ de la membroj kaj laŭ ili fiksas la distriktan agadon de la Asocio dum la venonta jaro.

La distriktaj kunvenoj havas kompetentecon nur pri distriktaj aferoj.

FAKA ORGANIZO

§ 30. — Ĉiu societo kiu respondas la jenajn kondiĉojn :

1e Estas Esperantia Asocio aŭ Entrepreno ;

2e Havas fakan (profesian, idealan, filantropian) karakteron ;

3e Estas neŭtrala rilate al politiko, religio kaj nacieco ;

4e Ne limigas sian agadon al difinita teritorio ;

5e Enhavas almenaŭ 50 Esperantianojn ;

Povas elekti unu reprezentanton kaj unu vicreprezentanton.

§ 31. — Tiu reprezentanto havas la jenajn taskojn :

1e Li reprezentas oficiale sian organizaĵon rilate al U. E. A.

2e Li partoprenas en la balotoj kaj voĉdonoj priskribitaj en tiu statuto. La reprezentantoj de la fakaj organizaĵoj ne havas administran rolon.

CENTRA ORGANIZO

I. — *Komitato.*

§ 32. — La ĝenerala gvidado de la Asocio estas komisiita al *Komitato.* Gi konsistas el 10 membroj kaj 3 vickomitatanoj balotataj de ĉiuj plenrajtaj regionaj Delegitoj por 3 jaroj. Ili estas konstante reelekteblaj.

§ 33. — La komitato havas la jenan taskon :

1e Ĝi fiksas la ĝeneralan agadon de la Asocio laŭ la dezir-esprimoj de la Kongreso kaj la decidoj de la Delegitoj, konforme al § 53.

2e Ĝi difinas la organizon de la diversaj servoj kaj kontrolas ilian administradon, diskutas kaj voĉdonas la ĝeneralajn regularojn, balotas la Direktoron, la Vicdirektoron kaj fakestrojn.

3e Ĝi voĉdonas la buĝeton de la Asocio.

4e Ĝi zorgas pri la disvastigo de U. E. A. kaj pligrandigo de ĝiaj servoj.

§ 34. — La komitato balotas inter siaj membroj la Prezidanton kaj Vicprezidanton de la Asocio. Ili estas balotataj por 3 jaroj kaj konstante reelekteblaj.

§ 35. — En okazo de eksiĝo aŭ de morto de komitatano, la vakanta loko estos okupata de vickomitatano, laŭ la vico de la voĉoj ricevitaj ĉe la balotado aŭ, se voĉegaleco, laŭ la lotumo.

§ 36. — La Prezidanto reprezentas oficiale la Asocion kaj prezidas la Kongreson. La Vicprezidanto lin anstataŭas.

§ 37. — La Komitato ĉiam povas elekti inter aŭ ekster si por nedifinita tempo komisionojn pri speciala fako, servo aŭ agado. Tiuj komisionoj havas konsilan rolon.

§ 38. — La Komitato kunvenas ĉiujare antaŭ la Kongreso. Ĝi kunvenas eksterordinare se pli ol la duono de ĝiaj membroj tion postulas.

II. — *Centra Oficejo.*

§ 39. — La administrado de ĉiuj servoj estas dividata laŭ fakoj, kies nombron kaj celon fiksas speciala regularo. Ĝi estas plenumata ĉe la Centra Oficejo de U. E. A.

Tiu Oficejo sidas en Genevo.

§ 40. — La Centra Oficejo de U. E. A. konsistas el Direktoro, Vicdirektoro, Fakestroj kaj la necesaj oficistoj.

§ 41. — La Direktoro kaj Vicdirektoro estas balotataj de la Komitato por 3 jaroj kaj estas konstante reelekteblaj.

§ 42. — La Direktoro kaj Vicdirektoro ne povas esti komitatanoj, sed la Direktoro havas konsilan voĉon en la Komitato kaj iniciatrajton.

§ 43. — La Direktoro estas responda antaŭ la komitato pri la plenumo de la jenaj taskoj :

1e Li efektivigas la decidojn de la Komitato, zorgas pri la konstanta aplikado de la regularoj, kaj faras la proponojn utilajn por la disvastigo de la Asocio.

2e Li direktas la Centran Oficejon, prizorgas speciale la administradon de la Asocio kaj la fakojn ne komisiitajn al fakestroj.

3e Li komunikas kun la Delegitoj, redaktigas la oficialajn bultenojn kaj informilojn por la oficiala ĵurnalo.

4e Li prezentas ĉiujare al la Kongreso, raporton pri sia agado kaj ĉiumonate al la Komitato raporton pri la laboroj plenumataj ĉe la Centra Oficejo de U. E. A.

§ 44. — La Vicdirektoro anstataŭas la Direktoron en la okazo se tiu ĉi ial ajn ne povas plenumi sian taskon. En la ordinara tempo la Vicdirektoro helpas la Direktoron.

§ 45. — La Fakestroj estas elektataj de la Komitato laŭ propono de la Direktoro.

Ili, sub lia respondeco, zorgas pri la gvidado kaj funkciado de sia fako kaj de la dependantaj servoj. Ili komunikas pri ĝi senpere kun la Komitato, kun la specialaj komisionoj kaj la Delegitoj.

§ 46. — La oficistoj estas elektataj de la Direktoro kaj, kie estas, de la Fakestroj.

§ 47. — Por la starigo de siaj servoj, U. E. A. povas kontrakti kun eksteresperantiaj entreprenoj. La kontraktoj devas esti submetataj al la aprobo de la Komitato.

§ 48. — Ĉiuj ĝeneralaj regularoj devas esti submetataj al la aprobo de la Komitato.

Ĉiuj pure administraj regularoj devas esti submetataj al la aprobo de la Direktoro.

III. — *Kongreso.*

§ 49. — La Esperantianoj kunvenas ĉiujare en Kongreso, ĉe loko difinita de la antaŭa Kongreso.

La Kongreso havas kiel celon :

1e La ekzamenadon de la morala kaj financa situacio de U. E. A. kaj de ĝia agado dum la jaro ;

2e La esploradon de la diversaj proponoj de la komitato aŭ de la membroj;

3e Laŭ tiuj proponoj la fiksadon de la ĝenerala agado de la Asocio dum la venonta jaro.

§ 50. — La Kongreso havas la jenajn rajtojn :

a) Ĝi aŭdas la raportojn de la Direktoro kaj de la fakestroj kaj esprimas sian aprobon aŭ malaprobon pri ili ;

b) Ĝi ekzamenas la proponojn prezentitajn de la Komitato aŭ de la Direktoro, de la fakestroj aŭ de la Esperantianoj en la maniero fiksita de la Kongresa regularo, kaj voĉdonas pri ĉiu el ili motivitan dezirespriomon, ĉu por malakcepti la proponon, ĉu por ĝin resendi al la Komitato, ke ĝi efektivigu ĝin dum la venonta jaro.

DIVERSAĴOJ

§ 51. — En la ĝeneralaj balotoj kaj voĉdonoj partoprenas :

1e Ĉiuj regionaj Delegitoj, en kies regiono estas minimume 20 Esperantianoj ;

2e Ĉiuj reprezentantoj de la fakaj organizaĵoj konforme al § 31 ;

3e La komitatanoj kaj vickomitatanoj.

Ĉiu Delegito havas unu voĉon se estas en lia regiono de 20 ĝis 49 membroj ; du voĉojn se estas de 50 ĝis 99 membroj ; tri voĉojn se estas de 100 ĝis 149 membroj, k. t. p.

§ 52. — Estas submetataj al la ĝenerala voĉdono :

1e Ĉiuj ŝanĝoj en la Statuto proponitaj de la Komitato ;

2e Ĉiuj ĝeneralaj regularoj akceptitaj de la Komitato, se en tempolimo de 60 tagoj post ilia publikigo en la oficiala ĵurnalo de U. E. A., pli ol kvinono de la voĉdonrajtantoj ĝin skribe postulas;

3e Ĉiuj proponoj prezentitaj laŭ la iniciatrajto, konforme al § 53.

§ 53. — Ĉiu Delegito aŭ Reprezentanto de faka societo havas iniciatrajton : se li deziras proponi ĉu ŝanĝon aŭ aldonon en la Statuto aŭ en regularo, ĉu ellaboron de regularo pri difinita temo, li sendos sian proponon al la Direktoro de U. E. A., kiu ĝin presigos en la oficialan ĵurnalon. Se

en tempolimo de 60 tagoj pli ol la kvinono de la voĉdonrajtantoj, aprobas la diritan proponon, ĝi estos submetata al la ĝenerala voĉdonado en tempolimo de du monatoj.

§ 54. — Propono aŭ baloto valoras se ĝi ricevis la voĉojn de pli ol la duono de voĉdonintoj. Ĉiuj voĉdonoj kaj balotoj estas sekretaj kaj korespondaj. La kontrolado de la voĉoj estos efektivigata ĉe la Centra Oficejo de U. E. A. antaŭ 5 membroj de la regiono kie sidas la Oficejo.

§ 55. — La balotado de la regionaj Delegitoj, distriktaj Delegitoj kaj Komitato okazos alterne ĉiujare dum monatoj septembro kaj oktobro.

§ 56. — Ĉiuj tempolimoj fiksitaj en tiu ĉi statuto estas kalkulitaj por korespondaĵoj el Eŭropo. Por ekstereŭropaj landoj kaj lokoj kun speciale malfavoraj poŝtaj rilatoj, la Direktoro rajtas plilongigi la tempolimojn laŭ neceseco.

FINANCOJ

§ 57. — La enspezoj de U. E. A. konsistas el :

a) La kotizaĵoj de la diverskategoriaj membroj ;

b) La monhelpoj, donacoj, ktp. ;

c) La profitoj de la diversaj servoj, vendoj, ktp., farataj de U. E. A.

Por forigi eventualajn deficitojn kaj helpi al la starigo de novaj servoj, povas esti starigata garantia kapitalo, kies administrado estos fiksata per speciala regularo.

§ 58. — En ĉiu regiono estas regiona kaso de U. E. A., kies enspezoj konsistas el :

a) La 1/10 de la kotizaĵoj de la Esperantiaj Entreprenoj de la regiono ;

b) Ĉiuj monhelpoj kaj donacoj formale difinitaj por la regiona kaso. La organizo kaj kontrolo de tiu regiona kaso estos fiksata per speciala regularo.

§ 59. — La regionaj Delegitoj ricevas por pagi siajn administrajn elspezojn :

1ᵉ La 1/5 de la kotizaĵoj de la regionaj membroj.

2ᵉ La 1/10 de la kotizaĵoj de la Esperantiaj Entreprenoj de la regiono.

§ 60. — La buĝeto de la Asocio estos fiksata de la Komitato, laŭ la propono de la Direktoro kaj de la financa fakestro.

La financa jaro komenciĝas la 1ᵃᵘ de novembro.

§ 61. — La kontrolado de la kalkuloj estos farata ĉiujare, ĉe la Centra Oficejo de U. E. A., de du Delegitoj elektitaj de la Komitato.

La samaj kontrolantoj ne povas plenumi tiun oficon dum du sinsekvaj jaroj.

§ 62. — La membroj de U. E. A. ne estas persone respondaj por la ŝuldoj de la Asocio.

§ 63. — En okazo de finiĝo de la Asocio, la uzo de la restanta kapitalo estos decidata per ĝenerala voĉdono.

TABELO DE LA KOTIZAĴOJ

DIVIDO DE LA KOTIZAĴOJ	POR 1 JARO					DUMVIVA	POR 30 JAROJ	
	Membro	Subtenanto (1)	Fakano (2)	Esperantia Entrepreno (3)		Membro	Esperantia Entrepreno (3)	
Sumo sendota de la Delegito al la Centra Oficejo de U. E. A.	2 —	5 —	1 25	10 —	7 50	125 —	250 —	125 —
Restas por la Delegito.	0 50			2 50				
Wernigerode. — **Städtisches Verkehrsamt** (*Urba informejo*). — *Adr.* : 1, Nikolaiplatz. Tre konata pentrinda urbo de Harz-Montaro. Aerkuracloko. Ŝatata libertempejo de fremduloj. 8-paĝa lukse ilustrita Esp. gvidlibreto senpage. Senpere korespondas Esperante.

KOMERCAJ ENTREPRENOJ

Amsterdam. — **J.-C. Wegmann antaŭe C. Hamer.** — Plej bona holanda likvoro. Mondfama marko « Volendam ». G.-J. Laarmann & Kie. Ĝenerala reprezentanto : J.-C. Wegmann antaŭe C. Hamer.

Annonay (Ardèche) — **Laboratoire de la Panbiline.** — Fabrikado de kuracilo « Panbilin » por hepataj malsanoj.

Ansbach. — **Librejo Fr. Seybold.** — *Adr.* : 10, Karlstr. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London.

Antwerpen. — **Esperanta Ekspedicia Oficejo.** — *Adr.* : Arthur-D. Clercq, Heistraat, 48. Fondita en 1909. Marvoja kaj surtera transportoj. Antaŭfiksitaj prezoj por ĉiuj landoj.

Avignon. — E. Montagard. — *Adr.* : chemin de Bonaventure. Enportado, eksportado. Klarigitaj olivoleoj ; ĉiadevenaj oleoj. Rekomendata firmo. Akceptas reprezentantojn bone referencitajn Mendu prezaron. Tel. 3-57.

Avignon. — Rousset frères. — *Adr.* : route de Marseille. Komercistoj pogrande speciale por fruktoj kaj legomoj. Frumaturaĵoj, furaĝoj semoj de Provence. Kokosbutero. Oni korespondas esperante, germane kaj france.

Badalona (Hisp.). — Firmo Ramon Amat Pujol. — *Adr.* : Sagunto, 39. *Esperanta Likvoro*, bongusta, digestiga likvoro, distilita de alkoholoj el puraj vinoj, kaj nur vegetalaj substancoj. Botelet-specimenon kontraŭ 2 resp. kup. de la Reprezentanto : R. Teixido, Mar, 35, Badalona.

Bamberg (Germ.). — Firmo Friedrich Maurer (posed. Georg Werner). — *Adr.* : Fischstr., 3. Plej kapabla komercejo en la fakoj por koloniaj, farbaj kaj semaĵaj produktoj. Reĝa bavara kortegliveranto. Fondita en 1782.

Beaune. — Etabl. A. Billerey et Forgeot père et fils et Forgeot et Beault, fils et gendre, succ. — Grandaj vinoj de Burgonjo. Ŝaŭmanta Burgonjovino, Burgonja brando, ĉampanvino kun marko : internacia flago. Specialaj prezoj por Esperantistoj

Beaune. — Gaston Charcousset. — *Adr.* : 21, rue de Lorraine, Beaune (Franc). Burgunda ŝaŭmanta vino « Esperantio ». Postulu senpagan esperantan prezaron de ĝenerala agento : J. Pion Muller.

Berlin. — Kuracejo de Dro Breiger. — *Adr.* : Luisenstr., 51, Berlin-N. W., 6. Lumkuracado ; kuracado de l'kor- kaj nervmalsanoj. Altmontarsun-Bano, nova kuracmetodo

Berlin. — Dro Ed. Arnold. — *Adr.* : Berlin 54, 41 Lothringerstr. Ĥemia fabriko. Schottland Farbseife. Skotlanda koloriga sapo kaj ĉiuj ĥemiaj fabrikaĵoj por la mastrumo. Sendante respondkuponon reprezentantoj ricevas mian prezaron.

Berlin-Rummelsburg A. — Georg Reiner, Eisenhandlung. — *Adr.* : Marktstr., 1. Vendejo de ĉiuspecaj ferajoj, ilaroj k. t. p. Speciale poŝbruligiloj, razaparatoj kaj poŝhorloĝoj. (Esperantaj prezaroj.)

Bern. — Presejo Büchler & Kio. — Moderne organizita, precipe por nuntempaj lingvoj. Principo : gustoplene, rapide, malkare. Medalo « Gutenberg », Leipzig, 1905. Honora diplomo (plej alta mencio), Thun, 1899.

Bern. — A. Francke, Buchhandlung. — *Adr.* : Bubenbergplatz apud la ĉefa stacidomo.

Boise (Idaho). — Boise Commercial Club. — *Adr.* : Boise (Idaho), U. S. A.

Bordeaux. — Marly Fratoj. — *Adr.* : rue des Bahutiers, 14-16. Fabriko : cours de Bayonne, 213. Vitroj kaj speguloj. Kadroj. Muldaĵoj por kadroj. Orado, arĝentado, klinrandigo.

Bordighera (Italujo). — L.-A. Allavena. — *Adr.* : Bordighera. Ekspedas por kristanaj aŭ izraelidaj ritoj branĉojn de palmarbo kaj mirtelo : ankaŭ cedratojn kaj « Zamenhof » dianto-florojn.

Bordighera (Ital.). — The Bordighera Tea Rooms. — *Adr.* : Fino Eileen Daly. Teotrinkejo en belega ĝardeno. Ĉiuspecaj kukoj konfitaĵoj. Pos. : Fino Eileen Daly. Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Brighton. — Link Publishing Union. — *Adr.* : 18, Ship Street. Specialistoj pri libretoj, broŝuretoj, kartoj, tradukoj en Esperanton kaj artistaj reklamoj. Samideanoj bonvolu adresi : L. P. U. (Eldonejo « La Ligilo », 18, Shipstr., Brighton).

Brooklyn N. Y. — Ehnisa Entrepreno Esperantista. — *Adr.* : 105, Hawthorne street.

Bukarest. — Editura Esperanto. — *Adr.* : 14, Str. Belvedere. Pos. : Rum. Esp. Societo. Esperantaj verkoj (originalaj kaj tradukitaj). Lernolibroj, propagandiloj.

Chalon sur-Saône. — Anonima Societo de la Distilejo. — *Adr.* : Simon plej maljuna. Firmo fondita en 1862. Delikata Likvoro Suc Simon, konata kiel la plej digestiga. Specialeco de likvoroj el burgonjaj fruktoj. Vidu anoncon (XXIV).

Charleroi. — Presejo kaj Reklamfarejo D. Hallet. — *Adr.* : 13, rue des Bouchers. Eldonas *La Bulteno* (organo de la Centra Komerca Oficejo) kaj la Industriajn Belgajn Informilojn. Deziras en ĉiuj landoj komercajn korespondantojn.

Chatham. — W. & T. Mackay & Kio Ltd. — *Adr.* : Fair Row, Chatham, Anglujo, Presistoj de la « British Esperantist » kaj aliaj esp. eldonaĵoj. Ankaŭ presas librojn, gazetojn kaj katalogojn. Librobindistoj kaj Eldonistoj.

Châtillon. — August Nonin. — Grandaj kulturoj de grenoj, plantoj. Sortimento de krizantemoj, dalioj, diantoj, daŭremaj plantoj kaj

rozujoj. Malnova firmo konata por ekspedo al ĉiu mondparto. *Adr.* : A. Nonin, Châtillon (Seine, Francujo.

Chemnitz. — **Patentoficejo de Paul Fabian, inĝeniero.** — *Adr.* : 2, Blumenstr. Havigas patentojn por ĉiuj landoj.

Craponne-sur-Arzon. — **Union universelle pour la fabrication et la vente des véritables dentelles Cottier.** — Serĉas ĉie ajn entreprenistojn kaj desegnistojn por puntoj ; 10 % da maklerpago eksterlande. La aŭtentikaj « Puntoj Cottier » vendiĝas en ĉiuj grandaj magazenoj.

Cusset apud Vichy. — **Société des Sources d'eaux minérales du Château de la Motte.** — Societo anonima kun kapitalo da 500.000 frankoj. Societa sidejo en Lyon, 6-8, rue de la Martinière.

Danzig. — **Otto Haucisen.** — Sukerajejo, marcipanfabriko kaj kafejo. Ĉefkomercejo : Jopengasse 34-35. Filioj : Stadtgraben 10, transe de l'ĉefstacidomo. Kunvenejo de U. E. A.-anoj. En- kaj eksterlandaj gazetoj kaj « Esperanto ». Langermarkt 12 ; Langgasse 74 ; Portechaisengasse 5.

Davos-Dorf. — « **Nova** » **Act.-Ges.** — Arkitektistoj kaj inĝenieroj ! Postulu tuj senpage nian esp. katalogon. Ĝi donos gravajn helpilojn por viaj oficejoj.

Davos-Dorf. — **Naturscienca Instituto.** — *Adr.* : Dro W. Marchand, « Chalet-Paris ». Laborejo, biblioteko, fakinstruado por studi en la Alpoj.

Dijon. — **Firmo Henri Quenot.** — Specialaĵo : Cassis Quenot (Quenot Kasislikvoro), grandfama likvoro. La plej altaj premioj ĉe la universalaj ekspozicioj. Membro de la juĝantaro Paris 1900, London 1908, Torino 1911.

Dijon. — **Biscuits Pernot** (Pernotaj Biskvitoj). — Tutmonde famekonataj modelaj uzinoj, elektra movforto, higienaj laborejoj, kuracejoj, banoj, duŝoj, manĝoĉambroj, biblioteko, aerkuracadoj.

Dijon. — **Presejo Kooperativa.** — *Adr.* : 15, rue Amiral-Roussin. Luksaj laboroj, ĵurnaloj, broŝuroj, kartoj, kovertoj, k. c. Bone zorgitaj ĉiuspecaj Esp. presaĵoj.

Dijon. — **Presejo Jobard.** — *Adr.* : Place Darcy, 9. Kromo-lito-tipografio, gravurado. La plej ilaroriĉa, la plej granda en la regiono. Universala ekspozicio Parizo 1900, ora medalo.

Dijon. — **Burgonja Presejo** (*Imprimerie Bourguignonne*). — *Adr.* : 15, rue Bossuet. Eksfirmo Berthoud kaj L. Cails, J. Bernigaud, posteulo. Ĉiuspecaj preslaboroj.

Dresden. — **Porfremdula societo.** (Vid paĝ. 205.)

Dresden. — **Bankoficejo Gebr. Arnhold.** — *Adr.* : 20, Waisenhausstr. Entrepreno de ĉiuj banknegocoj. Monŝanĝo, kreditleteroj kun esperanta teksto. Korespondanto de Ĉekbanko Esperantista. Oficejo de Societo Esperanto Dresden.

Dresden. — **Seidel & Naumann A.-G.** — *Ideal*-skribmaŝino por forta uzado en oficejoj. Erika-skribmaŝino por vojaĝoj, memuzado de scienculoj, k. t. p. Ambaŭ maŝinoj posedas Esperanto-signojn.

Dresden. — **Vereinigte Eschebach' sche Werke Aktiengesellschaft.** — *Adr.* : Dresden-N., Radeberg i/Sa. kaj Aussig i/B. Fabrikoj de banaparatoj kaj -fornoj, bidetoj kaj ĉambroklosetoj, varmig- kaj malvarmigŝrankoj, gas- kaj petrolkuiraparatoj, iloj por domo kaj kuirejo, emajlitaj kaj aluminiaj kuriloj, transporteblaj kuirfornoj por karb- kaj gashejtado.

Dresden — « **Jca** » **Aktiengesellschaft.** — *Adr.* : Dresden, 21. Plej granda kaj plej malnova fabriko por konstruo de fotoaparatoj kaj kinematografoj en tuta Eŭropo. Katalogoj senpage. Vidu la anoncon (XIII).

Dresden. — **Ader & Borel G. m. b. H.** — *Adr.* : 40, Struvestr. Unu el la plej grandaj firmoj por Esperanta eldonado kaj vendado de Esperantaj verkoj ĉiuspecaj. Eldonas la duonmonatan gazeton « Germana Esperantisto » (pojare Sm 2,40).

Dresden. — **E. Neumann & Kio.** — *Adr.* : Kaiserstr., 5. Plej granda fabriko de *Esperanto-Insignoj*, flagetoj kaj flagoj, dekoraciaĵoj, kotilonaĵoj kaj bal-artikoloj. *Specialaĵoj : Maskaj kaj karnavalaj kostumoj por esperantistoj. Humorplenaj teatraĵoj en Esperanto.* Katalogoj en germana, esperanta, angla, franca kaj hispana lingvoj senpage kaj afrankite.

Dresden. — **Firmo August Leonhardi.** — *Adr.* : Antonstr., 29. Inkoj kaj kolor- rubandoj Elpensinto de la fama, en la tuta mondo uzata « *Alicirin* » skrib- kaj kopi-inko.

Dresden. — **Kolorfabrikoj E. T. Gleitsmann.** — *Adr* : Dresden. Fabrikoj en Dresden, Wien, Budapest, Turin, Trelleborg. Diversaj koloroj kaj nigraj koloroj por ĉiuj branĉoj de la grafika metio.

Dresden. — **Dresdener Medaillen-Münze, Glaser & Sohn.** — *Adr.* : Borngasse, 5. Fabrikejo de artaj medaloj, gravuraĵoj ĉiuspecaj. Fabrikado de la oficialaj esp. insignoj. Vidu anoncon (XLIX).

Dresden-Hellerau. — **Dalcroze lernejo.** — *Adr* : Hellerau-Dresden. Instruas la *metodon Jaques Dalcroze. Ritma Gimnastiko- Solfeĝo-*

Improvizacio- al junaj sanaj homoj kiel sukcespromesantan profesion porvivan. Prospektoj senpage kaj afrankite.

Eastbourne. — V.-V. Sumfield. — *Adr.* : Station street. Presisto de ĉiuspecaj presaĵoj : Folietoj, katalogoj, gvidfolioj, k. t. p. Presado en Esperanto speciale priatentata.

Edinburgh. — Café Royal, Ostra bufedo kaj drinkejo. — *Adr.* : 17, West Register Str. Ostroj, omaroj, kankroj, salatoj, viandbulkoj, vinoj, alkoholaĵoj kaj bieroj, britaj kaj alilandaj lageraj je glacio. 1 minuto de la ĉefa stacidomo.

Edinburgh. — J. & H. Lindsay Ltd. — *Adr.* : 18, South, St. Andrew Str. Vaporŝip-, fervoj- kaj turist-agentoj. La plej malnova skota firmo. Aranĝo de skotaj, anglaj kaj irlandaj plezur- vojaĝoj. Ŝanĝo de fremdaj moneroj.

Egnach. — Maŝinfabrikejo Walther Schmied. — *Adr.* : Egnach (Thurgau, Svisujo). Patentitaj seloj kaj forkoj por bicikledoj kaj motorcikledoj, forigantaj la skuojn per speciala risortsistemo. — Rotaciaj kompresoroj, pumpiloj por aŭtomobiloj, gumtuboj, kaj aliaj specialaĵoj de preciza meĥaniko.

Elberfeld. — Uhlhorn & Klussmann. — *Adr.* : Elberfeld. Fabriko de vestaĵoj por knaboj kaj viroj, de manteloj kaj bluzoj por knabinoj kaj virinoj. Eksportado. Plej malkaraj prezoj.

Elberfeld. — Wicküler-Küpper-Brauerei A. G. — Ĉiujara vendado de ĉirkaŭ 250.000 hektolitroj. Biereksporto pogrande en boteloj, lignaj kaj feraj bareloj laŭ propra patentita sistemo al ĉiuj landoj de la tero. Bierdeponejoj en : Berlin, London, Paris, Baltimore, Cairo, Calcutta, Hongkong, Adelaide, Habana, Buenos-Aires, Capetown.

Ems. — Rudolf Eisfeller. — *Adr.* : Ems. Forsendas direkte Emsajn akvon, pastelojn, salojn, ankaŭ eksterlanden. Prezaroj kaj broŝuroj pri Emsaj fontaj produktaĵoj estas senpage riceveblaj.

Erlangen kaj Bamberg. — H. Henninger-Reifbräu A.-G. — Plej granda eksporta bierfabriko de Erlangen. Helaj kaj malhelaj bieroj. Plej grandaj premioj. Eksporto ĉiulanden.

Fay-aux-Loges. — G. Sigot. — Farmaciaj specialaĵoj. Esperantine, tizano el dolĉaj floroj, refreŝiga, laksiga, sangpuriga (Sm. 0,40 la skatolo afrankite). Gozolithine (Lithinés Esperanto) por gasa akvo

anstataŭanta profite mineralajn akvojn (Sm. 0,60 por boteloj). Petu senpagajn specimenojn kaj prospektojn.

Genève. — Universala Esperantia Librejo. — *Adr.* : 10, rue de la Bourse. *Dir* : H. Hodler. Oficiala Librejo de U. E. A. vendas ĉiujn eldonaĵojn kaj speciale tiujn de U. E. A. *Adr.* : Fay-aux-Loges (Loiret, Francujo).

Grasse (Francujo). — Café Monte Carlos, Sro Bonnin. — *Adr.* : boulevard Jeu-de-Ballon.

Grenoble. — Firmo A. Ploussu. — *Adr.* : 6, rue Lafayette. Vestoj por Sinjoroj kaj knaboj. Drap- kaj ĉemizvendejo. Gamaŝbendoj. Specialaĵo : Drapoj el kamelharoj, plej praktikaj por gesinjoraj manteloj. Vidu anoncon (XXV).

Gummersbach. — L. u. C. Steinmüller. — Fabrikejo por Steinmüller-kaldronegoj kun akvotuboj kaj superhejtigiloj, aŭtomataj kradoj : antaŭvarmigiloj (Economiser), akvopurigiloj, mezuriloj de fluidaĵoj kaj instalo de kompletaj akvokondukoj kun alta premo.

Hannover. — Günther Wagner. — Fabrikoj en Hannover kaj Wien. Fabrikaĵoj : Pelikan-Inkoj, desegnaj inkoj, skribrubandoj por ĉiuj maŝinsistemoj, karbopaperoj, fluidaj gluiloj, stampilaj kolorkusenoj, artistfarboj. Vidu la anoncon (XXI).

Hannover. — H. Bahlsen's Cakes-fabrik. — Fabriko de Cakes (Leibniz-Cakes), sukeraĵoj, konfitaĵoj, k. a.

Horsens. — Rud. Kramper & Jörgensen — Fabrikantaj aŭtomobilojn, *Diesel-* kaj akvogasmotorojn, multfoje premiitan motoron *Gideon* por ĉiaj uzoj. Plej ekonomia kaj fidinda, uzanta benzinon, petrolon aŭ krudoleon. Vidu anoncon (XLVII).

Horsens. — Paasch & Larsen, Petersen Ltd — Fabriko de ĉiuj laktejaj maŝinoj, pasteŭriloj, malvarmigiloj. Kombinitaj buteriloj kaj knediloj. Kremkuvegoj, laktpumpiloj, pesiloj. Vidu anoncon (XXII).

Horsens. — Emil Möller. — Fabriko de telefoniloj. Vidu anoncon (XXII).

Kairo. — Dro Henriko Ŝipek. — *Adr.* : Heliopolis, Oazo. Fakisto por internaj malsanoj de infanoj kaj plenkreskuloj. Indikacioj : nefrito, bronnito, malsanoj de koro, podagro, reŭmatismo, sifiliso, astmo, ftizo kronika en komenco, eksudatoj, neŭralgioj, rekonvalescenco. Loĝejo kaj nutraĵo 8 fr. tage. Somere la instituto estas en Luhačovice, Moravio.

Krakow. — « Ksiegarnia polska » de Frederik Ebert. — *Adr.* : Florijanska str. 35. Literaturo esp. kaj ĉiunacia. Gvidlibroj kaj geografiaj kartoj por turistoj, ciklistoj, aŭtomobilistoj. Poŝtkartoj kaj eldonaĵoj de polaj kaj alinaciaj artistoj.

Kristiania — Patentoficejo Klingenberg. — *Adr.* : 18III, Dahlsgade. Pos. : Sro Brjnjulf-Klingenberg. Plej malgranda enpago : patentoj Sm. 19,26 kaj 13,76. Komercaj markoj Sm. 24,76 ; modeloj, Sm. 8,00 ; tradukoj, Sm. 0,991 centvorte.

Langnau. — Internacia Instituto por Knaboj. — *Adr.* : Langnau, Emmenthal (Bern, Svisujo). Belega situacio ; saniga aero ; longaj ludejoj. Zorga edukado kaj instruado. Korpoflego, sporto, 1a grada, 2a grada kaj supera lernejo. Preparo por gimnazio kaj universitato. Esperanto. *Dir.* : Pro J. R. Camenzind.

Le Creusot. — Société coopérative de consommation « L'Epargne ». — *Adr.* : 18-20, rue Decize. Atente ekzamenos la vendproponojn al ĝi faritajn ; vendadas vinojn, sukeron, kafon, likvorojn, pastojn, ŝtofojn, ladobjektojn, k. t. p. Katalogojn (esp.) oni sendu al Sro Galoisy, 23, rue Hoche, francajn al la sidejo.

Le Havre. — Havra Esperanto Komercejo. — *Adr.* : 7, rue Hélène, Le Havre (Francujo).

Leipzig-Grosszschocher. — Dro Th. Horn. — Konstruisto de elektraj mezuriloj, rapidecanonciloj, registriloj, kalkuliloj, distancmezuriloj por aŭtomobiloj, taksometroj por flugmaŝinoj kaj militŝipoj. Liveranto por en- kaj eksterlandaj registaroj.

Letchworth. — Garden City Press Ltd. — *Adr.* : Letchworth, Herts. Anglujo. Presistoj de libroj kaj katalogoj kaj ceteraj, per ordinaraj kaj litografaj metodoj. Speciale ekipita por presigi ĉiajn eldonaĵojn en Esperanto. Ĉefestro : B. Williams.

Limoges — M. Jové. — *Adr.* : 26, place de la Motte. Eldonas la plej artan kolekton ekzistantan de pejzaĝoj (fotografaĵoj) sur poŝtkartoj. Teksto esperanta aŭ franca, aliaj lingvoj laŭ peto.

London. — Eustace Miles Proteid Foods Limited. — *Adr.* : 40, Chandos Str., Charing Cross, W. C. « Emprote », ideala nutrajo saniga, pli bona ol viando ; por ricevi senpagan specimenon kaj higienan konsilon, skribu : Eustace Miles, M. A.

London E. C. — Presejo Josiah Briscoe. — *Adr.* : 18-22, Bannerstr. Bunhill Row E. C. Generalaj ordinaraj presistoj. Libroj, programoj, biletoj, komercaj verkoj k. t. p. en angla lingvo kaj Esperanto.

London. W. — Carew & Carew. — *Adr.* : Oxford str., 137. Tajloroj altgradaj por viroj kaj virinoj. La trancada fako estas persone zorgata de Sro Ch. Carew. Vizitantoj al Londono ricevos specialan atenton. Vidu reklamon (XIV).

London E. C. — F. Mildner & Kio. — *Adr* : 140, Clerkenwell Road. Esperantistaj presistoj. Specialaĵo : libroj kaj katalogoj presitaj en Esperanto. Presistoj de *Esperanto Manual*.

London E. C. — Burroughs Wellcome & Kio. — *Adr.* : Snow Hill Buildings. Fabrikistoj de bonegaj produktaĵoj vendataj sub la komercnomoj « Tabloid », « Soloid », « Kepler », « Hazeline », « Vaporole », « Wellcome », k. t. p. Kuracilaroj por vojaĝantoj.

London. W. — Holden Fratoj. — *Adr.* : 3, Harewood Place, Oxford Street. Bot-fabrikistoj. Solaj fabrikistoj de « naturformaj » botoj, ŝuoj kaj ŝtrumpaĵoj, kaj de anatomiaj, higienaj kaj kuracigaj botoj. Vidu anoncon (XV).

London E. C. — Thos. Cook & Son. — *Adr.* : Ĉefoficejo Ludgate Circus. Elpensintoj de plezurvojaĝoj. Turist-, vaporŝip- kaj ekspedagentoj, bankistoj, k. t. p. Filioj en la tuta mondo. Vidu anoncon (XXX).

London W. C. — J.-M. Dent & Sons LTD. — *Adr.* : Bedford Street. Eldonistoj de la fama angla libraro « Everyman ».

London E. C. — G.-B. Kent & Sons, Ltd. — *Adr.* : 75, Farrington Road. Fabrikistoj de plej bonaj britaj brosoj ĉiuspecaj. Fondita 1777. Fabrikejoj en Londono kaj Melbourne. — Agentejoj ĉie.

London S. W. — Davis-Perrett Ltd. — *Adr.* : Caxton House, Westminster. Konsultaj inĝenieroj Specialaĵo : Elektra akvo-senoleiga kaj akvopuriga maŝinaro, por utiligi la akvon por boligil-uzado.

London E. C. — E. Marlborough & Kio. — *Adr.* : 51, Old Bailey. Edonistoj de la fama « Self-Taught » (Mem-Instrua) serio de eŭropaj kaj orientaj lingvoj. Vidu anoncon pri lernolibroj kaj frazlibroj (XVI).

London W.-C. — Steads Publishing House. — *Adr.* : Bank Buildings, Kingsway. Eldonistoj de vortaroj, angla-esperanta, kaj esp.-angla, kaj aliaj esp. verkoj ; de la revuo *Review of Reviews* kaj de la Libretoj por la infanetoj.

London E -C. — Hawes Fratoj, tajloroj kaj vestaristoj. — *Adr.* : 17, Farringdon Street, Ludgate Circus. Vizitantoj al Londono, kiuj deziras sin bone vesti je modera prezo, ricevos nian specialan atenton. Viraj kostumoj de 25 Sm. Paltoj de 20 Sm.

Lübeck. — Georg-F. Klefe. — *Adr.* : Poŝtfako, 51. Eksportoficejo kaj kreditinformejo. Ekspedoj al nordaj landpartoj. Specialaĵoj : produktoj de kamparaj devenoj, bonegaj fruktvinoj, industriaĵoj, k. t. p. Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Lyon. — Esperanto-Oficejo. — *Adr.* : Sino FARGES, 36, rue Victor-Hugo. Informejo por Esperantianoj. Centra propagandejo. Librejo, abonejo por ĉiuj ĵurnaloj. Eldonejo de propagandaj poŝtkartoj kaj silkaj flagetoj. Konsulejo de U. E. A.

Lyon. — Henri Leroudier. — *Adr.* : 20, chemin de la Scaronne. Diversaj hemiaj produktaĵoj por ĉiuj industrioj (devenaĵoj de gudro, gravaj industrioj, tinkturejoj, k. c.). Fabrikado, deponado, reprezentado.

Lyon. — Thimonnier & Kio. — *Adr.* : 21, rue Terme — (Fondita en 1830 de B. Thimonnier, elpensinto de la kudromašino). Fabrikado kaj vendado de kudromašinoj, brodmašinoj, trikmašinoj, bicikletoj, motocikloj k. c. Bicikletoj « Superior », kudromašinoj « Neva ».

Manchester. — Swiss Embroidery & Lace Mnfg. Co Ltd. — *Adr.* : 89-91, Rusholme Road. Fabrikas ĉiuspecajn mašinbrodaĵojn. Specialaĵo : Broditaj kitolpecoj kaj roboj laŭ la plej moderna stilo, sur anglaj štofoj. Petu informojn kaj prezojn.

Marseille. — Société des Codes télégraphiques, G. Lugagne. — *Adr.* : 19, rue de la Darse. Vidu anoncon (XXVI).

Moskvo. — Libroeldonejo « Posrednik ». — *Adr.* : 36, Arbato, 4 Testov. Celadas vegetarismon, kontraŭalkoholismon, kooperativismon, pedagogiajn idealojn, plibonigon de popola terkulturado ; eldonis jam 2.000 diversajn presaĵojn (3.000.000 ekz. jare). Revuoj : porinfana *Majak* (Lumturo) kaj *Libera Edukado.*

Moskvo. — Librejo « Esperanto ». — *Adr.* : Lubjanskij proezd, 3. Havante ĉiam provizon de diverslandaj esp. eldonaĵoj por pli ol 60.000 frankoj (Sm. 24.000) la Moskva Librejo senprokraste liveras kiun ajn esp. libron. Katalogo (20-paĝa) estas sendata senpage. Filio en Peterburgo, Nevskij, 110.

Moskvo. — R. Köhler & Kio. — Apotekaj, ĥemiaj kaj fotografaj objektoj. Unu el plej grandaj magazenoj kun filioj en Saratov, Vladivostok, Peterburg, Nižni-Novgorod, Simbirsk.

Moskvo. — Mahler & Jackiewicz. — *Adr.* : Krivokolennij, 5. Interesiĝas pri ĉiuj teknikaĵoj, koncernantaj vaporkaldronegojn kaj tubokondukojn por superhejtigita vaporo.

München. — Jos. Sedlmayr, Brauerei zum Franziskanerkeller (Leistbräu). — *Adr.* : A.-G., 7, Hochstr. Rekomendas tre bongustajn eksport-bierojn, helajn kaj malhelajn. Eksporto en bareloj kaj en boteloj ĉiulanden en la mondo. Plej altaj premioj.

Nancy. — Daum frères. — *Adr.* : Verreries de Nancy. Artvitraĵoj kaj kristalaĵoj de Nancy. Vazoj. Elektraj lampoj. Ĝenerala magazeno (deponejo) en Parizo, 32, rue Paradis.

Nancy. — Librejo kaj papervendejo Victor Berger. — *Adr.* : 13, rue Saint-Georges. Ĝeneralaj libroj. Verkoj kaj revuoj esperantistaj.

Nice. — Société des fleurs de Nice (Societo de la Nicaj floroj). — *Adr.* : 27, rue Lamartine. Eksportado de floroj. Korboj « Esperanto » printempa : 2 Sm. Lazura marbordo : 4 Sm. Select Nicea : 6 Sm. Riviera : 8 Sm. Sendo afranke kontraŭ poŝtmandato.

Orel-Smolensk. — Orel-Smolenska Borsa Kompanio. — *Adr.* : 2 Posadskaja, 19, Basov, por O.-S. Birjevaja Artel. Proponas siajn anojn por respondecaj oficoj : libroteniistojn, kontoristojn, kasistojn magazen-, dom-, deponej-, administrantajn komizojn kaj ceterajn.

Paris. — Presa Esperantista Societo. — *Adr.* : 33, rue Lacépède. Liveras librojn, insignojn, poŝtkartojn, ĵurnalojn kaj ĉiujn esperantaĵojn ; liveras ankaŭ je plej favoraj kondiĉoj ĉiujn francajn verkojn.

Paris. — Centra Presejo Esperantista — *Adr.* : V. Polgar, 33, rue Lacépède. Entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj en nacilingvoj kaj Zamenhofa Esperanto. Fondita en 1904.

Paris. — Louis Menand. — *Adr.* : 52, avenue Parmentier, Paris-X., Petas en tuta Francujo agentojn je maklera profito por reklamado administra monopoligita, ĉiaj reklamaj objektoj kaj kalendaroj.

Peterburg. — Rus-esperanta eldonejo Petro Stojan. — *Adr.* : Geslerovski, 23-24. Eldonas vortarojn kaj lingvajn verkojn ; ankaŭ slipojn en mondformato. Ĉekbanka konto.

Peterburg. — **Ed. Kühne.** — *Adr.* : 1, Gorohova. Vendejo de kaŭĉukaĵoj kaj vojaĝobjektoj.

Pozsony (Hungario). — **E.-M. Barna.** — Sola fabrikejo de patentitaj Elfenit'ujoj por ĵurnaloj. Kafejoj kaj hoteloj, ilin uzantaj, gajnas milojn da Spesmiloj, per reklamoj sur ilin aplikeblaj. Petu specimenojn.

Bad-Reichenhall. — **Fritz Mayerhauser.** — *Adr.* : 1, Gradirhausstr. Esperanto-Propagando-Entrepreno. Specialaĵo : Esperanto- Portretoj, kolekt-albumoj k. t. p. — Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista. Vidu la anoncon (XXXIV).

Saumur. — **Vidvino Amiot.** — *Adr.* : S. Hileire, S. Florent (Franc). Grandaj ŝaŭmantaj vinoj. Komercaj markoj : « Carte bleue », « Military » kaj « Crémant du Roi ».

Saumur. — **Gratien & Meyer.** — *Adr.* : Beaulieu-les-Saumur (Franc). Grandaj ŝaumantaj vinoj « Kastelo de Beaulieu ». La firmo akceptas agentojn ĉie kie ĝi ne estas reprezentata.

Saumur. — **Balme kaj filoj.** — *Adr.* : 117, boulevard Richard-Lenoir, Paris. Fabrikejo de rosarioj, medaloj kaj religia juvelaro.

Terrasson (Franc.) — **M. Fleury de la Ruelle.** — Trufoj el Perigord kaj vinoj el Bordeaux'a regiono; grandega ŝparo; oni sin turnu rekte al la bienposedanto. Speciala rabato por mendoj skribitaj esperante. *Adr.* : Terrasson (Dordogne, Francujo).

Toulouse. — **F. Laveran.** — *Adr.* : 11, rue Caffarelli. Cedorajtigito : 1° de l'Internacia Telegrafa Kodo Lugagne; 2° de l'Ideala Datilo « Kalendor » patentita en Francujo kaj aliaj landoj. Li eldonos en 1914 belan esperantistan kalendaron.

Trencsén. — **Unua fabriko por Juniperbrando kaj Likvoro (Akcia Societo).** — *Adr.* : Trencsén, Hungarlando. Rekomendas veran juniperprun-brandon, likvorojn. Eksporto de Juniperoleo. Proponoj senpage.

Trento. — **Basilio Travaglia.** — Eksportisto pogranda de terkulturproduktaĵoj. Specialaĵoj : poŝtpakaĵoj de fruktoj tre rekomendindaj por societoj kaj hoteloj. Oni korespondas esperante, itale, germane kaj france. *Adr.* : Trento (Tirol, Aŭstrio).

Weinböhla-Dresden. — **Chemische Fabrik Richard Schubert & K^io^. G. m. b. H.** — Fabriko de nemiaj kaj farmaciaj preparaĵoj. « Rino » ŝmiraĵo, mondkonata. Klarigoj en 15 lingvoj.

Wernigerode-Harz (German.). — **Bergmann & K^io^.** — Fabriko de ĉiuspecaj fotografpaperoj kaj-poŝtkartoj bezonataj de fakuloj kaj amatoroj. Specimenoj senpage. Aĉeto per la vendejoj.

Wiesbaden. — **D^ro^ M. Albersheim.** — *Adr.* : 38, Wilhelmstr. Fabrikejo de noblaj parfumoj; specialmagazeno por ĉiuj tualetobjektoj en arĝento, testudŝelo, eburo, celulojdo, kristalo, en- kaj eksterlandaj parfumoj kaj sapoj.

Wiesbaden. — **Paul Heinrich, arbkulturejo.** — *Adr.* : Wiesbaden, Wellritztal. Kulturejo kaj eksporto de frukt-, ale- kaj ornamarboj kaj arbetaĵoj. Rozoj- kaj semkulturoj. Oni vidu la anoncon (XXVIII).

LEONARD ROMANZEWSKI

INDEKSO

DE LA

KOMERCAJ ESPERANTIAJ ENTREPRENOJ

LAŬ

SPECIALECO

Agentejoj, maklerado :

Brooklyn Ny. — Ebnisa Entrepreno Esperantista.
Chemnitz. — Patentoficejo de Paul Fabian.
Kristiana. — Patentoficejo Klingenberg.
Le Havre. — Havra Esperantista Komercejo.
Orel-Smolensk. — Orel-Smolenska Borsa Kompanio.
Paris. — Louis Menand
Toulouse. — F. Laveran.

Agrikulturo :

Châtillon. — Auguste Nonin.
Terrasson. — M. Fleury de la Ruelle.
Trento. — Basilio Travaglia.
Wiesbaden. — Paul Heinrich.

Asocio :

Boise. — Boise Commercial Club.

Banaparatoj :

Dresden. — Vereinigte Eschebach'sche Werke, Akt.-Ges.

Banko :

Dresden. — Gebr. Arnhold.

Bierfarejoj :

Elberfeld. — Wicküler-Küpper-Bierfarejo.
Erlangen. — H. Henninger-Reifbräu A.-G.
München. — Jos. Sedlmayr, Brauerei zum Franziskanerkeller (Leistbräu), A.-G.

Botoj :

London. — Holden Fratoj.

Brodaĵoj :

Craponne-sur-Arzon. — Union universelle pour la fabrication et la vente des véritables dentelles Cottier.
Manchester. — Swis Embroidery & Lace Mnfg. Co Ltd.

Brosoj :

London — G.-B. Kent & Sons Ltd.

Dekoraciaĵoj :

Dresden. — E. Neumann & Kio.

Eksportoficejoj :

Lübeck. — Georg-F. Klefe.
Trento, — Basilio Travaglia.

Eldonejoj :

Brighton. — Link Publishing Union.
Bukarest. — Editura Esperanto.
Dresden. — Ader & Borel G. m. b. H.
Genève. — Universala Esperantia Librejo.
London. — J.-M. Dent & Sons Ltd.
London. — E. Marlborough & Kio.

London. — Steads Publishing House.
Marseille. — Société des Codes télégraphiques, G. Lugagne.
Moskvo. — Librejo « Esperanto ».
Moskvo, — Libro-eldonejo « Posrednik ».
Peterburg. — Rus-esperanta eldonejo Petro Stojan.
Paris. — Presa Esperantista Societo.

Ferajoj :

Berlin-Rummelsburg. — Georg Reiner.

Floroj :

Bordighera. — L.-A. Allavena.
Châtillon. — Auguste Nonin.
Nice. — Société des fleurs de Nice.

Fotografado :

Limoges. — M. Jové.
Reichenhall (Bad). — Fritz Mayerhauser.

Foto- aparatoj, -artikoloj, kinematografoj :

Dresden. — « Ica » Aktiengesellschaft.
Wernigerode. — Bergmann & Kio.

Ĥemio kaj farmacio :

Berlin. — Do Ed. Arnold.
Fay-aux-Loges. — G. Sigot.
Lyon. — Henri Leroudier.
London. — Burroughs Wellcome & Kio.
Moskvo. — R. Köhler & Kio.
Weinböhla. — Chemische Fabrik Richard Schubert & Cie. G. m. b. H.

Inkoj kaj koloriloj :

Dresden. — August Leonhardi.
Dresden. — E.-F. Gleitsmann.
Hannover. — Günther Wagner.

Institutoj, lernejoj :

Davos-Dorf. — Naturscienca Instituto.
Dresden. — Dalcroze-lernejo.
Langnau. — Internacia Instituto por knaboj.

Kafejoj :

Edinburgh. — Café Royal.
Grasse. — Café Monte Carlos.

Kuracado :

Annonay. — Laboratoire de la Pambiline.
Berlin. — Kuracejo de Dro Breiger.
Cusset apud Vichy. — Société des Sources d'eaux minérales du Château de la Motte.
Ems. — Rudolf Eisfeller.
Fay-aux-Loges. — G. Sigot.
Kairo. — Dro Henriko Ŝipek.

Librejoj :

Ansbach. — Fr. Seybold.
Bern. — A. Francke.
Dresden. — Ader & Borel G. m. b. H.
Genève. — Universala Esperantia Librejo.
Krakow. — « Ksiegarmia polska » de Frederik Ebert.
Lyon. — Esperanto-Oficejo, Sino Farges.
Moskvo. — Librejo « Esperanto ».
Nancy. — Victor Berger.
Paris. — Presa Esperantista Societo.

Likvoroj (Vidu : *Vinoj kaj likvoroj*).

Medaloj, insignoj :

Dresden. — Dresdner Medaillen-Münze, Glaser & Sohn.
Dresden. — Neumann & Kio.

Nutrado :

Avignon. — E. Montagard.
Avignon. — Rousset frères.
Bamberg. — Firmo Friedrich Maurer (posed. G. Werner).
Bordighera — The Bordighera Tea Rooms
Cusset apud Vichy. — Société des Sources d'eaux minérales du Château de la Motte.
Dijon. — Biscuits Pernot.
Hannover. — H. Bahlsen's Cakesfabrik.
Le Creusot. — Société coopérative de consommation « L'Epargne ».
London. — Eustace Miles Proteid Foods Ltd.
London. — Burroughs Wellcome & Kio.
Terrasson. — M. Fleury de la Ruelle.

Parfumoj :

Weisbaden. — Dro M. Albersheim.

Patentoj :

Chemnitz. — Patentoficejo Paul Fabian.

Presejoj :

Bern. — Büchler & Kio.
Charleroi. — Presejo kaj reklamfarejo D. Hallet.
Chatham. — W. & T. Mackay & Kio Ltd.
Dijon. — Presejo Jobard.
Dijon. — Presejo Kooperativa.
Dijon. — Burgonja Presejo.
Eastbourne. — V.-V. Sumfield
Letchworth. — Garden City Press.
London. — F. Mildner & Kio.
London. — Presejo Josiah Briscoe.
Paris. — Centra Presejo Esperantista.

Puntoj :

Craponne. — Puntoj Cottier.

Reklamo :

Charleroi. — Presejo kaj reklamfarejo D. Hallet.

Religiaj objektoj :

Bordighera. — L.-A. Allavena.
Saumur. — Balme kaj filoj.

Semaj produktoj :

Bamberg. — Friedrich Maurer.

Skribmaŝinoj :

Dresden. — Seidel & Naumann.

Sukerajoj :

Danzig. — Otto Haucisen.
Hannover. — H. Bahlsen's Cakesfabrik.

Teknikaj iloj, maŝinoj :

Davos. — « Nova » Act.-Ges.
Egnach. — Maŝinfabrikejo Walther Schmied.
Gummersbach. — L. u. C. Steinmüller.
Horsens. — Rud. Kramper & Jörgensen.
Horsens. — Paasch & Larsen, Petersen.
Horsens. — Emil Möller.
Leipzig-Grosszschocher. — D^ro^ Th. Horn.
London. — Davis-Perrett Ltd.
Lyon. — Thimonnier & K^ie^.
Moskvo. — Mahler & Jackiewicz.
Pozsony. — E.-M. Barna.

Transportoj :

Antwerpen. — Esperanta Ekspedicia Oficejo.

Turismo, vojaĝado :

Antwerpen. — Esperanta Ekspedicio Oficejo
Edinburgh. — J. & H. Lindsay Ltd.
London. — Thos Cook & Son.

Vestado :

Elberfeld. — Uhlhorn & Klussmann.
Grenoble. — A. Ploussu.
London. — Hawes fratoj.
London. — Carew & Carew.
Manchester. — Swiss Embroidery & Lace Mnfg. C^o^ Ltd.

Vinoj, likvoroj :

Amsterdam. — J.-C. Wegmann antaŭe C. Hamer.
Badalona. — Firmo Ramon Amat Pujol.
Beaune. — Etabl. A. Billerey et Forgeot père et fils.
Beaune. — Gaston Charcousset.
Chalon-sur-Saône. — Anonima Societo de la Distilejo.
Dijon. — Firmo Henri Quenot.
Saumur. — Vidvino Amiot.
Saumur. — Gratien & Meyer.
Terrasson. — M. Fleury de la Ruelle.
Trencsen. — Juniperbrando kaj likvoro.

Vitrajoj :

Bordeaux. — Marly Fratoj.
Nancy. — Daum frères.


Vojaĝobjektoj :

Petersburg. — Ed. Kühne.

VIZITU MORAVION !

Moravio estas unu el plej riĉaj, plej belaj kaj plej gastemaj landoj en Aŭstrio. Ĝi enhavas multnombrajn vidindaĵojn por turistoj kaj vizitantoj el fremdlando

Historiaj konstruaĵaj kaj artistaj memorindaĵoj. Antikvaj kasteloj kaj palacoj : arĥitektura perlo, kastelo **Pernštýn**, kasteloj **Bítov, Buchlov, Vranov**, k. t. p. Ruinoj de la kasteloj : **Boskovice, Cornštejn, Zubštýn, Helfštýn**. k. t. p.



Mondkonata abismo **Macocha**. Subteraj mirindaĵoj de la **Moravia Kras'o**. La grotoj **Kateřinská** kaj **Punkevní**, kiuj egalas per sia grandiozeco kaj beleco al la grotoj en Postojna. Malnova groto de **Mladeč** apud **Litovel**, memorindaj montoj **Praded, Radhošt, S. Hostýn** (kie estis venkitaj Tataroj) k. t. p.

Luksegaj naciaj kostumoj slovakaj, kun kiuj nenio kaj nenie povas konkuri. La regiono « **Valašsko** » kun pentrindaj pejzaĝoj, ĉarmaj kostumoj kaj kvieta popolo. La benita « **Haná** », antikvefama **Velehrad**, banurboj **Luhačovice, Teplice** apud **Hranice**, k. t. p.

En la jaro 1914 estos aranĝita granda nacia ekspozicio : **Hanácko-Valašská.**

Por ĉiuj informoj rilate al vizito de Moravio turnu vin al adreso :

Český zemský svaz pro povznesení návštevy cizinců na Moravě a ve Slezsku

BRNO, Velké námestí č. 30, **Moravio (Aŭstrio).**

"COOK'S TOURS"

Vojaĝoj pere de Cook ĉirkau kaj tra la mondo

Sendependaj biletoj. — La biletoj de Cook estas utiligeblaj ĉie en la mondo, por la simplaj aŭ la plej kompleksaj vojaĝoj, kaj donas specialajn facilaĵojn rilate al interrompo de vojaĝo kaj portado de pakaĵoj. Biletposedantoj povas ricevi informojn kaj konsilojn de la agentoj kaj reprezentantoj, kaj utiligi la oficejojn de la firmo por sia korespondado. Interpretistoj ĉeestas la ĉefajn stacidomojn kaj havenojn.

Inkluziva sendependa vojaĝo. — La plej perfekta vojaĝo estas atingebla per tiu metodo. La biletposedanto vojaĝas tute sendepende, sed ĉiu detalo antaŭe estas aranĝita, kaj ĉiu elspezo praktike antaŭsciigita. Skribu por klariga libreto.

Interpretistoj ĉe la ĉefaj stacidomoj.

Mara vojaĝo. — Ĉiuklasaj transiraj biletoj estas vendataj je la plej malkaraj prezoj al aŭ de la Unuigitaj Ŝtatoj, Kanado, Sud-Afriko, Hindujo, Aŭstralio, Nov-Zelando, ankaŭ al Ĥinujo, Japanujo, al ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉirkaŭ la mondo.

Pakaĵoj kaj Komercaĵoj. — La firmo Cook kolektas, asekuras, teneje konservas kaj forsendas ĉiujn specojn de pakaĵoj kaj komercaĵoj.

Bankado kaj monŝango. — Fremdaj moneroj estas ŝanĝeblaj je la plej bonaj kondiĉoj; rondiraj notoj kaj kreditleteroj eldonataj, kaj kablaj ĝiroj farataj.

Hotelkuponoj estas eldonataj je fiksitaj prezoj, kaj utiligeblaj ĉe *pli ol 2,000 hoteloj.*

THOS. COOK & FILO, LUDGATE CIRCUS LONDON

Elpensintoj de la tutmonda sistemo de plezurvojaĝoj. Fondita 1841.

Filiigita al U. E. A.

OFICEJOJ ĈIE EN LA MONDO

TEKNIKA LERNEJO MITTWEIDA

Reĝlando Saksujo

DIREKTORO : Prof. A. HOLZT



Altgrada teknika instituto

POR INSTRUIĜO EN LA

Elektrotekniko kaj en la Tuta Maŝinkonstruado

Apartaj studplanoj por elektro = inĝenieroj, maŝin = inĝenieroj, kontor = kaj laborej = teknikistoj kaj laborestroj de elektrotekniko kaj maŝinkonstruado. Riĉe provizitaj, elektroteknikaj kaj pormaŝinaj eksperimentejoj. **Instrufabrikaj laborejoj** por instruado al praktikantoj kaj lernantoj (3,000 kvadratmetroj da surkonstruita terspaco).

Okaze de ĉiuj ekspozicioj, en kiuj ĝis nun partoprenis la *Teknika Lernejo Mittweida* aŭ ĝiaj laborejoj de precizeco, oni ricevis **eminentajn premiojn**. Industria kaj metia ekspozicio PLAUEN : la ekspozicia medalo de la urbo PLAUEN « por eminentaj laboroj ». Industria kaj metia ekspozicio LEIPZIG : la « reĝa Ŝtatmedalo por eminentaj laboroj en teknikaj instruaferoj ». Industria ekspozicio ZWICKAU : « la ora medalo ». Internacia Universala Ekspozicio LIÈGE : « Prix d'honneur » (honora premio).

Plej malnova kaj plej multe vizitata instituto

Enskriboj de lernantoj en **aprilo** kaj **oktobro**

Programo kaj jarraporto de la instituto, same ankaŭ pli detalaj informoj estas riceveblaj senkoste de la

SEKRETARIEJO de la TEKNIKA LERNEJO MITTWEIDA

FRANCUJA UNIVERSITATO

La Urbo SAUMUR *posedas tri grandajn lernejojn por edukado kaj instruado duagradajn, belege lokitajn sur monteto staranta super la Loire.*

GRANDAJ PARKOJ — VASTAJ KORTOJ — HIGIENO KAJ KOMFORTO

1° **KNABINA LERNEJO**

Beletristika, scienca kaj praktika edukado

La plej pura lingvo el la tuta Francujo

Sin turni al Sino DIREKTORINO *de la Knabina Lernejo,* **SAUMUR** (Maine-et-Loire), **Francujo.**

2° **KNABA LERNEJO**

Plenaj kursoj de duagrada instruado

3° **INDUSTRIA KAJ KOMERCA LERNEJO**

Preparanta al la Lernejo de artoj kaj metioj,
Kaj senpere al la industriaj situacioj,
Kaj al la situacioj de la Komerco, de la Banko kaj Administrado.

Sin turni al Sro DIREKTORO *de la Industria kaj Komerca Lernejo,* **SAUMUR** (Maine-et-Loire), **Francujo.**

NICE **P.-L.-M. PALACE-MEUBLÉ,** KAJ CONFORT HOTEL
60, avenue de la Gare, *proksime de la stacidomo.*
Malfermita la tutan jaron. — En la ĉambroj varma kaj malvarma akvo. — Banĉambroj — Centra hejtado. — Lifto. — Poŝt- kaj telegrafoficejo ĉe la pordo de l'hotelo. — **Moderaj prezoj.** — **Rabato por la Esperantistoj.**
A. LATTÈS, Posedanto.

★ **LA ĜARDENURBO LETCHWORTH**

Ĉiu samideano kiu veturas Anglujon nepre devas viziti la interesegan belan ĝardenan urbon Letchworth.

Kuŝas nur 53 kilometroj de Londono
50 minutoj vagonare. — 75 geesperantistoj enloĝantaj.

FABRIKO DE KORKŜTOPILOJ

Specialkorkoj por farmaciistoj, eksporto ĉiulanden.
Korespondas Hispane, Esperante, Angle kaj France.
V. ROURICH & Co, SAN FELIU DE GUIXOLS (Hispanujo)

SPECKURACAĴOJ en- kaj eksterlanden. Dro RUSKALLEDA, farmaciisto, O. K. Ero., San Feliu de Guixols (Hispanujo).

TABAKVENDEJO kaj poŝtkartoj ĉiuspecaj, ilustritaj; Arturo VICENS, calle Gerona, 14, San Feliu de Guixols (Hispanujo).

Esperanto-Presejo F.-Emil BODEN
G. M. B. H.
DRESDEN, *Pirnaische Str., 41*
Liveras ĉiujn presaĵojn en Esperanto kaj ĉiuj naciaj lingvoj.

Ĉio esperanta mendebla ĉe
ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO
31, Rue de Clichy, **PARIS**

FRANCA STUDENTO

Premiita ĉe Esperanta konkurso Michelin, deziras en Anglujo aŭ Germanujo familian restejon aŭ oficon dum somera libertempo. Instruas laŭdezire francan kaj germanan lingvojn. Ĉeestos la Dekan Kongreson.
Gaston LELARGE, 44, rue de la Cathédrale, **POITIERS** (Vienne), Francujo

Kiel ĝuste komenci ŜANĜON de NUTRAĴO

Facile, Spareme, Ĝueble kaj Sukcese

Skribu al **EUSTACE MILES, M. A.**

Ĉe 40, Chandos Street, Londono, W. C.

por BELA BROŜURO, SENPAGA KAJ AFRANKITA

Se vi havas iajn specialajn **malfacilaĵojn aŭ malsanojn**, skribu al Sro Eustace MILES pri ili, kaj marku la koverton « Privata kaj Persona ». Kiam ajn vi estas en Londono, ĉiam manĝu ĉe la Restoracio Eustace Miles, en Chandos Street, Charing Cross, Londono.

VILA'O ESPERANTO

Fremdula kaj familia pensiono

WERNIGERODE-HARZ (Centra German.)

Bismarckstr., 24

Vera esperantista hejmo. Libertempejo en plej ĉarma regiono de Harz-Montaro. Detalaj prospektoj je demando.

Gesroj NEURATH *Esperantia Entrepreno*

FACILA, EFIKA, ĈARMA, AMUZIGA, ĜOJIGA

ESPERANTO-PROPAGANDO !!!

Ĉiu Propagandisto,

Ĉiu Korespondanto,

Ĉiu Kolektanto,

bonvolu tuj postuli la novan, interesan prospekton de

Fritz MAYERHAŬSER

BAD-REICHENHALL (GERMANUJO)

RESTORACIO KAJ HOTELO RAIMBALDI

NICE

21, Boulevard Raimbaldi, 21

apud la stacidomo P.-L.-M.

CENTRA HEJTADO **ELEKTRA LUMO**

Pensiono de fr. 7. — Aranĝoj por familioj.

HOTELO MURLA

Ĉiu moderna komforto

sonorileto, elektra lumo en ĉiuj ĉambroj, lego-salono, manĝo-salono kun solaj tabletoj, manĝo-ĝardeno.

MASTRO : **Miguelo MURLA**

Rambla Vidal, **SAN FELIU DE GUIXOLS (Hispanujo)**

Oni parolas Angle, France, Germane, Hispane kaj Esperante.

CALAIS

BUFEDO KAJ HOTELO TERMINUS

BELEGA MODERNA HOTELO

Apud la maro, en la stacidomo. Famaj vinoj kaj manĝajoj : pensiono.

Sub la sama direktado :

BUFEDO KAJ HOTELO CENTRAL

TRE KOMFORTA

En la stacidomo Calais-Ville kaj en la centro de la urbo. **Mezaj prezoj.**

ĈIUJ GESAMIDEANOJ

kiuj trapasos **NICE** **(Francujo)**, *iru al la*

KAFEJO TERMINUS

Antaŭ la stacidomo P.-L.-M.

Vi trovos tie jurnalojn, sciigojn pri **Esperanto**. *Vi estos bone akceptataj de la estro* **Sro BAILET**, V.-Presidanto de la Nicea Grupo.

Oni parolas Esperante.

NENIU BEZONO DE KURACILOJ KUN GLICERINO

LA CLYSMA PERREIN

Reprezentata tie-sube laŭ ĝusta dimensio



REGISTRIGITA TIPO

Ebligas enkonduki la glicerinon en la rektumon po la malgranda dozo de tri gramoj, **kaj la ago tuj efikas.**

Tre rekomendata por la akušintinoj kaj la infaneloj

FARMACIEJO PERREIN

SAUMUR (Maine-et-Loire), Francujo

Prezo : 2 fr. por la publiko (0.80 Sm.)

Por la Kuracistoj, Akušistinoj kaj Farmaciistoj : **1 fr. 15** (0.42 Sm.)

Refreŝigejo " ANKER "

en la Balta marbanejo

HENKENHAGEN apud KOLBERG

Renkontejo por ĉiuj vivreformemuloj

DIREKTANTA KURACISTO : Dro med. Wilhelm WINSCH

Specialajo : Varmokulturo

Vidu la broŝuron de Dro WINSCH :

Pri Varmokulturo (per varmo al sano)

Prezo afrankite : Sm. 0,700

PROSPEKTO SENPAGE PER LA DIREKCIO

Oni parolas France, Germane, Ruse kaj Esperante.

4ª PARTO

STATISTIKAJ kaj TURISMAJ INFORMOJ

ĜENERALAJ RIMARKOJ

En la sekvantaj paĝoj, niaj membroj trovos utilajn informojn statistikajn, komercajn kaj turismajn pri ĉiu lando (*). La artikoloj, verkitaj de kompetentaj enlanduloj laŭ la plej freŝaj statistikaj dokumentoj, enhavas la jenajn rubrikojn : surfaco, loĝantoj, lingvoj, religioj, registaro, armeo, instruado, ekonomio, monsistemo, mezuroj, poŝto, fervojoj, navigado, dogano, turismo, hoteloj.

Niaj membroj trovos en tiuj artikoloj praktikajn informojn, kiuj, speciale pri poŝtoj, fervojoj kaj turismo, estas malfacile kune riceveblaj, krom en teknikaj kaj karaj verkoj. Ili utilos ne nur al la vojaĝantoj, kiuj ilin uzos por la ellaborado de taŭga vojaĝplano en plej favoraj kondiĉoj, sed ankaŭ al la personoj, kiuj deziras havi je sia dispono facile legeblajn informojn pri tiu aŭ alia lando, sen bezono konsulti diversajn tro specialajn librojn.

Esperantiaj hoteloj.

La servo de la Esperantiaj hoteloj estas organizata sur jena bazo : en ĉiu granda aŭ mezgranda urbo la Delegitoj

(*) Aperas en tiu eldono artikoloj pri ĉiuj Eŭropaj kaj Nord-Amerikaj landoj. Artikoloj pri la ceteraj landoj aperos en la venonta eldono.

elektis mezgradan hotelon kun prezo fiksita de ni inter certaj limoj. La hotelisto pagas nenion, kaj la Delegito promesas nenion alian ol rekomendi ĝin al ĉiuj Esperantianoj.

Principe ni celas: la unuecon de komforto en ĉiuj niaj hoteloj, la unuecon de la prezoj interne de unu lando, kaj internacian unuecon, koncerne la forigon de la malagrablaj flankaj devigoj altrudataj al la hotela gasto, kiel trinkmonoj, mendo de manĝaĵoj aŭ trinkaĵoj, specialaj pagoj por lumigado, k. t. p. Enketo farita de ni montris la malfacilecon de l'tasko, sed samtempe ankaŭ la grandan meriton, kiun U.E.A. povas akiri, se ĝi serioze okupiĝas pri tiu problemo. Konforme al niaj principoj ni komencis modeste, nin okupante nuntempe ĉefe pri la elekto de taŭgaj hoteloj, kaj provizore akceptante inter certaj limoj la diversecon de la prezoj kaj aliaj kondiĉoj, eĉ en la sama lando. Ni esperas, ke la spertoj el tiu ne perfekta sistemo, aranĝotaj diskutoj pri la ĝeneralaj demandoj, raportoj kaj enketoj kolektotaj ĉe aliaj gravaj asocioj, k. t. p., donos al ni kun la tempo la necesan forton kaj aŭtoritaton por ke ni povu krei modelan servon adaptitan al la deziroj de l'internacia vojaĝantaro.

* * *

Por la elekto de la hotelo la Delegitoj ricevis la jenajn instrukciojn:

1e Ĝi estu proksime de l'ĉefa stacidomo aŭ de l'centro de l'urbo. Gi estu pura kaj ĉiurilate rekomendinda.

2e La prezo valoru por unu persono dum unu nokto kaj rajtigu al plena uzo de la ĉambro sen hejtado.

3e La ĉambro estu el la bonaj de l'hotelo: la fenestro rigardu al strato, ĝardeno aŭ granda korto tiel ke oni havu sufiĉe da lumo kaj aero; kiel mebloj troviĝu en ili almenaŭ lito, noktotablo, lavtablo, seĝo, kaldrono por la malpura akvo kaj spegulo; ĉio estu pura. Hotelo kun banĉambro, elektra lumo, skribočambro kaj lifto estas preferata.

Nedevigo al matenmanĝo estas dezirinda, precipe por vojaĝantoj, aŭ en landoj kie la matenmanĝo estas pli malmultekosta en kafejo ol en hotelo. Tamen, ĉar la ricevitaj respondoj montras tre grandan diversecon, ni estis devigitaj fiksi la jenajn regulojn:

En Britujo, Hispanujo, Portugalujo, Grekujo oni citis la prezon kun la matenmanĝo. En la listo tio estas montrata per la vorteto *Mat.* metita antaŭ la prezo.

En la aliaj Eŭropaj landoj, precipe la centre lokitaj, ni citis unue la prezon de l'ĉambro sen matenmanĝo, kaj la prezon kun matenmanĝo nur se: *a*) estas nekutime aliloke matenmanĝi kaj se do mankas kafejoj por tio; *b*) se la ĉambro ne estas havebla sen tio; *c*) se la ĉambra prezo por nematenmanĝanto estas plialtigata, ĉar la hotelisto alkalkulas la ne faritan gajnon. Laŭeble ni cetere evitis tiajn hotelojn.

Por kelkaj lokoj konataj kiel restadejoj aŭ libertempejoj ni ankaŭ indikis la prezon de la ĉambro *kun* pensiono potage (*Pens.*).

La hoteloj, kie oni parolas Esperanton, estas montrataj per *Esp.* En la aliaj, Esperanto *ne* estas parolata.

En kelkaj hoteloj la mastro bonvolis konsenti rabaton al niaj membroj, kvankam ni ĝenerale ne petis similan favoron. En tiuj okazoj la rabato estas montrata inter krampoj, post la prezo.

Al la adresoj de la hoteloj ni aldonis — kie tio estis ebla — la adresojn de la senalkoholaj aŭ vegetaraj restoracioj, kiuj utilos al niaj abstinentaj aŭ vegetaranaj membroj aŭ simple al tiuj personoj, kiuj ilin preferas pro iliaj higienaj profitoj. Ofte la senalkoholaj restoracioj estas malfacile troveblaj, dum la alkoholaj estas multaj. En niaj listoj la vorteto *Rest.* montras senalkoholan restoracion; la vorteto *Veg.* montras, ke ĝi estas nur vegetara, t. e. ne vendas viandon. Se en sama urbo, estas kelkaj tiaj restoracioj apartenantaj al sama kompanio ni citis nur la kompanion (Ekz. *Lloyds Company* en Anglujo), kondiĉe ke tio sufiĉos por trovi iun pere de urbano.

* * *

Por ĉiu lando ni citis ĉiujn iom gravajn urbojn.

El kelkaj ni ĝis nun ne ricevis respondon de nia Delegito

pri elekto de hotelo. En aliaj ni ne ankoraŭ havas Delegiton. Tamen, por ke niaj listoj estu kompletaj ni por tiuj lokoj *provizore citis sen respondeco* la hotelojn speciale rekomendatajn de Turing-Kluboj kaj respondantajn al niaj kondiĉoj. *En la listo tiuj hoteloj estas montrataj per la signo* *.

* * *

Ni tre petas ĉiujn niajn membrojn, ke ili bonvolu :

1e Kiel eble plej multe viziti la Esperantiajn hotelojn dum vojaĝo ;

2e Konigi al la mastroj de tiuj hoteloj, ke ili alvenis dank'al la enskribo en nia Jarlibro ;

3e Informi la Delegiton aŭ la Centran Oficejon de U. E. A. pri ĉiuj malkorektaĵoj okazintaj dum la restado aŭ pri ĉiuj eraroj trovitaj en niaj listoj.

Nur dank'al la kunlaborado de niaj membroj, ni povos atingi iom post iom pliboniĝon de nia hotela servo kaj ĝian adaptiĝon al la deziroj de la plimulto de la Esperantianoj.

MALLONGIGOJ

ĉ.	= ĉambro.	n.	= naskiĝis.
EE.	= Esperantia Entrepreno.	pens.	= pensiono.
gf.	= gvidfolio.	pk.	= poŝtkartoj.
int.	= internacia.	pres.	= presaĵoj.
j.	= jaro.	r.	= regas de.
kl.	= klaso.	rest.	= restoracio senalkohola.
let.	= leteroj.	t.	= tuno.
maks.	= maksimumo.	veg.	= vegetara.
mat.	= kun matenmanĝo.	Esp.	= Esperanto parolata.
min.	= minimumo.		

La nomoj de la hoteloj presitaj kursive estas tiuj de Esperantiaj Entreprenoj (**E. E.**)

AŬSTRIO-HUNGARIO

Surfaco. — *Tuta Imperio :* 676.665 km². *Aŭstrio :* 300.232 km² (Galicio, 78 532 ; Bohemio, 51.967 ; Moravio, 22.231). *Hungario :* 325.324 km² (Kroatio-Slavonio, 42 534). *Bosnio-Hercegovino :* 51.109 km².

Loĝantoj. — *Tuta Imperio :* 51.390.000 (76 po km²). *Aŭstrio :* 28.570.000 (Galicio, 8.026 000 ; Bohemio, 6 770.000 ; Moravio 6.222.000). *Hungario* : 20.886.000 (Kroatio-Slavonio, 2.622.000). *Bosnio-Hercegovino :* 1.898.000.

Lingvoj. — *Aŭstrio :* Slavaj, 60 % (ĉeĥa, 23 % ; pola, 16 % ; rutena, 13 % ; slovena, 4 % ; serbo-kroata, 3 %) ; germana, 35 % ; itala, 3 % ; rumana, 1 % *Hungario :* magiara, 47 % ; slavaj, 26 % (serbo-kroata, 15 % ; slovaka, 10 % ; rutena, 2 %) ; rumana, 15 % ; germana, 10 %. *Bosnio-Hercegovino* : Slava (serbo-kroata), 66 % ; turka, 32 %.

Religioj. — *Aŭstrio* : Rom-katolikoj, 91 % ; hebreoj, 4 % ; grek-katolikoj, 2 % ; protestantoj, 2 %. *Hungario :* Rom-kat., 51 % ; prot., 19 % ; ortodoks., 15 % ; grek-kat., 10 % ; hebreoj, 4 %. *Bosnio-Hercegovino :* ortodoks (serboj), 43 % ; mahomedanoj (turkoj), 32 %, kat. (kroatoj), 23 %.

Registaro. — *Tuta imperio :* Aŭstrio-Hungario konsistas el la ŝtatoj aŭstria kaj hungara, kunigitaj per la persono de la monarko kaj 3 komunaj ministroj (eksterlandaj, militaj, financaj). Imperiestro-reĝo : Francisko-Jozefo Ia (n 1830, r. 1848). La komunajn aferojn ĉiujare pritraktas Delegacioj (120 anoj, elektataj po 60 de la aŭstria, po 60 de la hungaria parlamentoj). *Aŭstrio :* Parlamento : ĉ. de Sinjoroj (anoj dumvive elektataj de Imperiestro aŭ rajtigitaj laŭ naskiĝo) ; ĉ. de Deputatoj (516 anoj, universala baloto, 6 j.). *Hungario* : Parlamento : ĉ de Magnatoj (nun 400 anoj, dumvivaj aŭ rajtigitaj laŭ naskiĝo kaj reĝa elekto) ; ĉ. de Deputatoj (453 anoj, 5 j.) Ambaŭ ŝtatoj konsistas el kronlandoj (ekz. Bohemujo, Galicio, Stirio) havantaj proprajn parlamenton. Apartan situacion ŝtatrajtan posedas en Hungario Kroatio-Slavonio kaj en Aŭstrio Bohemio. *Bosnio-Hercegovino* estas administrata de la financa ministerio kaj havas reprezentantaron.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 385.000. Dum milito : 1.872.000 Militservo parte 2 j., parte ankoraŭ 3 j. Absolventoj de mezaj lernejoj 1 j. *Mara :* 1.330 kanonoj, 15.000 homoj. *Aera :* 2 aerŝipoj.

Instruado. — 8 universitatoj en Aŭstrio (5 germanaj, 2 polaj, 1 bohema), 3 en Hungario (2 magiaraj, 1 kroata), 7 teknikaj lernejoj (4 germanaj, 2 bohemaj, 1 pola), multaj mezlernejoj (gimnazioj, realaj lernejoj kaj realaj gimnazioj), pedagogiaj, juristaj akademioj (en Hungario), akademioj de belartoj (en Wien, Praha, Krakow), agrikultura (Wien), 3 veterinaraj (Wien, Lwow, Budapest), minakademioj, milita akademio, milita mar-akademio, altaj lernejoj komercaj (en Hungario), komercaj akademioj, multaj lernejoj industriaj, komercaj, metiaj kaj aliaj fakoj. — Universitata gf. en Innsbruck.

Ekonomio. — Aŭstrio-Hungario estas lando plejparte agrikultura (tritiko precipe en Hungario). Brutedukado en Hungario (porkoj, ĉevaloj, kortbirdoj). Industrio ĉefe nordokcidente en bohemaj landoj, pro natura riĉeco (karbo, mineraloj) kaj kulturado de industriaj vegetaloj (sukerbeto, lupolo, hordeo). Fero (Bohem., Stirio), petrolo (Galicio). Industrio : sukero, biero (Bohem.), alkoholo (Galicio), muelejo (Hungar.). Vitro, porcelano (Karlsbad), mebloj (Hungar., Moravio), muzikiloj, ledaĵoj (Wien), k. t. p. Importo, 2 404.000 K. ; eksporto, 3.191.000. Komerca ŝiparo : 325 ŝipoj kun 114.000 t.

Monsistemo. — Monunuo : 1 krono (41 Sd) = 100 heleroj. Biletoj : 10, 20, 50, 100, 1.000 K. Oraj moneroj : 10, 20 K. Arĝentaj : 1, 2, 5 K. Nikelaj : 10, 20 heleroj. Bronzaj : 1, 2 hel. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Interna afranko : let. kaj leterkartoj 10 h. ĝis 20 gr., pk. 5 h., pres. 3 h. ĝis 50 gr., 5 h. ĝis 100 gr., 10 h. ĝis 250 gr., 20 h. ĝis 500 gr., 30 h. ĝis 1.000 gr. — Telefono : por 3 min. 20 h. en pli grandaj urboj, inter urboj, 60 h. ĝis 3 K. — Telegrafo : 6 h. por vorto min. 60 h. Poŝtmandatoj pageblaj hejme, int. mandatoj kaj respondkuponoj. Ŝparkaso (interezo 3 %, spezoj en ĉiu poŝtoficejo. Antaŭpeto necesa por depreno de mono). Markoj aĉeteblaj en laŭvola kvanto ĉe ŝtataj tabakvendejoj.

Fervojoj. — 47.000 km. En Aŭstrio duone, en Hungario 5/6 ŝtataj. Prezo po km. sur ŝtataj linioj : de 1-400 km., 1ª kl., 9 hel. ; 2ª kl. 5 hel. ; 3ª kl. 3,5 hel ; de 401-600 km. 8,5 ; 5 ; 3 ; post 600 km. 4,5 ; 4 ; 2. Ir- reiraj biletoj, nenia rabato, valoras 3 tagojn. Ĉe somerekskursoj por ekskursaj lokoj ir-reiraj biletoj, daŭro 24-48 horojn, rabato sufiĉe grava. Plia alpago por rapid-vagonaro. Specialaj biletoj : *a*) kombinitaj int. kuponoj laŭ kontrakto kun aliaj ŝtatoj ; *b*) abonoj por 1 aŭ pli da ŝtatfervojaj direktoj, min. 250 K., 150 K., 100 K. ;

c) 15-30 tagaj abonoj por la ĉirkaŭaĵo de Wien, Salzkammergut-, Tauern-, Sudalpoj, nordokcid. kaj nordorient. Bohemio, Elbe-, Iser-, Riesen-montaro, Sudetoj, Okcid-Orient-Galicio. Prezo : 15 tagoj, 1ª kl. 62 K., 2ª kl. 43 K., 3ª kl. 24 K. ; 30-tagoj, 93, 62, 38 K. ; *d*) speciala takso por societoj (20 % por pli ol 30 personoj, 50 % por pli ol 100), laboristoj veturantaj al laborcelo aŭ reen, flosistoj, lernantoj, soldatoj, kongresoj, k. t. p. Infanoj ĝis 4ª j. ne pagas, de 4 ĝis 8ª j. la duonon. Interrompo de l'vojaĝo ebla 1 fojon. Kontrolo de la biletoj je la en- kaj eliro, kaj en la vagono. Eniro sur la kajojn sen vojaĝbileto 20 h. Senpage estas kunprenebla manpakaĵo ; la resto iras en la pakvagonon. 3,50 K. por 100 kgr. po km. Bicikletoj (neenpakitaj) pagas 8 hel. po 10 kgr. Pakaĵrestejo 10 h. po tago kaj pakaĵo. 3ª kl. ĝenerale rekomendinda sed ne rajtigas al manĝovagono ; diversaj rapidvagonaroj ne havas ĝin.

Ŝtataj veturiloj en ĉiuj regionoj ne atingeblaj per vagonaro. Ŝtataj poŝtomnibusoj, aŭtomobiloj, ĉefe en Tirolo (Dolomitoj).

Navigado. — Vaporŝipoj sur Danubo, sur la aliaj ĉefaj riveregoj kaj sur la lago Balaton. Ĉefaj marhavenoj Trieste, Fiume (ĉefa linio Trieste-Brindisi-Aleksandrio). Komerca ŝiparo : 1.800 ŝipoj kun 400.000 t.

Dogano. — Severa pri valizoj ; persona traserĉado preskaŭ neniam okazas, krom ĉe personoj suspektindaj. Permesite havi por propra bezono aŭ 10 cigarojn aŭ 25 cigaredojn aŭ 35 gr. da fumtabako aŭ ĉion kune, ĉiu portas kvanton por si mem, kvalito konforma al la personeco. Plue toleratej estas manĝaĵoj kaj kuraciloj bezonataj dum la vojaĝo kaj ĉio alia ĝis 25 gr. aŭ en kvanto al kiu respondas la imposto malpli granda ol 10 h. Bicikletoj venantaj el eksterlando pagas po 60 K. aŭtomobiloj laŭ pezo ; mono rericevebla ĉe eliro. Membroj de certaj societoj rajtas liberan eniron. Tiuokaze estas necesa legitimacio, priskribo de la maŝino kaj plumba marko.

Turismo. — Somera sezono de junio ĝis septembro. Vintraj sportoj kaj turismo en Tirolo, Semmering, Sudetoj, Karpatoj, Tatra. Marbanejoj ĉe Adriatiko. Famaj kuraclokoj. Multaj turistoficejoj donas informojn kaj eldonis diverslingvajn gvidlibrojn. Fotografado en muzeoj ne permesata. Vojoj bonaj por cikloj kaj aŭtomobiloj. Multaj vojmontriloj de turistaj kluboj. — Esp. gf. en Bozen-Gries, ĉ. Budejovice, Jindrichuv Hradec, Kladno, Praha, Prostejov, Rožnov. Esp. gvidlibroj : Pejzaĝoj Aŭstriaj kaj Novaj fervojoj tra Aŭstrio (eldonitaj de la aŭstria ministerio por fervojoj), Bosnio-Hercegovino, Budapest, Franzensbad, Graz, Krakow, Praha.

Hoteloj. — Komfortaj kaj ĝenerale puraj se la prezo superas 2.50 Kr. por ĉambro. Elektra lumo ĉefe en urboj. Veturiloj apud la stacidomoj escepte en la urbegoj. Matenmanĝo ne enkalkulata en

la prezo de la ĉambro Prezoj de l'manĝoj enhavas nek prezon de trinkaĵoj nek panon. En kelkaj lokoj oni postulas almenaŭ unufoje manĝi en la hotelo. En ĉiu granda hotelo oni parolas fremdajn lingvojn. En urboj reprezentantinoj de societoj por protektado de junulinoj Post ĉiu elspezo trinkmono da 5-10 %. Ne estas kutimo doni en la hotelo al la mastro mem por la tuta servistaro ; sufiĉas doni al botpurigisto 20 h. kaj ankaŭ al ĉambristino. En la urboj oni kutime fermas je 10 h. vesp. ; post tiu tempo oni pagu al la pordisto 10-20 h. por la malfermo. En la ĉefaj hoteloj oni ĝenerale parolas germane, krom la enlandaj lingvoj, kaj kelkafoje ankaŭ france. R. Hromada, Praha ; Sos, Del Wien ; S. Rudnicki, Del. Krakow ; A. de Zsigmond, Del. Sopron.

Esperantiaj hoteloj

Arad. — Hot. Fehér Kereszt. — 3,50 Kr.
Bozen-Gries. — Hot. Walther von der Vogelweide, Waltherplatz. — 2,50 Kr
Brno (*Brünn*). — Hot. Slavia, Solnouredni ul. — 2,40 Kr.
— Rest. « Freya », Orelska ul., 10. — Veg.
Budapest. — Pensiono Wüsztner, IV. Váci utca 40. — Esp.
— Rest. Alkoholmentes ès Vegetarianus Ethezde, IV. Kiraly utca, 35-37 — Veg.
Capodistria — Albergo trattoria Sartorio. — 2 Kr.
Debreczen. — Hot. Angol Királynö, Kossuth. — 3 Kr.
Dubrovnik (*Ragusa*). — Hôtel de la Ville, Gundulicev trg. — 3,50 Kr.
Eger (Hungar) — Kaszinó szálloda, Széchenyi utcza. — 2,50 Kr.
Graz. — Hot. Kaiserkrone, Färbergasse, 6. — 2,50 Kr.
— Rest. Alkoholfreies Speisehaus, Bischofplatz, 1.
Innsbruck. — Hot. Habsburger Hof, Museumstr. — 3 Kr.
Kolomea. — Bahra Hotel Bristol, Jagiellonska, 3. — 2,25 Kr.
— Rest. Danylo Sluzar, Narodnyj Dim. — Lakt.
Kolozsvár. — Hot. « New-York » szalloda, Jókai utca, 1 — 3 Kr.
Krakow. — *Hotel Belvedere*, Str. Basztowa, 27. Komforta kaj elegante meblita hejmo por esp. vojaĝantoj, proksime de la stacidomo ; elektra lumo, banejo, prezoj malaltaj. — Esperanto parolata. E. E.
— *Hotel de France*, Str. Pijarska. Unuaranga hotelo, komforte kaj higiene aranĝita. Restoracio, kafejo, lifto. En ĉiu ĉambro telefono, varma akvo, vekigilo. Ĉambroj de 3 kronoj. E E.
— Rest. Vegetara « Przyroda », Krzyzia, 7. — Veg.
Linz. — Hot. Erzherzog Karl. — 2 Kr.
Lwow (*Lemberg*). — Hot. Sans-Souci, ul. Szajnocky, 3. — 3 Kr.

— Rest. de « Schweitzer », ul. Czarneckiego, 4. — Veg.
Meran. — Hot. de l'Europe, Habsburgerstr. — 2 Kr.
Nowy Sacz. — Hot. Imperial, Jagiellonska, 14. — 2 Kr.
Pozsony (*Presburg*). — Hot. Deak, Stefania str., 7. — 3 Kr.
Praha. — Hot. Viktorie, Jungmannova, 18 — 2,50 Kr.
— Rest. Hedvika Burešova, Konviktská, 15. — Veg.
Presburg. — Vidu *Pozsony*.
Prostejov. — Grand Hotel, Palackého str. — 2,50 Kr.
Puj (*Hünyad*). — Vadászkurt — 2,50 Kr
Ragusa — Vidu *Dubrovnik*.
Riva. — Hot. Imperial. — 2-4 Kr. ; Pens. 8 Kr. (5-10 %). — Filio en *Arco* (kuracloko).
Salzburg. — Hot Krone, Getreidegasse, 8. — 2 Kr.
— Milch Trinkhalle, Marktgasse, 3. — Lakt.
Sopron — Pannonia, Várkerület. — 3,50 Kr.
Spalato. — Hot. Bellevue, Piazzale Marmont. — 4 Kr.
Szolnok. — Nemzeli Hot., Szapáry. — 4 Kr.
Trento. — Hot Bristol. — 2,50 Kr. ; Pens. 8 Kr.
Trieste — Hot. Metropole, via San Nicolo, 22. — 2,50-3,50 Kr.
Warnsdorf. — Hot. Börse, Marktplatz. — 2 Kr.
— Rest. Reformspeisehaus, Humboldtgasse. — Veg. Esp.
Wien. — Hot. Wandl, I Am Peter, 9. — 3 Kr.
— Vegetarisches Speisehaus, I Judenplatz. — Veg.
Zara (Zadar). — Grand Hotel. — 3 Kr.

BELGUJO

Surfaco. — 29.455 km² (kulturebla 92 %). 9 provincoj kun 41 distriktoj. Kolonioj : 2.382.800 km².
Loĝantoj. — 7.516.730 (255 po km²). Kolonioj : 15.000.000.
Lingvoj. — Duone franca, duone flandra.
Religioj. — Katolika ; 50 000 protestantoj, 15.000 hebreoj.
Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Alberto I^a (n. 1875, r. 1908). 10 respondaj ministroj. Parlamento : Ĉ. de la reprezentantoj (186 anoj senpere elektataj, 4 j.) ; Senato (120 anoj, 8 j.). Cefurbo : Bruselo.
Armeo. — Dum paco : 46.000. Dum milito : 182 000 Unu filo po familio estas devige soldato. Ĉiuj viroj inter 20 kaj 40 j. formas burĝan gvardion (46.000 aktiva, 157.000 neaktiva).
Instruado. — 5 Universitatoj en Bruselo, Liège, Louvain, Gent (Gand), Mons. Multaj ŝtataj, urbaj kaj privataj lernejoj.

Ekonomio. — Tre riĉa industrio. Karbminejoj. Fero, ŝtalo, papero, vitraĵoj. Gravaj teksejoj. Prospera agrikulturo. Bredado. Importo, 4.951.000.000 ; eksporto, 3.952.000.000. Komerca ŝiparo : 104 ŝipoj kun 191.000 t.

Monsistemo. — Laŭ latina unuiĝo (1 franko [40 sd.] = 100 centimoj). Biletoj de la nacia banko : 20, 50, 100, 500, 1.000 fr. Oraj moneroj : 10, 20 fr. Arĝentaj : 50 cm , 1, 2 fr. Nikelaj : 5, 10, 25 cm. (truitaj). — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj vilaĝoj ; servo de poŝtmandatoj sen aŭ kun ĉarporto de l'mono hejmen ; pagigo de kvitancoj aŭ tratoj. Pagoj en kontoj ĉe la nacia banko. Int. poŝtmandatoj, respondkuponoj. Interna afranko : let. 10 cm. po 20 gr. ; pk. 5 cm. ; pres. 1 cm. ĝis 25 gr. ; 2 cm. ĝis 50 gr. kaj 2 cm. po ĉiu 50 gr. plie — Telefono. Oficejoj en ĉiuj iom gravaj vilaĝoj. Komuniko en urbo aŭ kun ĉirkaŭajoj : 25 cm. po 5 minutoj. Inter malproksimaj urboj : 1 fr. po 5 min. — Telegrafo. 15 vortoj maks., 50 cm. ; ĉiuj 5 vortoj plie, 10 cm., ĝis 50 vortoj ; ĉiuj 10 vortoj plie, 10 cm.

Fervojoj. — La plej densa fervojaro en la mondo : 4.720 km. kun normala larĝo, preskaŭ tute apartenas al la ŝtato ; 3 540 km. mallarĝaj linioj. Tre malkaraj. 100 km. 1ª kl., 9,40 fr. ; 2ª kl., 6,40 fr. ; 3ª kl., 3,80 fr. ; ir- reiraj biletoj, 15,10 fr., 10,30 fr., 6,05 fr. (valoras 2 labortagojn). — Specialaj biletoj : *a*) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kun aliaj ŝtatoj ; *b*) kuponoj por difinitaj rondvojaĝoj ; *c*) ĝeneralaj abonoj kiuj rajtigas al nelimigata uzado de ĉiuj linioj. Prezoj por la 3ª kl. : 5-tagaj, 35 ; 23 ; 13 fr. ; 15-tagaj, 61,50 ; 41 ; 23,50 fr. ; garantisumo da 5 fr. estu aldonata. Ĝi estas rericevata se ĝustatempe oni redonas la uzitan abonkarton. Tiuj abonkartoj estas haveblaj post 1 horo en ĉiu stacidomo, ekz. ĉe la landlimo, Ankaŭ mendebla letere. Nur fotografaĵo da 4×6 cm. estu aldonata ; *d*) ĝeneralaj abonoj dum 3, 6, 9 aŭ 12 monatoj sur ĉiuj linioj aŭ nur inter 2 difinitaj urboj ; *e*) semajnaj rabatprezaj abonoj por gelaboristoj ; *f*) societoj da min. 20 personoj aŭ lernantoj (min. 10) pagas nur simplan bileton por iri kaj reveni. Okaze de festoj kaj somere inter la plej gravaj urboj kaj la banlokoj specialaj vagonaroj tre malkaraj. Infanoj pagas nenion ĝis 3ª j., la duonon ĝis 8ª j. La biletoj taŭgas sen plia alpago por ĉiuj vagonaroj. Por simplaj aŭ ir- reiraj biletoj interrompo de vojaĝo neebla. Biletoj kontrolataj ĉiam je la enirejo kaj plej ofte ankaŭ en la vagonoj. Eniro sur la kajoj sen vojaĝbileto, 10 cm. Senpage estas kunpreneblaj 25 kg. da pakaĵoj. 3ª kl. rekomendinda sur ĉiuj iom gravaj linioj kaj ebla en preskaŭ ĉiuj rapidaj vagonaroj.

Navigado. — Antverpeno estas la dua marhaveno de la kontinento ; 60 regulaj ŝiplinioj kunigas ĝin al la plej diversaj partoj de la mondo.

Rapida transŝipiĝo al Anglujo tra Ostende-Dover trifoje tage. Komerca ŝiparo : 104 ŝipoj kun 191.000 t.

Turismo. — Ĉiujare, precipe somere multnombraj fremduloj. Banurboj famaj laŭlonge de la Norda Maro. Kuracurbo Spa. Bordoj de la riverego Meuse (Maas) kaj de ĝiaj alfluaj riveroj. Interesaj malnovaj urboj (Bruselo, Antverpeno, Gento, Bruĝo). Doganvizitado en la vagonaroj. Neuzitaj vestaĵoj aŭ nur grandaj kvantoj da tabako aŭ likvoroj pagas impostojn. Turing-Klubo : rue Royale, Bruselo. — Esp. gf. en Spa.

Hoteloj. — La mezprezaj estas tre komfortaj kaj puraj. La loĝado kostas ordinare inter 2 kaj 4 fr. Trinkmono : 10 %. Por restado ekzistas rabatoj : loĝado kaj 3 manĝoj 6 ĝis 10 fr. Vegetaraj kaj senalkoholaj restoracioj en la gravaj urboj. En preskaŭ ĉiuj hoteloj oni parolas france, flandre, germane kaj angle. — F. Mathieux, vicdel., Bruxelles.

Esperantiaj hoteloj.

Antwerpen (Anvers). — Hot. de l'Industrie, Pelikaanstraal, 18 — Mat. 3,50 fr.
— Hot. de Cologne, De Keyzerlei, 17. — Mat. 3,50 fr.
Bruges. — *Hot. du Cornet d'Or*, place Simon-Stévin. Centra situacio ; dormoĉambro kun tri manĝoj por 5 aŭ 6 fr tage. Sidejo de la Esp. grupo. — E. E.
Bruxelles. — Pension privée, 81, rue de l'Instruction. — Mat. 3 fr. — Rest. végétarien, rue de l'Esplanade. — Veg.
Charleroi. — Hôt. de l'Espérance, place de la Station. — 2,50 fr.
Courtrai. — *Hôt. Royal. — 2 fr.
Gent (Gand). — Hôt. Ganda, rue de Brabant. — 3 fr. ; mat. 4 fr.
Huy. — *Hôt. de l'Aigle-Noir. — 2,50 fr.
Liège. — *Hôt. d'Angleterre, rue des Dominicains, 2. — 3 fr.
Louvain. — *Hôt. de Suède, rue Vital-Decoster, 3. — 2,50 fr.
Malines. — *Hôt. de la Station, pl. de la Station, 16. — 3 fr.
Mons. — *Hôt de l'Espérance. — 2,50 fr.
Namur. — *Hôt. de Hollande, pl. de la Station. — 2,50 fr.
Ostende. — *Hôt. de la Couronne, quai de l'Empereur, 14. — 3,50 fr.
Tournai. — *Hôt. de l'Impératrice, rue de Meaux, 12. — 2,50 fr.
Verviers. — Hôt. Saint-Jean, rue Xhavée, 1. — 2-3 fr. ; mat. 2,75, 3,75 fr.

BRITUJO

(*Anglujo, Irlando, Kimrujo, Skotlando*).

Surfaco. — 314.333 km². (Anglujo kaj Kimrujo : 151.098, Skotlando : 77.169, Irlando : 81.858). Kulturebla : 81 %). 129 graflandoj (Anglujo: 62, Skotujo : 33, Irlando : 34). — Kolonioj kaj protektoratoj : 29.817.514 km².

Loĝantoj. — 45.200.000 (Anglujo kaj Kimrujo : 36,000,000 ; Skotlando : 4.800 000 ; Irlando : 4.400.000). 145 po km². Kolonioj kaj protektoratoj : 375.838.000.

Lingvoj. — Angla precipe. En partoj de Kimrujo, kimra lingvo, en okcidenta Skotlando skota, en Irlando (krom la Nord-Orienta) irlanda, kaj en la « Channels Islands » (Markolaj Insuloj) franca.

Religioj. — Anglujo : anglikanoj 72 %, aliaj protestantoj 24 %, katolikoj 4 %. Irlando : kat. 75 %, anglik. 13 %, aliaj prot. 12 %. Skotujo : prot. 88 %, kat. 10 %.

Registaro — Konstitucia monarkio. Reĝo : Georgo Vª (n. 1865, r. 1910). Respondaj ministroj. Parlamento : Ĉ. de Nobeluloj (House of Lords, 632 anoj plejparte heredaj), Ĉ. de Deputatoj (House of Commons, 670 anoj elektataj de la popolo por 7 j.). Ĉefurbo : Londono. Kolonioj havas apartajn registarojn.

Armeo. — *Tera :* Nedeviga. Konsistas el « Regulars » (profesiaj soldatoj), rezervanoj, kaj « Territorials » (volontuloj). Dum paco : 250.000. Dum milito : 1.082.000. — *Mara :* 570 ŝipoj kun 2.900 kanonoj kaj 180.000 homoj. — *Aera :* 2 aerŝipoj.

Instruado. — Elementa instruado deviga kaj senpaga. Multaj altgradaj lernejoj (gimnazioj), kaj 11 Universitatoj en Anglujo kaj Kimrujo, 4 en Skotlando, 3 en Irlando. La plej famaj estas Oxford, Cambridge, London, Kimra, Aberdeen, Edinburgh kaj Dublin-Universitatoj. Multe da kolegioj kiuj preparas studentojn por la universitatoj, le plej famaj Eton, Harrow kaj Rugby-Kolegioj.

Ekonomio. — En nord-okcidenta Anglujo, la ĉefa industrio estas la kotonaĵa fabrikado. En Nord-Orienta Anglujo, ŝipkonstruado, fero kaj karbo. En mezlanda Anglujo, oni precipe faras potojn, kaj agrikulturas ; en suda Anglujo, agrikulturo estas la ĉefa okupo. En Skotlando, la norda parto estas ĉefe paŝtista ; en la sud-okcidento, ŝipkonstruado, fabrikado de ŝemiaĵoj ; en la sud-oriento diversaj fabrikadoj. En Irlando : nord-oriento, plejparte ŝipkonstruado kaj

tolaĵoj. En la cetero de Irlando, agrikulturo. En Kimrujo, suda parto, multe da karbminejoj, en la cetero agrikulturo.

Eksporto (1912) : £ 599.271.097 ; importo : £ 744.896.514.

Monsistemo. — Funto sterlinga [£] (10 Sm.) = 20 ŝilingoj· 1 ŝilingo (50 sd.) = 12 pencoj. Bankbiletoj : 5, 10, 20 £. Oraj moneroj : 1/2, 1 £ : (Ĉe specialaj okazoj oni eldonas orajn monerojn da 2 kaj 5 £). Arĝentaj : 5 ŝilingoj (Crown), 4 ŝ. (Double-Florin), 2 ŝ. 6 p. (Half-Crown), 2 ŝ. (Florin), 1 ŝ. (Shilling), 6 p. (sixpence), 3 p. (threepence). Kupraj : 1 penco (Penny), 1/2 p. (halfpenny) kaj 1/4 p. (Farthing).

Mezuroj. — Mezuroj tre komplikaj. Diversaj specoj de objektoj estas pesataj kaj mezurataj laŭ malsimilaj normoj.

Longeco. — 1 jardo (0,914 m.) = 3 futoj. 1 futo (0,304 m.) = 12 coloj. 1 mejlo (1.610 m.) = 1.760 jardoj. — *Pezo.* — 1 funto (453 gr.) = 16 uncoj. 1 tuno (ĉirkaŭ 1 000 kgr.) = 2.240 funtoj. — *Enhaveco.* — Por likvidoj, grenoj, k. t. p. 1 galonio = 4 kuartoj = 8 pajntoj = ĉirkaŭ 4 litroj. — Estas aliaj mezuroj por apotekistoj, juvelistoj, konstruistoj, lignaĵistoj, k. t. p.

Poŝto. — Poŝtoficejo en ĉiu urbeto, multe da suboficejoj en la pligrandaj urboj. Interna afranko : Let. 4 uncoj por 1 penco ; pk, 1/2 p. ; pres. 2 uncoj por 1/2 p. ; same kun kolonioj. — Telegrafo : 1/2 penco po vorto, min. 6 p. — Telefono (publika), po 3 min., 2 p. Poŝtmandatoj, enlandaj kaj alilandaj ; respondkuponoj. Ŝparkaso, interezo 2 1/2 %.

Fervojoj. — 37.689 km. Diversaj fervojoj posedataj de publikaj kompanioj ; la ĉefaj estas : En *Anglujo* (komencante de Londono) : London kaj North Western ; Midland ; Great Northern ; Great Central ; Great Western ; Great Eastern ; London kaj South Western ; London, Brighton kaj South Coast ; South Eastern kaj Chatham ; London, Tilbury kaj Southend ; en Nord-Anglujo : Lancashire kaj Yorkshire ; en *Kimrujo :* Cambrian Railway ; en *Skotlando :* Glasgow kaj South Western ; Caledonian ; North British ; Great North of Scotland ; kaj Higland ; en *Irlando :* Great Northern of Ireland ; Great Southern kaj Western ; Midland Great Western ; Dublin kaj South Eastern ; Northern Counties of Ireland Railway. Estas ankaŭ multe da lokaj fervojoj, en diversaj partoj, kaj en la grandaj urboj, ekz., en Londono, la North London ; Metropolitan, District, Underground. — Fervojoj. Ĉiu havas sian propran tarifon, sed ofte oni povas veturi sur du linioj aŭ pli per unu bileto. Ordinare estas rabato por ir- reira bileto, dum la somero specialaj ekskursaj kaj libertempaj biletoj je malalta prezo. Oni povas ankaŭ aĉeti « sezon-bileton », t. e. bileto kiu rajtigas al la uzo de la fervojo inter du difinitaj stacidomoj dum 1, 2, 3 aŭ pli da monatoj.

Estas ordinare tri klasoj por lokaj vagonaroj, sed lastatempe preskaŭ ĉiuj fervojoj jam forigis la 2ª kl. por longaj distancoj. 3ª kl. en longdistancaj vagonaroj ordinare tre komforta, sed por lokaj (speciale en Londono), ofte male. Enportado de pakaĵo senpage.

Navigado. — Multaj linioj al ĉiuj partoj de la mondo. Ĉefaj havenoj al la Kontinento : Dover, Folkestone, Queenborough, Harwich, Newhaven. Al Nord-Ameriko : Londono, Liverpool, Southampton, Glasgow, Manchester, Avonmouth, Dover. Al Kap-Lando, Oriento kaj Aŭstralazio : Londono, Liverpool, Plymouth, Middlesboro, Southampton. Al Centra- kaj Sud-Ameriko : Bristol, Manchester, Southampton, Liverpool. La ĉefaj linioj estas : al Ameriko, Cunard; White Star ; American ; Hamburg-Amerika ; N. D. L. ; Allan ; Royal Mail Steam Packet; Leyland; Booth ; Pacific Steam Navigation, ktp. Al la Kontinento, Wilson ; General Steam Navigation ; Batavier ; Flushing, ktp. Al Aŭstralazio kaj Hindujo, tra Suez, P. & O. ; Orient; Bibby; Ellerman; N. D. L., ktp. Al Sud-Afriko kaj Aŭstralazio, Union Castle ; New Zealand Shipping ; Shaw Savill, ktp. Komerca ŝiparo (1911) : 957 velŝipoj, 750,000 t. ; 8.460 vaporŝipoj, 17.000.000 t.

Dogano. — Granda Britujo estas « Free Trade » lando, t. e., oni povas importi ĉion sendogane, escepte la jenaj objektoj : alkoholaĵoj, vinoj, kelkaj ĥemiaĵoj, tabako, kafo, kakao, teo, sukeraĵoj, konfititaj fruktaĵoj, ludkartoj. Oni ne estas devigata pagi doganon se oni portas pakaĵon da tabako, cigaroj, aŭ cigaredoj, jam parte elĉerpitan. Tio tute dependas de la doganisto mem.

Turismo. — Britujo prezentas nekompareblan kampon por turismo. La ĉefaj distriktoj estas la Montoj kaj Lagoj de Skotlando, la Montoj de Kimrujo, la Lag-Distrikto de Cumberland kaj Westmoreland, la malebena marborda pejzaĝo de Devonshire kaj Cornwall, kaj la nord-orienta marbordo de Anglujo kaj la marbordoj de Skotlando. La marbordoj kaj sabloj de la suda kaj orienta marbordoj de Irlando, la malebena pejzaĝo de la norda kaj okcidenta marbordoj de la belegaj lagoj de Killarney. La firmo de Thos. Cook kaj Filo (Esperantia Entrepreno), la pioniroj de Plezuraj Vojaĝoj kaj Ekskursoj (fondita 1841) havas sistemon kiu funkcias tra ĉiuj partoj de Britujo, kaj enhavas ĉiujn specojn de vojaĝado, malkarajn ekskursojn, aŭ rektajn vojaĝadojn kaj rondajn vojaĝojn. — Esp. gf en Bath, Cheltenham, Cromer, Gibraltar, Letchworth, Liverpool Portsmouth. Esp. gvidlibroj en London, Edinburgh, Rothesay, Southport.

Hoteloj. — La hoteloj ne estas perfektaj, speciale en la malproksimaj kamparaj distriktoj, sed dum la lastaj jaroj ili multe pliboniĝis ; bonaj loĝejoj de 5 ŝ. 6 p. ĝis 30 ŝ. (po tago) estas haveblaj. Tre detala hotellisto de iu oficejo de la turistagentoj Cook. Turisma

sezono ordinare de majo ĝis septembro, skota sezono ĉirkaŭ la fino de junio. En la grandaj urboj, multaj luksaj kaj neluksaj hoteloj. Ankaŭ por alilanduloj estas alilandaj hoteloj, ekz : en Londono, en la kvartalo Soho, estas multe da francaj, italaj kaj hispanaj hoteloj. Ordinare oni luas ĉambron kun matenmanĝo, kaj prenas aliajn manĝojn ekstere. Multaj personoj preferas pensionojn, kie oni havas ĉiujn manĝojn. En grandaj urboj estas restoracioj, kafejoj, teejoj, ktp. Trinkmono : ĉirkaŭ 5 % — 10 % ; en kafejoj, kaj teejoj, posedataj de grandaj kompanioj, ekz., Lyon's, Aerated Bread Company (A. B. C.), Slaters, John Pearce, trinkmono malpermesata. Ordinara bona manĝo kostas ĉirkaŭ 2 ŝ. 6 p., sed oni povas havi tre bonan malpezan lunĉon po 1 ŝ. Matenmanĝo (kutime kun ovoj, fiŝoj aŭ viando) ĉirkaŭ 8-9 h. ; lunĉo, 12-1 h. ; posttagmeza temanĝo, 4-5 h. ; vespermanĝo, ĉirkaŭ 6-7 h. — H.-A. Epstein, Del. Londono.

Esperantiaj hoteloj.

(La prezoj estas notataj per ŝilingoj kaj pencoj.
Ekz : 4/6 = 4 ŝilingoj 6 pencoj (2,24 Sm.).

Barrow-in-Furness. — Imperial Hot., Corwallis Str. — 4/.
— Rest. Waverley Hot., Abbey Rd.
Bath (Somerset). — Fernley Hot., North Parade. — 4/. — Mat. 5/.
— Rest. Shapland's, 17 Stall Str.
Belfast. — Imperial Hot., Donegall Pl. — 3/.
Birmingham. — Grand Hot., Colmore Row. — Mat. 4/6.
— Rest. The Pitman., Corporation Str.
Bradford. — Royal Hot., Darley Str. — Mat. 5/6.
— Rest. Beanstalk, 33, Charles Str. — Veg.
Brighton. — Gloucester Hot., Gloucester Pl. — 3/6.
Bristol. — Dolphin Restaurant, 42, High Str. — 2/6.
— Rest. Lyons, 46, Wine Str.
Cambridge. — Bird Bolt Hot., Regent Str. — Mat. 4/.
— Rest. Livingstone Hot., Petty Cury.
Cardiff. — Barrys Hot., St. Mary Str. — Mat. 5/6.
— Rest. R. E. Jones's Central Hot., St. Mary Str.
Chester. — Rest. The Manchester, 43, City Road. — Mat. 3-3/6.
Chorley. — Royal Oak Hot., Market Str.
Coventry — Rest. Victoria Temperance Hot., Warwick Row.
Croydon — Greyhound, High. Str. — Mat. 4/6.
— Rest Lyon's, 3, George Str., kaj North End.
Derby. — Clarendon, Midland Road. — 3/6.
— Rest. Ramsdem, St. Peters Str.
Dover. — Kings Head Hot., Clarence Place. — Mat. 3/-4/. — Sez. (Jul.-Sept.).

Dublin. — ' Hot. Standard, Harcourt Str.
Dundee. — Lamb's Hot., 64, Reforme Str. — Mat. 4/3-4/9.
— Rest. Lamb's Hot., sama adreso.
Edinburgh. — Royal British Hot., 20, Princes Str. (kontraŭ la ĉefa stacidomo). Mat. 5/6. — Esp.
— Rest. Patrick Thomson, North Bridge.
Folkestone. — Catalpha Pension, 7, Marine Parade. — Pens. 30/ (semajne). — Sez. (Jul.-Sept.). 40/ (semajne).
Glasgow. — Hot. Alexandra, 148, Bath Street. — Mat. 4/6. — Esp.
—. Rest. Stuart Cranston's Tea-Rooms, Limited (multaj filioj). — Lakt.
Gloucester. — The Royal Hot., Station Road. — Mat. 4/6.
— Rest. J. Page, The Jood Reform Depôt, College Str. — Veg.
Gourock — Ashton Hot. — Mat. 6/.
— Rest. Columbia. — Mat. 5/.
Greenock. — Waverley Hot., West Blackhall. — Mat. 4/.
Halifax. — Mande's Temperance Hot., Broad Str. — 2-2/6. — Mat. 3/5-4/.
Hamilton. — Royal Hot. — 3/. — Mat 5/.
Helensburgh. — Imperial Hot. — Mat. 5/6.
Huddersfield — The Queen Hot., Market Str. — Mat. 5/.
— Rest. Collinson's Cafe, New Street. — Lakt.
Hull — The York Commercial Hot., Aulaby Road. — 2/. — Mat. 3/6-4/.
— Rest. Jeffersons Vegetarian Café, 11, Savile Str. — Veg.
Keighley. — Victoria Hot., Cavendish Str. — Mat. 5/.
— Rest. Junnicliffe's Temperance Hot , Cavendish Str.
Kettering. — Albion Commercial Temperance Hot., Market Place. — Mat. 3/-4/.
— Rest. Cross Key's Café, Dalkeith Place.
Kilwinning. — The Winton Arms. — Mat. 3/6.
Kilmarnock. — Ossington Hot., John Finnie Str. — 3/6.
Leeds. — The Hotel de Ville, King Str. — 4/. — Mat. 5/.
Letchworth. — Garden City Hot., Station Road. — 2/6. — Mat. 4/.
— Rest. The Skittles Inn, Nevelle Road. — Veg.
Liverpool. — Hunt's Hot, Mount Pleasant, 52. — 4/6.
— Rest. Cottle aŭ Lyons. — Multaj filioj.
— Veg. Castle's Veg. Restaurant, 24, Dale Str.
London. — *Imperial Hotel*, Russell Square. Centra situacio, apud la Esperantista konsulejo. Orkestro ĉiutage en la Vintra Ĝardeno. Ĉambro, matenmanĝo kaj servado de 5. E. E.
— *Milton Temperance Hotel*, Featherstone Buildings, High Holborn. Milton Temperance Hotel : posedantino Sⁱⁿᵒ Bodger. Lokita centre kaj kviet ; lito kaj matenmanĝo kostas de 3 ĝis 5 laŭ postuloj. Telegrafa adreso : Embayment Holb. London. E. E.

London.— *Shaftesburg Hol.*, Gt St Andrew St , apud. Phaftesbury Ave. W. C. Lito, matenmanĝo, bano kaj servado ; unu prezo 4/ tage Neniaj trinkmonoj aŭ ekstraj pagoj. Freŝa akvo (varma kaj malvarma). en litoĉambroj Telegramoj : Unufraid, London E. E.
— *Pensiono de Sⁱⁿᵒ O'Connor* : 17, St. Stephen's Square, Bayswater. Lito kaj matenmanĝo. 2/6. Tarifo potage 4/. Dʳᵉ O'Connor M.-A. donas anglajn lecionojn. E. E.
— The Buckingham Temperance Hot., 40, West Strand, eniro : 28, Buckingham Str. — Mat. 5/.
— *Rest. Food Reform Restaurant*, 1, 2, 3, Furnival Str. Holborn. E. C Plej granda vegetara restoracio, speciala manĝoĉambro ; 2 virinaj ĉambroj ; 3 ĝeneralaj ĉambroj ; fumo, bilard-ĉambro. Ĉambroj lueblaj por vespera kunvenoj. E. E.
— Rest. Lyon's Restaurant. — Multaj filioj.
— Rest. A. B. C. (Aerated Bread Company) (same).
— Rest. J P. Restaurants. — Multaj filioj
— Rest. Eustace Miles Restaurant, 30, Chaudos Str., W. C. — Veg.
Manchester. — * Deansgate Hot., Deansgate Str — Mat. 4/6.
Newcastle-on-Tyne.— Tyne Temperance Hot., Hood Str.— Mat. 4/6.
Norwich — Cafe-Rest., Prince of Wales Road, 78. — Mat. 4/.
— Rest. Savoy, Wheeler Gate. — Veg.
Nottingham. — Gresham Hot., Carrington Str. — Mat. 4/6.
Oban. — Culumba Hot. — Mat. 6/6.
Paisley. — George Temperance Hot., 2, Old Smithills. — Mat. 4/. — Pens. po semajno 30/.
Paisley. — Rest. Gipson's Tea and Lunch Rooms, 98, Hight Street.
Perth — Royal George Hot., George Street. — Mat. 5/.
Plymouth. — The Westminster Hot., The Crescent, Millbay Road. — Mat. 3/6.
— Rest. Plymouth Dairy Cᵒ Lᵗᵈ, Union Str., Bedford Str. — Veg. Lakt.
Rochdale. — Wellington Hot., Broadway. — Mat. 5/.
— Rest. Crescent Hot., Drake Str.
Rothesay. — Venetzia Boarding House. — Pens. 5/ (tage). — 1 £ (semajne).
Sheffield. — Rest. Albany Hot., Fargate. — Mat. 5/.
— Rest. Lyon's Cafe, Fargate.
Stockton-on-Tees. — Trevelyan Hot., Paradise Row. — Mat. 5/.
— Rest. The Cafe, Dovecot Str., 42.
Wigans — Victoria Hot., Wallgate. — Mat. 5/6.
— Rest. Marsden's Cafe, Market Str. — 3/.
York. — Young's Hot., Petergate. — Mat. 3/6.

BULGARUJO

Surfaco. — 114.660 km² (kulturita, 37,6 %). 15 distriktoj.

Loĝantoj. — 5.060.000 (42 po km²).

Lingvoj. — Bulgara, malgranda parto turka.

Religioj. — Ĉefe ortodoksa, malgranda parto mahometana.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Ferdinando I[a] (n. 1861, r. 1887). 10 respondaj ministroj. Parlamento : C. de la reprezentantoj (1 po 20.000 loĝantoj, elektataj por 4 j.). Ĉefurbo : Sofia.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 75.000. Dum milito : 450.000. Deviga militservo ; infanterio 2 j., artilerio, kavalerio 3 j. ; gimnazianoj servas 2 j. kaj studentoj 1 j. en speciala lernejo. *Mara :* ne granda.

Instruado. — 1 universitato en Sofia kaj 5.670 unuagradaj kaj duagradaj lernejoj, gimnazioj, pedagogiaj lernejoj, seminarioj, milita, pentrist-industria k. a. lernejoj.

Ekonomio. — Tre prospera agrikulturo kaj brutedukado. Eksporto de cerealoj, ovoj, rozesenco, silkkokonoj, kupro, ledoj, tabako. Industrio ne grava, precipe teksejoj, muelejoj, kelkaj karb- kaj kuprominejoj. Importo : 199 milionoj ; eksporto : 184 milionoj.

Monsistemo. — Laŭ Latina Unuiĝo (1 lev. [40 sd.] = 100 stotinki). Biletoj de la nacia banko : 5, 10, 20, 50, 100 leva. Oraj moneroj : 10, 20 leva. Arĝentaj : 50 st., 1, 2, 5 leva. Nikelaj : 2 1/2, 5, 10, 20 st. Kupraj : 1, 2 st. — Mezuroj laŭ metra sistemo

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj ; servo de poŝtmandatoj sen alporto de mono hejmen ; pagigo de kvitancoj ; int. poŝtmandatoj kaj respondkuponoj. Interna afranko : let. 10 st. ĝis 15 gr. (enurbe 5 st.) ; pk. 5 st. ; pres. 2 st. por ĉiuj 50 gr. Ŝparkaso : interezo 4 % ; spezoj en ĉiu poŝtoficejo. Telegrafo : 5 st. po vorto, minimume 10 vortoj.

Fervojoj. — 2.305 km. kun normala larĝeco, apartenantaj al la ŝtato. Rabato da 25, 50 kaj 75 % okaze de kongresoj, ekskursoj, festoj. Lernantoj, studentoj kaj soldatoj pagas duonpreze. Manĝovagonoj nur en ekspresoj.

Navigado — Ĉefaj havenoj : Varna kaj Burgas sur Nigra Maro. Ŝipveturo al Odessa kaj Konstantinoplo

Turismo. — Sezono de junio ĝis septembro por la klimatlokoj kaj montaro. Vizitindaj urboj : Sofia, Plovdiv (Filipopoli), Varna (ĉe la Nigra Maro kun marbanejoj), Ŝumen, Tirnovo (la malnova bulg. ĉefurbo), Pleven (la fama batalejo aŭ bulgara Jerusalemo) kaj farindaj ekskursoj sur Danubo, Roza Valo, Rila Montaro (kie estas la fama Rila monanejo) kaj Nigra Monto en Vitoŝa- montaro apud Sofia. Diversaj ban- kaj kuraclokoj. Je la landlimo oni postulas pasporton.

Hoteloj. — Ĉiugradaj kaj ĉiuprezaj hoteloj kaj restoracioj, kiuj povas kontentigi ĉies gustojn kaj monujojn. Meza prezo 1,50-3 fr. Trinkmono : 5-10 %. En multaj hoteloj oni parolas ankaŭ france kaj germane. — Iv. H. Krestanof (Dijon).

Esperantia Hotelo

Sofia. — Lege Palas, rue Lege, 1. — 2,50 fr.
— Rest. Ŝvejcaria, bulv. Dondukov.

DANUJO

Surfaco. — 38.969 km²., 18 distriktoj krom Kopenhago. — Islando kaj kolonioj : 194.644 km².

Loĝantoj. — 2.757.000 (71 po km.). Islando kaj kolonioj : 145.000.

Lingvo. — Dana.

Religioj. — 99 % protestantoj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Christian X (n. 1870, r. 1912). 10 respondaj ministroj. Parlamento : Landsthing (66 anoj parte elektataj de la reĝo dumvive, parte pere por 8 j.). Folkething (114 anoj senpere elektataj por 3 j.). Ĉefurbo : Kopenhago. Islando havas apartan konstitucion.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 14.000. Dum milito : 85.000. Deviga militservo meze 1 j. *Mara :* 46 kanonoj, 1.400 homoj.

Instruado. — Universitato kaj diversaj altaj lernejoj en Kopenhago. Dum la lastaj generacioj la 80 popoluniversitatoj havis grandan signifon por la edukado. La lando havas altrangan popol- kaj privatlernejan sistemon.

Ekonomio. — Tre prospera agrikulturo ĉefe eksporto de butero, porkaĵo, ovoj, lakto, kornbestoj. Bona industrio ; eksportado de maŝinoj por buterfarejoj, cemento, ktp. Importo : 623.000.000 K. ; eksporto : 537.000.000 K. Komerca ŝiparo : 4.340 ŝipoj kun 547.000 t.

Monsistemo. — Laŭ skandinava unuiĝo (1 kron [55 sd] = 100 oere). Biletoj nur de la nacia banko : 5, 10, 50, 100, 500 Kr. Oraj moneroj : 10, 20 Kr. Arĝentaj : 10. 25 oere, 1, 2 Kr. Kupraj : 1, 2, 5 oere. Norvega kaj sveda mono sen kurzperdo. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiu urbeto. Poŝtmandatoj ŝanĝeblaj en la oficejoj aŭ kreditebla je la bankoj ; int. respondkuponoj Interna afranko : let. 10 oere (enurbe 5) ; pk. 5 (enurbe 3) ; pres. 4 (enurbe 2). — Telegrafo : 3 ĝis 5 oere po vorto.

Fervojoj. — 3.651 km. ĝenerale ŝtataj. Por distancoj ĝis 169 km. la prezoj po km sur la ŝtataj linioj estas : 1 kl. 7,5 oere. 2 kl. 4,75 oere, 3 kl 2,75 oere. Por pli grandaj distancoj la prezo kalkuliĝas laŭ 15 zonoj. Por rapidaj vagonaroj oni devas pagi plie : 1 kl. 130 oere, 2 kl. 80 oere, 3 kl. 50 oere Ir-reiraj biletoj nur por distancoj ĝis 30 km. ; rabato sensignifa. — Specialaj biletoj : *a*) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kun aliaj ŝtatoj ; *b*) kombineblaj kuponaroj por rondvojaĝoj en la lando ; *c*) ĝeneralaj abonoj, kiuj rajtigas al nelimigita uzo de ĉiuj ŝtataj linioj. Speciale profitaj por turistoj estas la abonoj por 8 tagoj (nur 3ª kl.) prezo : 22 Kr., por 14 tagoj, 1 kl. 80 Kr., 2 kl. 50 Kr., 3 kl. 30 Kr. ; rabato por pli longa tempo ; *d*) rabatoj al societoj kaj lernejoj por min. 30 personoj, nur en la 3ª kl. kaj ne sur la linio Kopenhago-Helsingor. Favorkondiĉoj por festotagoj, vizito de banlokoj, kongresoj, k. t. p., ne kutimaj. Infanoj nenion pagas ĝis 4ª j. ; la duonon de 4ª ĝis 10ª j. ; ne valoras por ili la ĝeneralaj abonoj. Interrompo de l'vojaĝo ne permesata. Kontrolo de la biletoj, en la stacidomoj kaj en la vagono. Senpage estas kunprenebla 25 kg. da pakaĵoj (enskribpago 25 oere). La 3ª kl. estas rekomendinda ; ĝi estas pura kaj troviĝas en ĉiuj rapidvagonaroj ; la kondiĉoj sur la kompaniaj fervojoj iom diferencas Dormovagonoj sed ne manĝovagonoj. Inter la diversaj insuloj transporto per ŝtataj pramegoj ; la pasaĝeroj de 1ª kaj 2ª kl. ordinare restas en la vagonoj.

Navigado. — Inter diversaj danaj urboj kiel ankaŭ inter Kopenhago kaj diversaj fremdaj urboj oftaj ŝipveturoj por vojaĝantoj, ĝenerale pli malkaraj sed pli longaj.

Turismo — Sezono de junio ĝis septembro. La ĉefurbo kun siaj multaj vidindaĵoj kaj la bela ĉirkaŭaĵo estas dum julio kaj aŭgusto plenigata de eksterlandaj turistoj. Ankaŭ aliaj partoj de la lando (ekz. la insuloj Moen kaj Bornholm kaj la jutlandaj lagoj) meritas viziton. La plej preferinda tempo estas junio kaj la komenco de julio pro la beleco de la helaj noktoj. — Dogano nesevera (cigaroj, 2,20 kr. po kgr). Kutime oni ne pagas se oni havas nur malpli ol 50 cigaroj). — Esp. gf. kaj gvidlibro en Kopenhago

Hoteloj. — Ĝenerale komfortaj kaj puraj. Se la prezo por nokto estas pli alta ol 1,50 Kr. en la provincoj, iom pli en la ĉefurbo oni povas atendi ĉiujn kontentigojn. En ĉiuj urboj ekzistas kristanaj hoteloj. Ĝenerale oni parolas germane kaj ofte angle, en la gravaj ankaŭ france. — B. Hansen, Del. Kopenhago.

Esperantiaj hoteloj.

Aarhus. — Hot. Royal, Store Tove. — 2-4 Kr.
— Pens. vegetera, Fiskergade, 26. — Veg.

Kopenhago. — Savoy Hot , Vesterbrogade, 35. — 2 Kr.

Odense. — Fyens Forsamlinghus, Dronningensgade. — 1,50 Kr. — Mat. — 2,15 Kr.

FINNLANDO

Surfaco. — 377.604 km² (lagoj, 12 %), 8 gubernioj kaj 51 distriktoj.

Loĝantoj. — 3.115.000 (8 po km²).

Lingvoj. — Ĉefe finna (2.565.000), krom tio sveda (344.000), rusa (7.000), germana (1.700), lapona (1.600).

Religioj. — 3.058.000 luteranoj, 52.000 ortodoksoj.

Registaro. — Konstitucia granddduklando, en realunuiĝo kun Ruslando. Grandduko : la imperiestro de Ruslando, Nikolao II. Senaton formas la jura sekcio (9 anoj, supera juĝistaro), kaj la ekonomia sekcio (9 anoj ; respondas al la ministraro en aliaj landoj). Parlamento unuĉambra (200 anoj, elektataj per senpera, proporcia baloto por 3 j. Balotrajton havas kaj elektebla estas ĉiu finna viro kaj virino). Ĉefurbo : Helsinki-Helsingforso.

Armeo. — Nuntempe ne ekzistas speciala Finnlanda armeo.

Instruado. — Elementa instruado ne deviga, sed senpaga. En ĉiu komunumo multaj elementaj *popolaj lernejoj*. Analfabatuloj nur 0,7 %. Mezaj lernejoj en ĉiu urbo kaj multaj kamparaj komunumoj ; el tiuj pli ol la duono estas privataj aŭ komunaj (ne ŝtataj) *geknabaj lernejoj*. Altaj lernejoj : Universitato kun ĉ. 3.200 studentoj (el tiuj 700 studentinoj) en Helsingforso. Regulaj universitataj somerkursoj en Jyväskyla, teknika altlernejo kun 400 studentoj en Helsingforso, krom tio komercaj, maraj, industriaj kaj metiaj lernejoj

en multaj urboj, komerca altlernejo en Helsingforso, muzikinstituto, arta lernejo, k. t. p. 46 popoluniversitatoj, k. t. p.

Ekonomio. — La lando estas parte agrikultura kaj brutnutra, parte arbarkultura. La bordaro vivas je navigado, kaj fiŝkaptado. Industriaj eksportajoj : lignaĵoj, papero, butero, ferajoj, vaporŝipoj, sume 130.000.000 Sm. Importado de greno, kafo, kruda sukero, kotono, lano, lino, metaloj, maŝinoj, sume 175.000.000 Sm.

Monsistemo. — 1 markka (0,399 Sm. = 1 latina franko) = 100 pennia. Oraj moneroj : 10 kaj 20 mk, biletoj 5, 10, 20, 50, 100, 500 kaj 1,000 mk ; arĝentaj : 1,2 mk, 25 kaj 50 p. ; kupraj : 1, 5 kaj 10 p.

Mezuroj — Laŭ metra sistemo. En lignokomerco estas uzataj la anglaj mezuroj. En la komuna lingvo estas uzataj : *kappa* = 5 l., *syli* = 2 m., *peninkulma* (mejlo) = 10 km.

Poŝto. — Enlanda tarifo : let. 20 p. (ĝis 15 gr.) ; pk 10 p. ; pres. 5 p. po 50 gr. Poŝtmandatoj uzeblaj. Eksterlanda afranko okazas per rusaj poŝtmarkoj : let. 10 kopekoj, pk. 4 — Telegrafo : Enlanda tarifo : 50 p. + 10 po vorto. — Telefono tre disvastigata, senpaga aŭ 10 p. pro interparolo.

Fervojoj. — 4.568 km. ŝtataj kaj 371 km. privataj. Tarifo dekreskanta, malkara rilate al la kontinentaj landoj. IIª klaso : 100 km = Mk 5.15, 200 = 9.75, 300 = 13.80, 500 = 20.25, 1.000 = 27.45, 1.500 = 31.20. 3ª kl. pura kaj uzebla. Dormovagonoj en ĉiuj tri klasoj je speciala alpago. Reirbiletoj senrabataj. Kuponbiletoj tre rekomendindaj. Ĉiu bileto rajtigas 25 kg de senpaga pakaĵo Infanoj ĝis 5ª j. senpage ; ĝis 12ª j. duona prezo. Interrompo de vojaĝo permesata. Kontrolado de la biletoj en la vagono.

Navigado. — Sur ĉiuj lagaroj iras ŝipoj pli-malpli grandaj. Veturado tre malkara. 2ª kl. tre uzebla. Laŭborda kaj eksterlanda komunikado ankaŭ tre disvolvigita. Speciale komfortaj estas la grandaj vaporŝipoj, komunikantaj kun German-, Sved-, Dan-, kaj Anglujo. — Velŝipoj 3.200 (kun 333.000 t.), vaporŝipoj 4.000 (kun 410.000 t.).

Dogano. — Nesevera. Armiloj malpermesataj. Vizitado ĉe elŝipiĝo. Alvenante tra Peterburgo ĝi povas okazi jam ĉe la stacio de finna ŝtata fervojo en Peterburgo Uzitaj bicikloj estas senimpostaj. Por aŭtomobiloj oni pagas garantion repagotan laŭ specialaj formalaĵoj.

Turismo. — Al tiu, kiu deziras pasigi sian libertempon malproksime de la plej uzataj turismaj linioj, kiu serĉas trankvilon kaj solecon, ĝuadon je sovaĝa belega naturo, refreŝigan veturadon sur sanaj lagaroj inter arbaroj kaj montoj nur malofte renkontante kampojn kaj loĝejojn, kiu amas ĉiuspecan sporton : remadon, ĉasadon, fiŝadon, bicikladon, glitadon laŭ riveraj akvorapidaĵoj, vintrajn sportojn, nek postulas ĉiupaŝe plej unuaklasan komforton,

al ĉiu, kiu volas kvietigi siajn nervojn, Finnlando estas la plej rekomendinda vojaĝcelo. Kelkaj bonaj resanigejoj proponas komfortan loĝadon ; de tie facilaj ekskursoj al la sovaĝa naturo. Plej vizitindaj lokoj : la akvofaloj de Oulujoki (traveturado en riverboato), Imatra (la plej akvoriĉa falo en Eŭropo), la lagaro Saimaa, la monto Koli, Punkaharju (mallarĝa insulo-gruzdorso kun belegaj panoramoj), la insula monaĥejo Valamo, la urboj Abo, Helsingforso (ĉefurbo, tute moderna) kaj Savonlinna kun sia romantika malnova kastelo de Sankta Olao. — Pasporto malofte postulata. Fotografado ĉie permesata. En la grandaj hoteloj de la ĉefaj urboj krom enlandaj finna kaj sveda lingvoj, ankaŭ germana kaj malpli multe franca, angla kaj rusa lingvoj parolataj. — Esp. gf. en Kotka. Esp. gvidlibro : Vojaĝado en Finnlando. (Tre rekomendata. Ricevebla ĉe U. E. A. po 2 respondkuponoj). Por ĉiuj informoj sin turni al Turista Societo de Finnlando en Helsingforso, N. Esplanada str., 21.

Hoteloj. — Nur en la ĉefaj urboj kaj ĉe Imatra kaj Punkaharju troviĝas grandaj hoteloj, kiuj povas plenumi plej grandajn postulojn de komforto. Pli modestaj senalkoholaj hoteloj, nomataj *Matkailijakoti* (= turista hejmo) estas tamen rekomendindaj pro sia pureco kaj malkareco. La prezoj estas tre variaj. Ofte oni povas trovi bonan puran ĉambron pro Fmk (= Fr.) 1.50-2. En tiaj modestaj lokoj la matenmanĝo kostas Fmk 1-1.50 kaj la tagmanĝo Fmk 1.50-2. En grandaj hoteloj oni nature elspezas pli multe. Senalkoholaj restoracioj ĉie troveblaj, vegetara manĝaĵo en la pli grandaj urboj ricevebla. — La Turista Societo de Finnlando aranĝis specialan tre praktikan hotel-kuponsistemon. La kuponoj rajtigas al maten-, tag- kaj vespermanĝo, hotelĉambro por unu persono kaj ĉiuj ordinaraj servoj de restoraciaj kelneroj kaj ĉambrokelneroj kaj pordistoj. Nenia trinkmono do estas aldonota. Male ili ne enhavas elspezojn por trinkaĵoj nek por ekskursaj veturiloj, nek por veturado kaj transporto de pakaĵo inter stacidomo aŭ albordejo kaj hotelo. Neuzitaj kuponoj estas repagotaj. — Trinkmono ĝenerale 10-15 %. — Vilho Setala, Del. Helsingforso.

Esperantia hotelo

Helsingforo. — Hospiz, Kristana gastejo, Vuorikau. — 3-4 fr. — Rest. Osmola, Pohjois Esplanadinkatu.

FRANCUJO

Surfaco. — 536.000 km². (kulturebla 82 %). 86 departementoj dividitaj en arondismentoj, kantonoj kaj komununoj. Kolonioj kaj protektoratoj : 11 500 000 km².

Loĝantoj. — 39.601.000 (73 po km²). Kolonioj kaj protektoratoj 54.000.000.

Lingvoj. — Franca. Diversaj dialektoj en la kamparo, ĉefe en Suda Francujo kaj Bretonujo.

Religioj. — Plejparte katolika. 600.000 protestantoj ĉefe en Sudo (Nîmes); 100.000 hebreoj.

Registaro. — Parlamenta respubliko. Prezidanto : Raymond Poincaré (n. 1860, r. 1913), elektita de la du ĉambroj por 7 j. 13 respondaj ministroj. Parlamento : Senato (300 anoj, duagrada baloto, 9 j.); C. de la Deputatoj (597 anoj, universala baloto, 4 j.). Ĉefurbo : Parizo.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 608.000 ; dum milito : 4 370.000. Trijara servado sen esceptoj. — *Mara :* 450 ŝipoj kun 2.800 kanonoj. — *Aera :* 12 aerŝipoj, 300 aeroplanoj.

Instruado. — 16 Universitatoj. Normala Supera Lernejo, Politeknika Lernejo, Mina Lernejo, Centra Lernejo por Inĝenieroj, k. c., en Parizo. Multaj teknikaj lernejoj en St.-Etienne (minejoj), Grenoble, Lille, Nancy. Milita Mara Lernejo de Brest. Speciala Milita Lernejo en St.-Cyr apud Parizo. Duagradaj lernejoj : 20 liceoj en Parizo kaj ordinare 1 en ĉiu departemento ; kolegioj (komunumaj) ĝenerale en ĉiu ĉefurbo de arondismento.

Fremdaj studentoj estas multaj, ĉefe en Parizo, Grenoble, Lyon, Montpellier, Nancy, Dijon, Poitiers. Specialaj kursoj por lerni la francan lingvon dum libertempo. — Esp. Universitataj gf. en Dijon, Grenoble, Nancy, Poitiers.

Ekonomio — Pro sia situacio Francujo rikoltas ĉiujn Eŭropajn kaj Mediteraneajn produktaĵojn, ĉefe vinojn (Burgonjo, Bordeaux, Campano), kaj tritikon. Industrio tre prospera ĉefe nordoriente de linio strekata de Le Havre ĝis Cette, pro karbminejoj, akvoforto kaj ferminejoj. La ĉefaj fabrikaĵoj estas lan- kaj silkteksaĵoj, luksaj objektoj kaj oleomotormaŝinoj, kiel aŭtomobiloj, cikloj kaj aeroplanoj. Fer-ŝtalfandejoj, feraj- kaj najlfabrikejoj norde kaj oriente. Importo : 6.759 milionoj ; eksporto : 6 005 milionoj.

Monsistemo. — Laŭ latina unuiĝo (1 fr. [40 Sd.] = 100 centimoj). Biletoj : 50, 100, 500, 1.000 fr. Oraj moneroj : 10, 20 fr. Arĝentaj : 50 ct., 1, 2, 5 fr. Nikelaj : 25 ct. Kupraj : 5 (nomata *sou*), 10 ct.

Mezuroj. — Laŭ metra sistemo. En la komuna lingvo oni uzas la vortojn *lieue* (mejlo) = 4 km., *livre* (funto) — kgr. 0,500, *pièce* (en Burgonjo barelo da 228 l.) kaj *barrique* (Bordeaux-lando) barelo da 225 l. La vinboteloj entenas proksimume 75 cl.

Fervojoj. — 17.126 km. plejparte ŝtataj. Prezoj (sur la ŝtataj fervojoj) po km. (ĝis 150 km.). 1ª kl. 11 ct., 2ª kl. 8 ct., 3ª kl. 5 ct. Por rapidaj 10 % plie. Post 150 km. la prezoj iom malaltiĝas proporcie je la distanco. Interrompo de l'vojaĝo: ĝis 300 km. 1 fojo, ĝis 600 km. 2 fojoj, ĝis 900 km. 3 fojoj, k. t. p. Valoras 1 tagon po 100 km. — Ir-reiraj biletoj: por min. 30 km. rabato da 25 % je la simpla bileto, de 30 ĝis 120 km. 27 ĝis 33 %, pli ol 120 km. 35 %. Tiuj biletoj valoras 1 tagon ĝis 100 km., 2 ĝis 200 km., 3 ĝis 300 km., 4 por pli ol 300 km. Sabate kaj festotage la daŭro estas min. 3 tagoj, dimanĉe 2 tagoj. Interrompo de l'vojaĝo ne permesata. Ir-reiraj biletoj al la italaj banurboj de mezjunio ĝis fino de sept., al la kuraclokoj de mezmajo ĝis fino de nov. valoras 30 tagojn. Daŭro plilongigebla je 10 tagoj kontraŭ pago de 10 %. — Specialaj biletoj:

a) kombineblaj ir-reiraj biletoj, de Torino al Firenze kaj Pisa, de Milano al Firenze kaj Pisa (daŭro 15 tagoj), inter Genova kaj Livorno (daŭro 30 tagoj); interrompo ebla post permeso de l'staciestro; *b)* kombineblaj int. kuponaroj; *c)* biletoj kun kombinebla itineraro, min. 400 km., daŭro, 15 tagoj, ĝis 800 km., 30 ĝis 2.000 km., plidaŭrigeblaj ĝis la duobla kontraŭ alpago de 1 % tage; *d)* specialaj abonoj por difinita vojaĝo; *e)* ordinaraj abonoj po km. aŭ por la tuta ŝtata liniaro. Rapidaj vagonaroj ofte ne havas 3aan kl. Komfortaj vagonoj sur la ĉefaj linioj. Infanoj ĝis 3 j. ne pagas, de 3 ĝis 7 j. la duonon. Kontrolo je la en-kaj eliro, ofte ankaŭ en la vagono. Manpakaĵoj en la vagono; aliaj en la pakvagonon (4-6 ct. po. 100 kg. por 1 km). Pakaĵtenejo 5 ct. po tago kaj pakaĵo (min. 10 ct.). 3ª kl. ĝenerale ne rekomendinda, precipe sur malgrandaj linioj. Rapidaj vagonaroj ofte ne havas ĝin. Manĝovagonoj en gravaj ekspresoj.

Navigado. — Ĉefa societo: *Navigazione Generale Italiana*. Transmaraj servoj oceanaj, mediteraneaj, adriatikaj de la havenoj de Genova, Napoli, Palermo, Messina, Venezia, Ancona, Brindisi, k. t. p. Vaporŝipoj sur la lagoj Verbano, Como, Garda. Komerca ŝiparo: 5.400 ŝipoj kun 1 071 000 t.

Dogano. — La dogano atentas precipe la cigarojn (nur 10 pecoj sendogane enporteblaj), tabakon (26 fr. po km), lukikartojn kaj alumedojn. La vojaĝanto ĉeestu la vizitadon. Kiu eniras provizore en la landon kun ciklo, motorciklo, aŭ aŭtomobilo pagu al la dogano 35 L. por cikloj, 80 L. por motorciklo, 200 ĝis 1.000 L. por aŭtomobilo (laŭ pezo). Se post 6 monatoj la veturilo ne estas reeksportata, la deponita mono estas definitive tenata de la dogano. Specialaj kondiĉoj por Turing-Klubanoj.

Turismo. — Por mallonga vojaĝo en Nord-Italujo la printempo kaj la aŭtuno estas konsilindaj, de aprilo ĝis majo, kaj de mezsept. ĝis okt. Dum vintro, restado ĉe la italaj lagoj kaj en suda Italujo; milda klimato. Marbanejoj vizitataj ĉefe dum julio, kuraclokoj kaj somerfreŝejoj dum aŭgusto. Vintraj sportoj en Alpoj. Gvidistoj (6-10 L. potage), plej ofte tute superfluaj. Vojoj sufiĉe bonaj, precipe proksime de l'grandaj urboj kaj en la Nordo. Itala Turing-Klubo (via Monte Napoleone, 14, Milano). Fotografado interne de monumentoj nur post permeso, facile ricevebla. Ne havu fotografilon apud la Alpaj landlimoj kaj Genova. Legitimaciaj paperoj ne necesaj, sed povas utili.

Hoteloj. — Bonaj en Nord-Italujo, en la Centro kaj en la ĉefaj urboj de l'Sudo se la prezo ne malsuperas 2 aŭ 2,50 L. En multaj urbetoj kaj vilaĝoj oni povas loĝi pli malkare. Elektra lumo en la grandaj urboj. Trinkmono: 20 ĝis 50 ct. tage. Matenmanĝo ordinare ne enkal-

kulata en la prezo de l'ĉambro. Ofte restoracio kunestas. En bonaj restoracioj maten- kaj vespermanĝo kostas 1,50-2,50 L., tagmanĝo 2-3 L. (kun 1/2 botelo da vino). Oni povas ŝpari manĝante en senhotela restoracio laŭkarte. Fremduloj informiĝu antaŭe pri la prezoj se ili ne estas notataj sur la karto. En la ĉefaj hoteloj oni parolas france, angle kaj germane; en la mezaj ofte pli-malpli bone france. — A. Mazzolini, Del. Perugia.

Esperantiaj hoteloj.

Alessandria. — *Hot. d'Europe. — 2,50 L.
Arezzo. — * Hot. la Vittoria. — 2 L.
Bologna. — Hot. Italia, str. Ugo Bassi, 1. — 4 L.
— Hot. Tre Zucchette, str. Canepa, 2. — 2,50 L.
Brescia. — Hot. Brescia. — 2 L.
Cagliari. — * Hot. Scala di Ferro, via Torino, 12. — 3 L.
Capri. — *Hot. Vesuvio, Marina Grande. — 2,50 L. — Pens. 8 L.
Como. — * Hot. Volta. — 3-4 L.
Cremona. — * Hot. Roma, Piazza Roma. — 3 L.
Ferrara. — * Hot. de l'Europe, via Giovecca, 49. — 2,50 L.
Firenze. — Pensiono Cianferoni, Lungarno Accianoli, 2ª. — 3 L. — Sez. (mart-april.) 3,50 L. — Esp.
Fontanafredda ĉe Pordenone. — Hot. Marchesini, Saldan. — 1 L. — Mat., 2 L. — Sez. (jul.-sept.). — Esp.
Genova. — Hot. Bavaria, Piazza Corvetto. — 5 L. (Esperantistoj por 3,50 L.).
Milano. — *Hot. Moderne Meublé*, Piazza del Duomo. Moderna komforto, aŭtomobilo ĉe la stacidomo, ĉambroj de L. 3,50 ĝis 5, po persono, lumo kaj servado kunkalkulataj. — **E. E.**
— Rest. Unione Cooperativa, via Meravighi, 9.
Milano. — Rest. Belvedère, Boccaccio, apud Norda stacidomo.
— Rest. Ristorante Vegetariano di Garzonjo e Brovelli, via Silvio Pellico, 6. — Veg.
Modena. — *Hot. Central, via Posta Vecchia. — 3,50 L.
Napoli. — * Hot. Patria, via Guglielmo Sanfelice, 45-47. — 3,50-4 L.
— * Hot. de Russie, quai de Stª Lucia, 82. — 2,50 L.
Novarra. — Hot. Tre Re. — 2 L.
Padova. — Hot. Aquila nero. — 2 L.
Palermo. — *Hot. Savoie, via Villaermosa, 7. — 4 L.
Pavia. — * Hot. Croce Bianca, Corso Vittorio Emanuel, 51. — 2 L.
Pisa. — * Hot. Nettuno, Lung'Arno Regio. — 3 L.
Roma. — * Hot. d'Orient, Piazza Poli, 7.— 3 L. — Pens. 10 L.
— * Hot. Genève, via Vite, 29. — 3 L.

San Pier d'Arena. — Hot. Ristorante del Centro, piazza Francisco Ferrer. — 2,50 L.
— Rest. Cafè-Latteria, via Nicolo Barabino. — Lakt.
Savona. — * Hot. Torino. — 2,50 L.
Siena. — Hot. La Toscana, Via del Re, 4. — 2 L.
Torino. — * Hot. Tre Corone e Victoria, via Venti Settembre, 41. — 3 L.
— * Hot. du Nord, via Roma, 34. — 3-5 L.
Venezia. — * Hot. Victoria, Calle dei Fuseri. — 4 L.
— * Hot. Bellevue & de Russie, piazza S. Marco. — 3,50 L.
Verona. — Hot. Albergo Ristorante Ferrata, Via Teatro Filarmonico. — 2-2,50 L.

NEDERLANDO

Surfaco. — 32.807 km² (kulturebla 81 %). 11 provincoj. Kolonioj: 2.045.919 km².

Loĝantoj. — 5.950.000 (183 po km²). Kolonioj: 38.000.000.

Lingvo. — Nederlanda.

Religioj. — 56 % protestanta, 35 % katolika, 2 % hebrea, 7 % diversaj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝino: Wilhelmina (n. 1880, r. 1890) 9 respondaj ministroj. Parlamento: unua ĉ. (50 anoj, pere elektataj por 9 j.), dua ĉ. (100 anoj, senpere elektataj por 4 j). Ĉefurbo: Hago.

Armeo. — *Tera:* Dum paco: 42.000. Dum milito: 250.000. Persona servdevo, lotado, servado de 8 1/2 monatoj. *Mara:* 73 ŝipoj kun 440 kanonoj.

Instruado. — Universitatoj en Amsterdam 2, Groningen, Leiden, Utrecht kaj libera universitato (protestanta) en Amsterdam, teknika universitato en Delft. Multaj ĉiuspecaj lernejoj kaj edukinstitucioj. Elementa instruado deviga.

Ekonomio. — Prospera agrikulturo; 2/5 de la kulturebla tero uzata kiel paŝtejo. Granda komerco de butero, fromaĝo, koloniaj produktaĵoj, kaj transira komerco; florkulturado; konstruejoj de marŝipoj kaj maŝinoj, fabrikoj de alkoholaĵoj. Importo: 3,265,000,000 Gld.; eksporto: 2,632,000,000 Gld.

Monsistemo. — Guldeno [floreno] (0,825 Sm)=100 cendoj Bankbiletoj de la Nederlanda banko: 10, 25, 40, 60, 100, 200, 500, 1.000 guldenoj. Oraj moneroj: 10 guldenoj (post 1912 ankaŭ 5). Arĝentaj: 0,10, 0.25, 0,50, 1, 2,50 guldenoj. Nikelaj : 0,05. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj komunumoj. Poŝtmandatoj (ricevo de la mono en la oficejo); respondkuponoj; poŝta ŝparkaso. Interna afranko: let. ĝis 20 gr. 5 cendoj (loke 3); pk 2 1/2 c. (loke 1); pres. 2 1/2 c. po 50 gr. Telegrafo: por 10 vortoj aŭ malpli 25 c., por ĉiuj 5 vortoj pl. 5 ĝis 50 vortoj, poste por ĉiuj 10 vortoj pli 5 c. — Telefono: multe da publikaj telefoniloj, uzado en la urboj 10 c., de urbo al alia 40 c. po 3 minutoj.

Fervojoj. — 3.400 km. plejparte ŝtataj sed ekspluatataj de privataj kompanioj (S. S ; H. Y S. M. ; N. C. S ; N. B. D. S.). — Tarifoj egalaj ĉe ĉiuj kompanioj. Prezoj po km. 1ª kl. 3 c., 2ª kl. 2 1/4 c ; 3ª kl. 1 1/2 c. Ir-reiraj biletoj nur por malgrandaj distancoj kaj ne por ĉiuj vagonaroj. Karavanoj vojaĝas pli malkare sub jenaj kondiĉoj : ir-biletoj, nur 2ª kaj 3ª kl., min. 25 km. kaj 10 personoj 2 cendoj po km. en 2ª kl., 1 1/4 c. en 3ª kl. Ir-reiraj biletoj, 1ª, 2ª, 3ª kl, min. 20 personoj, 50 % de la irprezo. Specialaj biletoj : *a*) rondvojaĝoj kun kombineblaj int. kuponaroj laŭ kilometra takso ; *b*) abono, uzota inter du samaj stacioj aŭ sur certa parto de la liniaro, daŭro de 1 ĝis 12 monatoj, garantio da 5 G. redonota post fino de l'abono ; *c*) rabatbiletoj por infanoj vizitantaj apudurban lernejon ; *d*) dum julio-sept. libertempaj kuponoj, sen interrompo de vojaĝo ; prezo 1ª kl. 4 G., 2ª kl. 3, 3ª kl. 2 ; *e*) kilometraj kartoj, konsistantaj el parto por iro kaj parto por reiro ; 2 personoj povas samtempe vojaĝi per 1 karto ; prezo 1ª kl. 12 G., 2ª kl. 9, 3ª kl. 6. Infanoj nenion pagas ĝis 4 j , la duonon de 4 ĝis 10 j. Bicikletoj al ĉiuj stacioj 20 cendoj. Pakaĵoj po 10 kgr. 10 c. por 50 km ; 13 c. por 75 km., 15 c. por 100 km., ktp. 3ª klas rekomendinda. Nur la internaciaj vagonaroj ne havas ĝin.

Navigado. — Ĉefaj havenoj : Rotterdam (9 360 ŝipoj en 1912) ; Amsterdam (2.360 ŝipoj en 1911). Regula servo al Hindujo, Ameriko, Anglujo, k. t. p.

Turismo. — Somera sezono de junio ĝis septembro. Banlokoj ĉe la Norda maro Scheveningen, Zandvoort, Egmont, Oostvoorne, k. t. p. — Bonaj vojoj por bicikloj kaj aŭtomobiloj, ĉie estas vojmontriloj. Turisma ligo (A. N. W B.) 25.000 membroj. Ideala lando por ekskurso per motorboato. — Doganvizitado nesevera — Esp. gf. en Gravenhage (Hago) Esp. gvidlibro en Haarlem.

Hoteloj. — Dum la sezono ili estas ofte plenegaj ; oni do ĉiam

mendu antaŭe. Preskaŭ ĉiuj hoteloj estas puraj kaj komfortaj ; kutime oni prenas la matenmanĝon en la hotelo ; pri la aliaj manĝoj oni estas libera. La prezo de bona ĉambro kun matenmanĝo estas min. 2 guldenoj. Trinkmono al la ĉambristinoj, pordisto kaj liftoknabo. Senalkoholaj kaj vegetaraj restoracioj nur en la grandaj urboj. La vino estas kara ; biero estas bona kaj nekara. Kafejoj kaj restoracioj malfermataj ĝis la unua nokte, ankaŭ dimanĉe. La prezo de lunĉo estas 60-80 cendoj, de tagmanĝo 1,50-2 guldenoj. En la hoteloj oni ĝenerale parolas angle, germane kaj france — P.-J. VERMAAS, Del. Rotterdam.

Esperantiaj hoteloj.

Amsterdam. — * Hot. Hest. Haasje, Beursstraat, 63. — 2 fl.
Delft — * Hot. Lubrechts. — Mat. 2 fl.
Dordrecht. — * Hot. Bellevue, Boomstraat, 25. — 1,50 fl.
Gravenhage. — Hot St-Joris, Wagenstraat, 100/102. — 2 fl.
— Hot. kaj Rest. Pomona, Molenstraat, 53. — Veg.
— Filioj de laktejoj de « Landbonn » kaj de « Pierkau » en la tuta urbo. Malkaraj.
Haarlem. — Stations Hot., Stationsplein, 2. — 2,50 fl. — Mat. 2,75 fl.
— Rest. « de Sierkau », Hklweg, 100.
Hago. — Vidu *Gravenhage*.
Hilversum. — Hot. Gooiland, Emmastraat. — Mat. 1,75 fl. — Sez. (jun -sept).
Leiden — * Hot. Central. — Mat. 1,50 fl.
Maastricht — * Hot. Derlon. — Mat. 2 fl.
Rotterdam. — Grand Hot. Coomans, Hooftsteeg. — Mat. 2 fl.
— Hot. Metropol (por laboristoj), Schiedamsche Dyk, 51. — Mat. 1 fl.
— Rest. Pomona, Nieuwe Havensteeg, 5. — Veg.
Tilburg. — * Hot. de Gouden Appel. — Mat. 1,75 fl.
Utrecht. — Hot. de l'Europe, Vreeburg. — Mat. 1,75 fl.
— Rest. Pomona, Catharijne Singel. — Veg.

NORVEGUJO

Surfaco. — 323.000 km² 20 distriktoj.
Loĝantoj. — 2.392.000 (70 po km²).
Lingvo. — Norvega.

Religioj. — 92 % protestanta.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo : Haakon VII (n. 1872, r. 1905). 8 respondaj ministroj Parlamento : Storthing (123 anoj senpere elektataj por 3 j.). Virinoj havas voĉdonrajton. Ĉefurbo : Kristiania.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 30.000. Dum milito : 110.000. *Mara :* 59 ŝipoj, kun 250 kanonoj kaj 1.300 homoj.

Instruado. — Tre bonaj popollernejoj en la urboj kaj ankaŭ en loĝata kamparo En la urboj mezlernejo, gimnazioj. En Kristiana faklernejoj kaj universitato. En Trondhjem teknika universitato.

Ekonomio. — Ekspluatado de la ligno Fer-kaj kupraj minoj. Ĉefa industrio estas fiŝkaptado (moruo, haringo), tre grava. Ĉefaj eksportaĵoj : fiŝoj, moruoleo, ligno, alumedoj, butero. Importo : 495.000.000 Kr. ; eksporto : 325.000.000 Kr.

Monsistemo. — Laŭ Skandinava Unuiĝo. (1 krono (55 sd) = 100 oere). Biletoj de Norvega Banko : 5, 10, 20, 50, 100, 500, 1.000 kr. Oraj moneroj : 5, 10, 20 kr. Arĝentaj : 10, 25, 50 oere, 1, 2 kr. Bronzaj : 1, 2, 5 oere. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiu urbeto ; poŝtmandatoj ; int. respondkuponoj ; poŝta enkasigo. Interna afranko : let. ĝis 20 gr. 10 oere (enurbe 5); pk. 5 (enurbe 3) ; pres. 3 ĝis 20 gr., 5 ĝis 125 gr. — Telegrafo : 5 oere po vorto (min. 50 oere). — El diversaj stacioj radiotelegramoj al ŝipoj en Norda kaj Glacia Maro. — Telefono : diversaj tarifoj laŭ distanco. El Kristiana oni povas telefoni al Svedujo, Danujo, Hamburgo, ktp.

Fervojoj. — 3.085 km. plejparte ŝtataj. Prezoj po km : ordinaraj vagonaroj, 1ª kl. 6,5 oere, 2ª kl. 5, 3ª kl. 3,25 ĝis 50 km ; 6,5 ; 5 ; 3 de 50 ĝis 150 km ; 6,5 ; 4,4 ; 2,75 de 150 ĝis 300 km ; 6,5, 4, 2,5 pli ol 300 km. ; alpago da 10-20 % por rapidaj. Ir-reiraj biletoj 50 % pli ol la simplaj ; valoras 3 monatojn. Specialaj biletoj : *a*) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kun aliaj ŝtatoj ; *b*) rondiraj biletoj kun fiksita itineraro ; *c*) monataj abonoj. Infanoj nenion pagas ĝis 3ª j., la duonon ĝis 15ª j. Ĉiu bileto rajtigas je 25 kgr. da pakaĵo senpage. Por personoj de sama familio oni kalkulas 25 kgr. senpage po persono, eĉ se estas komuna kofro. Por pli ol 25 kgr. 3 oere po kgr. ĝis 100 km, 4 de 101 ĝis 200, 5 de 201 ĝis 300, ktp. 3ª kl. komforta, troviĝas ankaŭ sur rapidvagonaroj. Manĝovagonoj sur la ĉefaj vagonaroj ; alkoholaĵoj ne permesitaj.

Navigado. — De Hamburg al Kristiansand kaj laŭlonge la marbordo al Vadsoe apud Varangerfjorden ; de Warnemünde tra Danujo kun fervojo aŭ vaporŝipo al Kristiania ; ankaŭ de Sasznitz-Trelleborg trans Svedujo fervojo al Kristiania. De Kristiania vaporŝipoj ĉiutage laŭlonge la marbordo via Kristiansand, Stavanger, Bergen, Trondhjem ; belega turistvojo kun meznokta suno. De Kristiania fervojo al Bergen ; belega veturo trans la montoj. De Kristiania multe da vojoj per specialaj vaporŝipoj al Anglujo, Amerika, Hamburg, Mediteraneo, ankaŭ de Bergen al Nederlando, Anglujo, k. t. p. Komerca ŝiparo : 3.000 ŝipoj knn 1.500.000 t.

Turismo. — Somera sezono de junio ĝis septembro. Sur diversaj vojoj oni havas fiksajn aranĝojn por aŭtomobiloj. Cetere fremduloj ne ankoraŭ konvene povas uzi aŭtomobilojn Vintra sezono de januaro ĝis majo. Multe da kuroj por neĝglitiloj en Kristiania, Drammen, Lillehammer kaj Trondhjem k. t. p. Kurioze amuzanta estas la mezsomera kuro por neĝglitiloj sur Finse, stacio de fervojo Bergen-Kristiania. Oni skribu al la direkcio por la « Turistforeningen » Kristiania.

Hoteloj. — Hoteloj ekzistas je ĉiuj prezoj sur la ĝenerale uzataj turistvojoj. La prezoj estas diversaj ; oni devas kalkuli kun granda ŝparado 10 kr. potage kaj pli riĉe 20 ĝis 25 kr. potage kun vojaĝbileto.

Esperantiaj hoteloj.

Bergen. — ' Hot. Norge. — 2,50 Kr.
Kristiania. — Hot. Augustin, Toldbodgaten, 24. — 2 Kr. (nenia trinkmono, servado 10 %).
— Hot. Hospitset., Rosenkrantzgaten, 1. — 2 Kr. (nenia trink mono, servado 10 %.
— Rest. Kaffistova aat Bondeungdomslaget.
Stavanger. — ' Hot. Valbjerggaten. — 2-50. 3 Kr.
Trondhjem. — ' Hot. Britannia. — 2 Kr.

PORTUGALUJO

Surfaco. — 88.740 km. Insuloj : 3.203. Kolonioj : 2.079.566, 17 kontinentaj, 4 insulaj distriktoj.

Loĝantoj. — 5.423.000 (61 po km). Insuloj : 410.000. Kolonioj : 9.080.000.

Lingvo. — Portugala.

Religioj. — Plejparte katolika. Kelkaj protestantoj kaj hebreoj. Libereco por kultoj.

Registaro. — Parlamenta respubliko. Prezidanto: M. de Arriaga (n. 1840, r. 1911), elektata de la Parlamento por 4 j., ne reelektebla, 8 respondaj ministroj. Parlamento: Senato (71 anoj por 6 j.), Ĉ. de Deputatoj (165 anoj elektataj de la popolo por 3 j.). Ĉefurbo: Lisbono.

Armeo. — *Tera*: 1ª klaso, 96.000; 2ª klaso, 96.000; 3ª klaso, 168.000. 8,000 ĉevaloj, 360 kanonoj. Gvardio respublikana (militista polico): 6.000. Kontrola gvardio (polico de kontrolo en la landlimoj): 4.000. *Mara*: baldaŭa reorganizo kiu kredeble starigos 3 ŝiparojn.

Instruado. — Unuagrada instruado deviga por ĉiuj infanoj 6-12 j. Duagrada instruado liverata en la liceo de ĉiu distrikta ĉefurbo. Supera instruado en la universitatoj de Lisbono, Porto kaj Coimbra kaj teknika instruado en la industriaj kaj komercaj institutoj, normalaj lernejoj, akademioj de belartoj de Lisbono kaj Porto, Agrikultura Lernejo de Coimbra kaj Kolonia Lernejo de Lisbono. Multaj ĉiuspecaj privataj lernejoj kaj edukinstitucioj.

Ekonomio. — Sufiĉe prospera agrikulturo. Eksporto de vinoj, korko, fruktoj, nutraĵoj en konservo kaj ĉapeloj. Prospera industrio de fiŝĉasado, eltiro de salo, kotono, silko kaj lano. Minejoj de kupro, antimono, plumbo, mangano, fero kaj ŝtonkarbo. Ŝtonminejoj de alabastro, marmoro kaj ardezo. Mineralakvoj. Eksporto: 30 milionoj. Importo: 49 milionoj.

Monsistemo. — Laŭ nova sistemo: 1 eskudo (Sm 1,12) = 100 centavoj. Biletoj de la nacia banko: 5, 10, 20, 50, 100 eskudoj. Oraj moneroj; po 1, 2, 5, 10. Arĝentaj: cent. 10, 20, 50, 100. Laŭ la malnova sistemo, la ĉefa unuo estas la milrejso, kiu enhavas saman orpezon kiel la nuna eskudo. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en urboj kaj urbetoj. Servo de poŝtmandatoj, respondkuponoj, malgrandaj pakaĵoj. Interna afranko: let. 2 1/2 cent. ĉiu 20 gr.; pk. 1 cent.; pres. kaj specimenoj sen valoro 1/2 cent. ĉiu 50 gr. — Telegrafo: po vorto 0,2 cent. enurbaj, 1/2 cent. informaj, 1 cent. por la kontinento. — Telefono: kompanioj en la ĉefaj urboj, 6 cent. po 5 min.

Fervojoj. — 3.052 km (1.148 ŝtataj, 97 km en konstruado). Prezoj tre diversaj laŭ la kompanioj. Ekzistas 3 klasoj, escepte en rapidaj kaj luksaj vagonaroj. De julio al oktobro rabatoj por biletoj al banlokoj. Favorkondiĉoj por lernantoj, laboristoj, kongresoj kaj festotagoj. — Specialaj biletoj: *a*) kombineblaj int. kuponaroj; *b*) kombineblaj kuponaroj por enlandaj rondvojaĝoj; *c*) ĝeneralaj abonoj kiuj rajtigas al nelimigata uzo de ĉiuj linioj de sama kompanio; *d*) abonoj kiuj rajtigas al nelimigata uzo ĝis difinita loko. Infanoj ĝis 3ª j. nenion pagas; ĝis la 7ª la duonon. Senpage

estas kunpreneblaj 30 kgr. da pakaĵoj. La resto iras en la pakvagonon. En ĉiuj vagonaroj troviĝas necesejo kaj en kelkaj stacidomoj privataj necesejoj po 3 cent. Kontrolo de la biletoj en la vagono kaj stacidomo. 3ª klaso ne rekomendinda.

Navigado. — 3 grandaj naciaj kompanioj kun veturoj al la diversaj kontinentaj marhavenoj, portugalaj kolonioj kaj Ameriko. Ĉirkaŭ 50 reprezentantoj de fremdaj kompanioj per kies ŝipoj estas faritaj vojaĝoj de Portugalujo al ĉiuj marhavenoj. Ĉefaj havenoj: Lisbono kaj Leixoes kun granda movado. Komerca ŝiparo: 572 ŝipoj (94 vapor-) kun 167.500 t.

Turismo. — Plej bona sezono por ekskursoj estas la vintro en la centro kaj sudo, aŭtuno en la nordo. Informoficejo en Lisbono. Legitimaciaj paperoj ne devige necesaj, sed konvenas ilin porti. Konvenas antaŭkonsenti ĉiam pri la prezoj en la luado de veturiloj kaj akcepti gvidantojn nur laŭ konsilo de la vojaĝoficejoj aŭ de la Societo por Propagando pri Portugalujo (rue Garrett, 103, Lisbono). Turistaj aŭtomobiloj kaj bicikletoj ne pagas imposton sed bezonas permeson por 6 monatoj donatan en la doganoj. Plej granda permesata rapidiro 30 km. pohore ekster loĝataj lokoj 10 interne. Vojoj mezbonaj. Turisma industrio en komenco. Vidindaj lokoj: Lisbono, Porto, Coimbra, Bon-Jesus, en Brago, Bussaco, Alcobaça, Thomar, Batalha, Gerez, Lerra da Estrêla.

Hoteloj. — Ekzistas je ĉiuj prezoj; puraj kaj komfortaj. Prezoj de 1 eskudo. La prezoj enkalkulas ĉambron, lumon, *matenmanĝon* je la 10ª-12ª horo kaj *vespermanĝon* je la 17ª-20ª. Kelkaj ankaŭ enkalkulas vinon, aliaj ne. Trinkmono: 10 %. Vegetaraj restoracioj ne ekzistas. En preskaŭ ĉiuj hoteloj oni parolas france kaj angle; en la gravaj ankaŭ germane kaj hispane. — B. MARTINS D'ALMEIDA, Del. Lisbono.

Esperantiaj hoteloj.

Coimbra. — * Hot. Avenida. — Pens. 1.200 rejsoj.

Lisboa. — Hot. Americano, rua do Principe, 37. — Pens. 1.000 rejsoj.

— Rest. Nutricia, rua Aŭgusta, 233 (kaj filioj). — Lakt.

Porto. — Hot. Universal, rua Sa da Bandeira. — Pens. 1.100-1.600 rejsoj.

RUMANUJO

Surfaco. — 138 000 km. (kulturebla 70 %). 32 distriktoj.

Loĝantoj. — 7.360.000 (53 po km.).

Lingvoj. — Rumana.

Religioj. — 91 % ortodoksa, 3 % katolika kaj protestanta, 5 % hebrea, 1 % diversaj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo: Karlo I[a] (n. 1839, r. 1869). 9 respondaj ministroj. Parlamento: Senato (110 anoj, por 8 j.); Ĉambro de Deputatoj (183 anoj, por 4 j.). Voĉdonrajtaj regnanoj: 100.000 por la Ĉambro, 25.000 por la Senato. Ĉefurbo: Bukareŝto.

Armeo. — *Tera:* Dum paco: 98.000. Dum milito: 310.000. Deviga militservo dum 2 j. (artilerio 3 j). *Mara:* 31 ŝipoj kun 101 kanonoj.

Instruado. — 2 Universitatoj (Bukureŝti kaj Iaŝi), 179 superaj lernejoj diversaj, 4.565 unuagradaj lernejoj.

Ekonomio. — Agrikulturo, brutedukado, petroleksploatado. Eksporto de cerealoj, petrolo, lignoj, brutoj, salo. Industrio ne grava, precipe tanejoj, alkoholfabrikoj, petroldistilado, muelejoj. Kelkaj karbminejoj kaj riĉaj salminejoj. Importo: 409 milionoj; eksporto: 616 milionoj.

Monsistemo. — 1 leu (40 sd.) = 100 bani. Biletoj de la nacia banko: 20, 100, 1,000 lei. Oraj moneroj: 50, 100 lei. Arĝentaj: 50 b., 1, 2, 5 lei. Nikelaj: 5, 10, 20 b. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj urboj kaj plej ĉefaj vilaĝoj; servo de poŝtmandatoj kun alporto de mono hejmen; int. respondkuponoj. Interna afranko: let. 15 b. ĝis 15 gr. (enurbe 10 b.); pres. 3 b. por ĉiu 50 gr. — Telegrafo: 5 b. po vorto, min. 25 b., la adreso estas kalkulata kiel 2 vortoj.

Fervojoj. — 3.473 km. kun normala larĝo, apartenantaj al la ŝtato. Nur tre malmultaj privataj. Rabato da 25, 50, eĉ 75 %, okaze de kongresoj, ekskursoj, festoj. Prezo po km (rapidaj): 1[a] kl. 0,136, 2[a] 0.096, 3[a] 0.064; (nerapidaj) 0.112, 0.08, 0 056. De 1[a] jun. ĝis 30 sept. oni liveras individuajn biletojn, dimanĉe kaj festotage, por specialaj « plezurvagonaroj » ir-reire kun 50 % rabato, por ĉiuj kl., de la plej ĉefaj stacioj al la klimat- aŭ banlokoj. Duonprezaj biletoj ir-reiraj nur por banlokoj. Abonoj sur ĉiuj vojoj je favoraj prezoj, por 3, 6, 12 monatoj; dum jul.-aŭg. por 1 monato. Infanoj ĝis 4 j. ne pagas, la duonon ĝis 11 j. 3[a] kl. ne rekomendinda; ne trovigas sur ekspresoj. Manĝovagonoj nur en ekspresoj.

Turismo. — Sezono de junio ĝis sept. por la klimatlokoj kaj montaro. Farindaj ekskursoj sur valoj de Prahova, Teleajen, Olt, k c. Klimatlokoj: Sinaia, Slanic, Campu-Lung, Buŝteni, Azuga. Banlokoj: Govora, Calimaneŝti, Monteoru, Lacu Sarat, Constantza (marbanejoj). Fremduloj ĉiam bezonas pasporton je la landlimo. — Dogano tre severa. (Permesata nur tabakpakaĵeto malfermita).

Hoteloj. — Ĉiugradaj kaj ĉiuprezaj hoteloj. La malgrandaj ne estas rekomendindaj. Meza prezo: 3-4 fr. Ne deviga manĝo ĉe la hotelo. La prezoj kalkuligas sen manĝo. Restoracioj preskaŭ en ĉiu pli granda stacidomo. Senalkoholaj kaj vegetaraj restoracioj malmultaj. Trinkmono por la ĉambristino kaj pordistoj rekomendata. En preskaŭ ĉiuj hoteloj oni parolas ankaŭ germane, france ka eĉ angle.

Esperantiaj hoteloj

Bukarest. — Hot. Regina, Calea Rahovei, 3,50 fr.
Craïowa. — * Hot. Minerva. — 3 fr.
Galatz — * Hot. Bristol. — 3 fr.
Jaŝi. — Hot. Trajan, Pl. Unio. — 2,50 fr.
— Lakt. Joan Dimitriu, Pl. Unio.

RUSUJO

Surfaco. — 4.889.060 km. 96 gubernioj eŭropaj. Azia Rusujo: 16.857 080.

Loĝantoj. — 137.000 000. (25 po km.). Azia Rusujo: 28.900.000. *Nacioj:* Grandrusoj, 67 milionoj; Ukrajnanoj, 25; poloj, 9,1; blankrusoj, 6,2; hebreoj, 5,8; kirgizoj, 4,7; tataroj, 4,2; baŝkiroj, 1,6; germanoj, 2; latvoj, 1,5; kaŭkazanoj, 1,5; litovoj, 1,3; armenoj, 1,3; moldavanoj, 1,2; mosdvanoj, 1; estoj, 1; diversaj, 3.

Religioj. — 67 % ortodoksoj; 11 % katolikoj; 5 % protestantoj; 3 % hebreoj; 2 % ortodoksaj sektanoj; 11 % mahometanoj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Imperiestro (Caro): Nikolaj II (n. 1868, r. 1894). 13 ministroj. Reprezentantaro: Regna Konsilantaro (anoj duone elektataj de la imperiestro, duone de nobelaro, zemstvoj (= landodistriktoj posedantaj limigitan memstarecon pri lokaj aferoj), universitatoj, komercistaroj); Regna Deputataro (= Duma, 442 anoj pere elektataj por 5 j.). Ĉefurbo: Peterburgo.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 1 384.000. Dum milito : 4.000.000. Militservo : 3 j. Por personoj posedantaj regnan ateston pri fino de meza instruado : 2 j. — *Mara* · 407 ŝipoj je 602 t. kun 2 600 kanonoj.

Instruado. — 10 universitatoj kun 32.000 studentoj (Peterburgo, Moskvo, Kievo, Ĥarkov, Odessa, Kazanj, Varsovio, Jurjev, Tomsk, Saratov); 23 aliaj altaj lernejoj, 19 teknikaj, 6 terkulturaj, 1 belarta, 82 por instruistoj, 243 por pastroj. Popola instruado ne deviga. Analfabetuloj : 77 %. — Esp. universitata gf. en Peterburgo.

Ekonomio. — Precipe terkultura kaj arboriĉa lando. Eksportas ĉefe grenojn, lignon, linon, buteron, nafton, ovojn kaj aliajn krudajn produktaĵojn. Importo : 1.022.000.000 r. Eksporto : 1.513 000 000 r. Komerca ŝiparo : 3,450 ŝipoj kun 400.000 t.

Monsistemo. — 1 rublo (1,06 Sm) = 100 kopekoj. Kreditbiletoj : 3, 5, 10, 25, 50, 100, 500 rubloj. Oraj moneroj : 5, 10 rubloj. Arĝentaj : 5, 10, 15, 20, 50, 100 kop. Kupraj : 1, 2, 3, 5 kop.

Mezuroj. — La metra sistemo estas oficiale alprenita, tamen funkcias plejparte lokaj, komplikaj, nedecimalaj mezursistemoj, malsamaj por liniaj kaj volumaj mezuriloj. Jen la ĉefaj : *Longo :* 1 versto = 500 klaftoj = 10 668 km. 1 klafto = 7 futoj. 1 futo = 12 coloj. 1 klafto = 3 arŝinoj. 1 arŝino = 16 verŝokoj. — *Surfaco :* 1 desjatino = 2,400 klaftoj^2 = 1.092 hektaroj. — *Volumo :* 1 vedro = 1/40 boĉka = 10 ŝtofoj = 12 3 litroj. — *Pezoj* : 1 pudo = 40 funtoj = 16,38 litroj.

Poŝto. — Servo de poŝtmandatoj kun alporto de la mono al la domo en grandaj urboj, paga po 10 kop. por mandato; interna afranko : let. 7 kop. (ĝis 13 gr.) (enurbe 3 kop.), pk. 3 kop. — Telegramo : 5 kop. po vorto (min. 15). — Interurbaj telefonoj tre malmulte disvastigataj.

Fervojoj. — 67.000 km. plej parte ŝtataj. Tarifo diferenciala, t.e. ju pli granda distanco, des pli malalta poversta prezo (1 versto = 1.067 km.). Prezoj po versto : ĝis 170 verstoj, 3ª kl. 1 1/2 kop, de 161 ĝis 300 verstoj 2,40 kop. + 1 kop. poverste ; 2ª kl 1,5 — obla ; 1ª kl. 2,5-obla kompare kun la 3ª kl. Ir-reiraj kaj sezonaj biletoj nur por ĉirkaŭurbaj zonoj Rondvojaĝaj biletoj haveblaj. Vagonaroj : simplaj pasaĝeraj, haltantaj ĉe ĉiu stacio ; rapidaj (skorij) haltantaj nur ĉe grandaj stacioj sed kun 3ª kl kaj ofte manĝovagono ; kurieraj, nur kun 1ª kaj 2ª kl., haltantaj nur ĉe la plej grandaj stacioj, ĉiam manĝovagono. Krom tio cirkulas la luksaj transsiberiaj kaj internaciaj ekspresoj. Por rapidaj kaj kurieraj alpago por la rapideco kaj plie por aparta kuŝloko (plackarto) : 3ª kl. 0,75 rub ; 2ª kaj 1ª kl. 1,50 rub Infanoj ĝis 5 j. ne pagas, de 5 ĝis 10 j. nur 1/4. — Daŭro de biletoj : 1-200 verstoj, 24 horoj ;

201-500 v., 48 h. ; 501-800, 72 h. ; 801-1.100 v., 96 h., 1.101-1 500 v , 120 h. ; 1 501-1900, 144 h. ; 1901-2.300 v., 168 h. — La 2ª kl. en rapidaj (ne kurieraj) vagonaroj rekomendinda. Ankaŭ la 3ª kl. en la nomitaj vagonaroj estas uzebla, precipe en la fakoj por nefumantoj. Iliaj kuŝlokoj estas komfortaj ; manĝovagonoj viziteblaj por ĉiuj klasoj (tagmanĝo 1,25-1,50 rub). En la kuriervagonaroj la alpago por la rapideco estas alta. Rondiraj biletoj rimarkinde malaltigas la vojaĝprezon.

Turismo. — Krom la vizitado de Varsovio, Peterburgo, Moskvo, Kievo, Odesso, jenaj vojaĝoj prezentas specialan intereson :

1° La suda marbordo de Krimeo inter Sebastopolo kaj Teodosio, proksimume 110 km. Plej rimarkindaj lokoj : Alupka, Jalta kaj ĉirkaŭaĵoj. Vojaĝo ŝipe, kaleŝe kaj aŭtomobile.

2° La nordorienta marbordo de la Nigra Maro : de Jalta al Novorosijsk vaporŝipe 18 h. Kaŭkaza marbordo inter Novorsijsk kaj Batum.

3° Suda Kaŭkaza fervojo inter Batum kaj Tifliso : 14 horoj.

4° Strategia-Kartvela ŝoseo inter Tifliso kaj Vladikaŭkazo kaj la Kaŭkazaj Mineralaj Akvoj.

5° Sur-Volga vojaĝo vaporŝipe. La pasaĝeraj vaporŝipoj cirkulas inter Tver kaj Astrananj (3.400 km.). La tuta vojaĝo daŭras 8 1/2 tagojn. La vojaĝo inter Tver kaj Astrahanj estas rekomendinda en aprilo kaj majo, ĉar en la aliaj monatoj la komunikado estas interrompata, pro nesufiĉa profundeco de la akvo.

6° Sur-Kama vojaĝo vaporŝipe. De Nijnij-Novgorod ĝis la enfluo de Kama en Volga kaj de tie ĝis Perm (1.460 klm) ; daŭro 4 tagoj.

7° Transsiberia fervojo. De Londono al Vladivostok, daŭro 12 tagoj, kosto en la 1ª kl. de kuriera vagonaro proksimume Sm. 500. — Esp. gf. en Kiew, Kotka, Moskvo, Peterburgo, Rostov-n. — D. Saratov, Varsovio, Višnij-Voloĉok, Vladivostok.

Dogano. — Tre severa Altaj doganpagoj por tabako (99 cigaroj senpage), alkoholajoj, vestoj, puntoj, ŝtofoj. Povas eniri Rusujon nur posedanto de pasporto, kontrolata ĉe la landlimo kaj visota ĉe ĉiu haltloko, kie oni pasigas nokton.

Hoteloj. — Prezo inter 1 kaj 2 rubl. por ĉambro sen matenmanĝo. Prezo kaj kvalito de nutrado tre malsamaj ; oni do vizitu nur la rekomendatajn restoraciojn. En restoracioj tagmanĝo, sen alkoholajoj, kostas de 50 kop. ĝis 2,25 rubl. Ŝatataj rusaj manĝaĵoj : ŝĉisupo kun multe da brasiko kaj aliaj legomoj, manĝata kun kruda acida kremo ; borŝĉ (barĉo), supo el betoj ; una-fiŝa supo, blini farunaj maldikaj, rostitaj patkukoj, manĝataj kun kaviaro, porkido sub krena saŭco, rastjagajkuko kun farĉo el fiŝo, rizo, ovoj. Trinkmono : 10 %.

Esperantiaj hoteloj.

Astraĥan. — Moskovskie nomera, Moskovskaja — 1,50-2 rbl.
Baku. — Grand Hotel, Zalaevski proezd. — 2 rbl
Baku. — Rest. Moloĉnaja Germania, Ĉiljaevskaja ulica. — Lakt.
Batum. — Hot. Bel-vju, Naberejnaja ulica. — 2 rbl.
— Rest. Svejcaria, Dondukovo, Korsakovskaja. — Lakt.
Dorpat. — Hot. Belle-Vue, Rathausstr, 2. — 1,50 rbl. — Esp.
— Rest. Wiener Café, Johannistr. — Lakt.
Ekaterinodar. — Hot. National, Ekaterininskaja, 22. — 1-5 rbl.
— Rest. Bujukjane, Krasnaja ĉe Ekaterininskaja. — Lakt.
Ĥarkov. — Hot. Metropol, Puŝkinskaja, 1. — 2 rbl.
— Rest. Vegetarana manĝejo, Sumskaja, 6, kaj Kontorskaja, 9. — Veg.
Irkutsk. — Hot Central, Bolŝaja ulica, ugol Amurskoj. — 2 rbl.
— Rest. Moloĉnaja Kvatkina, Bolŝaja ulica. — Lakt.
Kalisz. — Hot. Eŭropa, Marjanska (Hot. Eŭropejski). — 2 rbl.; Sez. (1 okt.-15 dec., 15 jan.-15 febr.) iom pli altaj prezoj.
Kazan. — Hot. de Sĉetinkin, Prolomnaja. — 1,50-2 rbl.
Kiŝinev. — Hot. Svejcarskaja, Aleksandrovskaja. — 1,50-3 rbl.
— Hot. London, Puŝkinskaja. — 1,50-3 rbl.
— Hot. Savoja, ul. Ŝmidta. — 1,50-3 rbl.
— Lakt. Tumanov, Aleksandrovskaja. — Lakt.
Kiew. — Hot. François, Fundukleevskaja. — 1,50 rbl.
— Lakt. Centra Laktejo, Kreŝĉatik, 33.
— Rest. Vegetara, Puŝkinskaja, 10. — Veg.
Kovno. — Hot. Levinson, Nikolaevskij prosp. — 1,50 rbl.
Kursk. — Hot. Metropol, Troickij per., dom. Waŝĉenko. — 1-3 rbl.
— Lakt. Seleznev, Moskvoskaja.
Libau. — Hot. Peterburg, Grossestr. — 1-5 rbl.
Lodz. — Hot. Savoy, Krotka, 6 — 2,50 rbl. — Esp.
— Rest. Vegetara, Zielona, 3. — Veg
Loviĉ. — Hot. Bielorus, Stari Rinek, 3. — 2 rbl.
Lublin — Hot. Saski, Krakowskie przedmiescie. — 2 rbl.
— Rest. Mleczarnia Bystrzyzd, Gubernatorska.
Moskvo. — Hot Continental, Teatralnaja ploŝĉad. — 1,50 rbl.
— Rest. de Moskva vegetara societo, Gazetinj pereulok, 12. — Veg.
Odessa. — Hot. Imperial, Deribasovskaja, 2. — 1,50 rbl.
— Rest. Vegetara rest., Riŝelevskaja, 17. — Veg.
Orenburg. — Centralnaja gostinica, Nikolajevskaja. — 2 rbl.
Peterburgo. — Hot. d'Europe, Minajlovskaja. — 3 rbl.
— Hot. Belle-Vue, Morskaja. — 1,50-2 rbl
— Hot. Victoria, Kazanskaja, 29. — 1,50 rbl.
Piotrkow. — Hot. Polski, Zelazna. — 1,50 rbl.

Revel. — Hot. Kuldlowi, Harju nulits. — 2 rbl
— Rest. Soome söögimaja, Wiru uulits, 14.
Riga. — Hot. de Romo, Teatra bulv., 5. — 1,50-2 rbl.
— Hot. de Peterburgo, Zamkovaja ploŝĉad. — 1,50 rbl.
Rostov. — Hot. Europa, Bolŝaja Sadovaja, 58. — 2-5 rbl.
Saratov. — Hot. Rossija, Nemeckaja ulica. — 1-10 rbl.
— Hot. Nomera Tjurina, Nemeckaja ulica. — 1-5 rbl.
Stavropol. — Centralnaja Gostinnica, Aleksandrovskaja. — 1,50 rbl; Sez. (majo-aŭg.) Ĉambro por monato havebla ĉe la Delegito.
Varsovio. — *Hot. Victoria*, Jasna, 26. — 1,50-2 rbl. — E. E.
— Rest. Switczianka, Nowo-Senatorska, 8. — Veg. Lakt.
Vilno. — Palas Hot., Bolŝaja ulica, 73. — 2 rbl.
— Rest. (la sama). —
Vladikaŭkaz. — Grand Hot., Aleksandrovskij prospect. — 1,50 rbl.
— Rest. Konfitejo de Ĥasijeva, Aleksandrosvkij prospect. — Lakt.
Voronej. — Centralnaja Gostinnica, Boljŝaja Dvorjanskaja. — 2 rbl.
— Rest. Samofalovskoje Otdjelenije Djetskago Prijuta. — Staraja Moskovskaja, dom Djetskij Prijut.

SERBUJO

Surfaco. — 95.000 km². 30 departementoj.

Loĝantoj. — 4.600.000 (48 po km².).

Lingvoj. — Serba. En la novaneksitaj partoj, ankaŭ turka, bulgara, rumana, greka.

Religioj. — Ortodoksa. Iom da mahometanoj, katolikoj kaj hebreoj.

Registaro. — Konstitucia monarkio. Reĝo: Petro Ia (n. 1844; r. 1903). 8 respondaj ministroj. Parlamento: Skupŝtina (166 anoj, popola baloto, 3 j.). Ĉefurbo: Belgrad.

Armeo. — Dum paco: 60.000. Dum milito: 500.000. Deviga militservo dum 2 j.

Instruado. — 1 Universitato en Belgrad. 4 normalaj lernejoj, 2 seminarioj por teologio, 1 akademio militista, 2 suboficiraj, 5 agrikulturaj, 15 metiaj, 20 komercaj lernejoj, 30 gimnazioj, 3.000 popolaj lernejoj. Elementa instruado deviga. Analfabetuloj: 15 %.

Ekonomio. — La ĉefa okupado de la loĝantaro estas agrikulturo kaj brutedukado. Ĉefaj eksportaĵoj: tritiko, maizo, porkoj, bovoj,

20 minoj de karbono, kaj 12 aliaj diversaj minoj (oro, kupro, plumbo, hidrargo). Importo : 120.000.000 fr. ; eksporto : 90.000.000 fr.

Monsistemo. — 1 dinar (10 sd.) = 100 para. Biletoj : 10, 20, 50 100 dinar Oraj moneroj : 10, 20 dinar. Arĝentaj : 50 p., 1, 2 dinar. Nikelaj : 5 10, 20 para. Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj ; servo de poŝtmandatoj kun alporto de mono hejmen. Interna afranko : let. 10 p , pk. 5 p. ; pres. 2 p. ĝis 50 gr. — Telegrafo : 5 p po vorto, min. 50 p.

Fervojoj — 1.700 km. ŝtataj, 1.000 km. en konstruado, pretaj post 1 j. Prezo po km : 1ª kl. 7 p , 2ª kl 5 p., 3ª kl. 3 p. Rabatoj por opaj vojaĝoj, lernantaroj. Ir-reiraj biletoj. Abonoj sur ĉiuj vojoj je favoraj prezoj. 25 kg da pakaĵo senpage. 3ª kl. sufiĉe komforta. Manĝovagonoj nur en ekspresoj, ne por 3ª kl. Navigeblaj vojoj (Save, Danubo) : 400 km.

Turismo. - Banurboj : Vrntzi, Kissela voda, Kowiljača, Ribarska, Rudnik Vragnska, k t. p. Vizitindaj regionoj : sur monto, Zlatibor, Učar, Kopaonik, Prepolatz, Siĉevo ; sur la ebenaĵo, Maĉva, Ĉumadia, Homolje, Stig, Kossovo, Metokia, Vardar-Valo.

Hoteloj. — Komfortaj hoteloj po 3 fr. tage en Belgrad ; en la provincaj urboj po 1-1,50 fr. Trinkmono : 5-10 %. Matenmanĝo aparte pagata. Tag- aŭ vespermanĝo kutime kostas 2 fr. Laktejoj kaj senalkoholaj restoracioj en la urboj En la plimultaj hoteloj oni parolas germane, malpli ofte ankaŭ france.

Esperantia hotelo.

Belgrad. — Hot. Imperial, Vasina ul. — 2,50-3 fr.
— * Grand Hotel, Knaise Michailo.
— * Hot. Kruna, Kalimegdan.
— Rest. Trezvenost, Milanova.
Kumanova. — Hot. Solun. 1-2 fr.
Uskub. — Hot. de Paris. — 2-3 fr.

SVEDUJO

Surfaco. — 447.864 km. (kun lagoj). 24 departementoj krom Stockholm.

Loĝantoj. — 5.562.000 (12 po km.).

Lingvo. — Sveda. En la plej nordaj provincoj ankaŭ lapa kaj finna.

Religio. — La Luterana Eklezio esta ŝtata. Granda nombro da sektoj kaj liberaj eklezioj, kies anoj tamen ĝenerale ne eksiĝis el la ŝtata eklezio ; 12 eparnioj.

Registaro. — Konstitucia Monarkio. Reĝo : Gustavo V (n. 1858 ; r. 1907). Respondaj ministroj. Parlamento : unua ĉ. (150 anoj elektataj por 6 j.), dua ĉ. (230 anoj senpere elektataj por 3 j.). Ĉefurbo : Stockholm.

Armeo. — *Tera :* Dum paco : 69.000 Dum milito : 350.000. Deviga militservo por viroj de 21 ĝis 41 jaroj. Ekzerctempo sume 240 tagoj ĉe la infanterio, 300 ĉe la maristaro, 365 ĉe la kavalerio. *Mara* 92 ŝipoj kun 450 kanonoj.

Instruado. — Ŝtataj universitatoj en Upsala kaj Lund ; diversaj altaj lernejoj precipe en Stockholm Deviga instruado por ĉiuj infanoj. 14.000 popolaj lernejoj kun 19.300 geinstruistoj.

Ekonomio - Ekspluatado de minejoj kaj arbaroj. Industriaj eksportaĵoj : fero, ŝtalo, maŝinoj, ligno, papermaterio, alumedoj. Importo : 696 milionoj kr. ; eksporto : 663 milionoj kr.

Monsistemo. — Laŭ Skandinava Unuiĝo (1 krono (0,55 Sm.) = 100 oere). Bankbiletoj : 5, 10, 50, 100, 500, 1.000 kr Oraj moneroj : 5, 10, 20 kr. Arĝentaj : 10, 25, 50 oere, 1, 2. kr. Bronzaj : 1, 2, 5 oere. Oraj moneroj malmulte uzataj ; oni ĝenerale preferas bankbiletojn. — Mezuroj kaj pezoj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj komunumoj; ekster la urboj precipe ĉe la fervojaj stacioj Poŝtmandatoj, respondkuponoj, poŝta ŝparkaso. Interna afranko : let., 10 oere (ĝis 20 gr.) (loke 5 oere); pk . 5 oere ; pres. 4 oere por 50 gr. — Telegrafoficejoj en ĉiuj urboj kaj ĉe la fervojaj stacioj 5 oere po vorto (min. 25 oere). — Telefoniloj troviĝas en preskaŭ ĉiu domo en la urboj, kaj estas tre ĝeneralaj ekster la urboj; uzado senpaga por la proksima regiono, laŭ tarifo por pli grandaj distancoj.

Fervojoj. — 10.927 km. (4.683 km. ŝtataj) kun normala largo, 3 300 km. mallarĝaj. Biletprezoj ĝenerale laŭ zontarifo. Sur la ŝtatfervojoj 25 km. kostas en 3ª kl. 0,80 Kr., 100 km 2,60 Kr., 250 km. 5,80 Kr., 500 km. 10,40 Kr., 1.000 km 18 Kr En 2ª kl. 50 % plie. 1ª kl. nur en rapidvagonaroj de ĉefaj linioj. Por rapidvagonaroj plia speciala pago da 1 Kr en 3ª kl. kaj 1,50 Kr. en 2ª kl. Rabato ne ekzistas por ir-reiraj biletoj. La tarifoj de la kompaniaj fervojoj ĝenerale iom pli altaj. Kombineblaj kuponbiletoj riceveblaj nur por vojaĝoj parte okazantaj sur eksterlandaj linioj ; ili ne donas malgrandigon de la biletprezoj por la svedaj linioj. Pasaĝero rajtas senpage 25 kg. da enskribita pakaĵo ; por bicikletoj oni ĉiam pagas. Por interrompo de vojaĝo oni devas havi sur la bileto la sur-

skribon de la staciestro ; ĉe kelkaj okazoj speciala haltbileto devas esti aĉetata por la daŭrigo de la vojaĝo.

Navigado. — Pli ol 1.000 vaporŝipoj ; proksimume 2.000 velŝipoj. Ĉefaj linioj por vojaĝantoj : Trelleborg-Sassnitz (fervojaj pramegoj kun vagonaroj inter Stockholm kaj Berlino, vagonoj Berlin kaj Hamburg unuflanke, Gœteborg aliflanke), Malmœ-Kopenhag, Helsingborg-Helsingör (rekte irantaj vagonoj inter Kristiania kaj Kopenhago tra Göteborg, Helsingborg), Gœteborg-Antwerpen, Gœteborg-London, Gœteborg-Granton, Stockholm-Finnlando, Stockholm-Lübeck, k. t. p Ĝenerale oportunaj komunikoj sur la grandaj enlandaj lagoj kaj la kanalvojo Stockholm-Gœteborg.

Turismo. — La facile atingeblaj partoj okupas spacon longan pli ol 2.000 km. La plej sudaj provincoj havas klimaton similan al la nordgermana, dum la norda parto kuŝas norde de la polusrondo. Precipe vizitataj estas la montregiono en Jaemtland, la regiono ĉirkaŭ Siljan en provinco Dalarne kun sia karakteriza popolkulturo, la akvofaloj ĉe Trollhättan, insulo Gotland, Stockholm, k. t. p. Multe da kuracejoj kaj ripozejoj Meznokta suno videbla nur en la plej norda parto, sed por vidi la plenlumajn somernoktojn oni bezonas vojaĝi nur 150-200 km. norde de Stockholm fine de junio aŭ komence de julio. Pasporto nebezona. Dogano nesevera kontraŭ nesvedoj (por cigaroj en malfermita neplena kesto oni postulas nenion). — Esp. gf. en Stockholm.

Hoteloj. — En la urboj oni trovas hotelojn je tre diferencaj prezoj kaj ĝenerale komfortajn. Ankaŭ ekster la urboj la hoteloj estas tute kontentigaj laŭ moderaj postuloj, kelkfoje tre bonaj. Trinkmonon oni donas al la ĉambristino, al la pordisto kaj eventuale al la liftoknabo Preno de manĝoj en la hoteloj ne postulata. Diversgradaj restoracioj facile troveblaj. Aŭtomataj restoracioj multaj, kelkfoje ne rekomendeblaj. El alkoholaĵoj oni ofte povas ricevi nur bieron kaj vinon (multekostan); troviĝas ankaŭ tute senalkoholaj kafejoj. Dimanĉe ĉiuj restoracioj fermataj dum la diservaj horoj (11-1 ; 5-6). Ĝenerale en ĉiuj grandaj hoteloj kaj restoracioj iu parolas germane, iom malpli ofte angle, sed nur escepte france aŭ alilingve. La sveda manĝo « buterpantablo » (smoergosbord) estas ĝenerale trovebla kaj konsistas el diversaj malvarmaj manĝaĵoj ; oni prenas da ĝi laŭdezire ; la prezo estas fiksa, egale ĉu oni prenas multe aŭ malmulte. Trinkmono 10 %. En la fervojaj bufedoj oni pagas ordinare 1,50 kr. por matenmanĝo, 2 kr. por tagmanĝo kaj 1,75 kr. por vespermanĝo. Biero aŭ mineralakvo aparte pagota. Ĉe la pago oni ricevas karton liverotan ĉe la eliro.

J. Lundgren, Del. Hedemora.

Esperantiaj hoteloj.

Gefle. — Jaruvagshot. (ap. stacidomo).
— Centralhot., Nygatan, 43
Goteborg. — Hot. Haglund, Södra Hamngatan, 53. — 3 Kr.
Helsingborg. — Hot. Continental, Jernvägsgatan, 11. — 2-4 Kr.
Karlstad. — Stadshotellet, Kungsgatan. — 3 Kr.
Malmö. — Hot. Savoy.
Stockholm. — Hot. Temperance, Bryggaregatan, 3 (ap. stacidomo). — 2-3,50 Kr.
— Rest. Freya, Tunnelgatan, 19.

SVISUJO

Surfaco. — 41 298 km (kulturebla 78 %). 22 kantonoj.

Loĝantoj. — 3.765 000 (91 po km.).

Lingvoj. — Germana (2.600 000), franca (796.000), itala (301.000). reto-romana (40.000).

Religioj. — 56 % protestanta, 42 % katolika, 2 % diversaj.

Registaro. — Federata respubliko, el 22 memstaraj kantonoj kun centra registaro en Berno. Federalaj aŭtoritatoj : Federala konsilantaro da 7 anoj, kiun por 3 j elektas Parlamento kun du ĉambroj : nacia konsilantaro (167 anoj elektataj de la popolo por 3 j.), kantonara konsilantaro (2 anoj po kantono). Federala Tribunalo en Lausanne. Popolaj iniciatrajto kaj referendumrajto (– voĉdonado pri leĝoj). La prezidanto de la federala konsilantaro elektata de la Parlamento por 1 j. estas la prezidanto de la Konfederacio)

Armeo. — 1ª klaso 142.000, 2ª 70.000, 3ª 53.000, entute 265.000. Pojara deviga servado dum kelkaj semajnoj.

Instruado. — Federala teknika universitato en Zurich ; 7 kantonaj universitatoj en Bern, Genève, Zürich, Lausanne, Basel, Neuchâtel kaj Fribourg ; multaj ĉiuspecaj lernejoj kaj privataj edukinstitucioj.

Ekonomio. — Prospera agrikulturo, ĉefe eksporto de bovoj, fromaĝo, kondensita lakto kaj fruktoj. Industriaj eksportaĵoj : horloĝoj, maŝinoj, sciencaj aparatoj, aŭtomobiloj, teksaĵoj el silko

kaj kotono, brodaĵoj, ĉokolado, sukeraĵoj kaj lignaj skulptaĵoj Multaj akvofortoj, sed nenia minejo. Hotela industrio. — Importoj : 1 979 milionoj ; eksportoj : 1 357 milionoj.

Monsistemo. — Laŭ latina unuiĝo : 1 franko (40 Sd.) = 100 centimoj Biletoj de la nacia banko 50, 100, 500, 1,000 fr. Oraj moneroj : 10, 20 fr. Arĝentaj : 50 ct , 1, 2, 5 fr. Nikelaj : 5, 10, 20 ct. — Mezuroj laŭ metra sistemo.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiu vilaĝo ; servo de poŝtmandatoj kun alporto de l'mono hejmen ; poŝtaj kontoj por ĉekoj kaj ĝiro ; respondkuponoj. Interna afranko : let. 10 ct. (ĝis 250 gr.), (enurbe, 5 ct.) ; pk. 5 ct. ; pres. 2 ct. (ĝis 50 gr.), 5 ct. (ĝis 250 gr.). — Telegrafo : 2 1/2 ct. po vorto, min. 30 ct. — Telefono multe uzata. Por 3 min. 10 ct. enurbe, interurbe laŭ distanco.

Fervojoj. — 3.400 km. kun normala largo, plejparte apartenas al la Konfederacio; 1.642 km. da malarĝaj linioj por tramoj, kun dentrada aŭ ŝnurega sistemo, k. t. p. Plej alta punkto : Jungfraujoch, 3.457 m. Tuneloj : Simplon, 19.803 m ; Gotthard, 14.998 m. ; Lötschberg, 14.536 m. Prezoj po km : 1ª kl., 10 ct; 2ª kl , 7 ct. ; 3ª kl , 5 ct. Ir-reiraj biletoj valoras 10 tagojn ; iliaj prezoj kalkuliĝas kiel frakcia alpago al la simplaj biletoj de la koncerna klaso : 1ª kl., 1/2; 2ª kl , 1/3: 3ª kl , 1/4. Rabatoj por longaj vojoj ne ekzistas. Ĉiuj fervojoj kalkulas laŭ simila sistemo, sed en la montaro plialtiĝas la kilometra takso. Specialaj biletoj : *a*) kombineblaj int. kuponaroj laŭ kontraktoj kun aliaj ŝtatoj ; *b*) kombineblaj kuponaroj por rondvojaĝoj en la lando. Min. : 200 km., valoro 45 tagojn ; *c*) ĝeneralaj abonoj, kiuj rajtigas al nelimigata uzo de ĉiuj iom gravaj linioj kaj havigas rabatojn ĉe multaj turistaj fervojoj Prezoj laŭ la tri klasoj : por 15 tagoj, fr. 100, 70, 50 ; por 30 tagoj, fr. 150, 105, 75, k. t. p. kun plia rabato por pliaj monatoj ĝis 12 ; *d*) rabatoj al societoj kaj lernejoj por min. 16 personoj aŭ 8 lernantoj kunvojaĝantaj. Favorkondiĉoj por festotagoj, vizito de banlokoj, kongresoj, k. t. p., ne estas kutimaj. Infanoj nenion pagas ĝis 4ª j., la duonon de 4ª ĝis 12ª j. Ne valoras por ili la ĝeneralaj abonoj La biletoj taŭgas sen plia alpago por ĉiuj vagonaroj, krom kelkaj luksaj kun dormovagonoj. Interrompo de l'vojaĝo ebla sen ia formalaĵo Kontrolo de la biletoj nur en la vagono. Senpage estas kunpreneblaj 10 kg. da pakaĵoj, la resto iras page en la pakvagonon. 3ª kl. rekomendinda ; ĝi estas pura, trovigas en la plimultaj rapidvagonaroj, kaj rajtigas al vizito de l'manĝovagono. Ĉiuj informoj kaj biletoj estas riceveblaj ĉe la oficejoj de la Svisaj Federalaj Fervojoj : Berlin, Unter den Linden. London : Regent Str. Paris : rue Lafayette.

Vaporŝipoj sur la ĉefaj lagoj je similaj kondiĉoj ; la biletoj valoras reciproke sur la fervojoj.

Poŝtaj veturiloj sur la malmultaj Alpaj stratoj sen fervojo. Stratoj mezbonaj. Piedaj kaj bicikletaj ekskursoj tre farindaj. La aŭtomobilistoj ne pagas imposton, sed estas ĝenataj per multaj policaj regularoj. La tuta kantono Graubünden (Sankt-Moritz, Davos) kaj la ĉefaj Alpaj vojoj estas al ili fermataj.

Turismo. — Somera sezono de junio al septembro ; vintra sezono por la Ĝeneva kaj Tesinaj lagoj oktobro ĝis marto, por la montaro novembro ĝis februaro. Alpajn vestaĵojn, precipe ŝuojn, oni aĉetu en Svisujo mem.

Vintraj sportoj en multaj montlokoj (Davos, Sankt-Moritz, Adelboden, Engelberg, Grindelwald, Kandersteg, Château d'Oex, k. p. t.). Konataj montaj sanatorioj por pulmomalsanoj en Davos, Leysin, Arosa, Montana, k. t. p. Senpagaj informoficejoj kun diverslingvaj gvidlibroj en multaj urboj kaj vilaĝoj. Legitimaciaj paperoj ne necesaj. Doganvizitado malsevera (cigaroj : 2 fr. po kg.). — Esp. gf. aŭ gvidlibro en Bern, Davos, Genève, Locle, Rorschach.

Hoteloj. — Dum julio kaj aŭgusto ili estas ofte plenegaj kaj pli karaj, tial printempo kaj aŭtuno preferindaj Ekzistas je ĉiuj prezoj, preskaŭ ĉiuj estas komfortaj, puraj, kun elektra lumo kaj pordisto ĉe la stacidomo. Por septaga aŭ pli longa restado oni faras « pensionan » prezon por la ĉambro kaj tri manĝoj, en la urboj de 7 fr. kaj en la bone lokitaj vilaĝoj jam de 6 fr. Post restado oni pagu 10-15 % da trinkmono ; vojaĝanto ne postulinta specialajn servojn donu po tago 30 ct. al la pordisto kaj nenion al la ĉambristino. La preno de matenmanĝo je 1-1,50 fr. kaj la konsumo de vino dum manĝoj estas dezirata de l'hotelmastroj, sed multaj vojaĝantoj sin liberigas je tio Senalkoholaj kaj vegetaraj restoracioj en ĉiuj grandaj lokoj. En la urboj, kristanaj hoteloj rekomendataj al virinoj kaj en la ĉefaj stacidomoj reprezentantinoj de societoj por la protektado de la junulinoj. En preskaŭ ĉiuj hoteloj oni parolas germane kaj france, en la gravaj ankaŭ angle kaj itale. —

Ed. Stettler, Bern.

Esperantiaj hoteloj.

Adelboden (Bern). — Hotel Bristol. — 2-4 fr. ; Sez. 2,50-4. — Pens. 6-8 ; Sez. 6,50-9.
Altdorf (Uri). — Hot. Goldener Schlüssel. — 2-4 fr. ; Pens. 5-6,50.
Arosa (Graŭbünden). — Pension Furka. — 1,50-4 fr. ; Pens. 6.

Basel. — Hot. Strassburg kaj du Nord, Centralbahnstr, 17. — 3 fr.
— Blaukreuzhaus, Petersgraben, 23. — 2,50 fr. Rest.
Bellinzona. — * Hot. Central. — 2-3 fr.
Bern. — *Hotelo St. Gotthard*, apud la stacidomo kaj centra punkto de l'tramlinioj. Nova domo, moderne ekipita. Lifto. — 2-3,50fr. — E. E.
— Rest. zur alten Münze.
Biel. — * Hot. National. — 2-3 fr.
Château d'Oex. — Hot. de l'Ours. — 2 fr.; Pens. 7-12.
Chaux-de-Fonds. — Hot. de la Fleur de Lys. — 2-3 fr.*
Chur. — Hot. Steinbock. — 3 fr.
Davos. - Sport. Hot. Bahnhof. — 2,50 fr.; Pens. 8-10 fr.
— Pension Hohenzollern. — Pens. 8,50-14 fr.
— Sanatorium Davos Platz. — Pens. 15-19 fr.
Davos-Dorf. — Pension Sieber. — Pens. 6,50-8,50 fr.
Fribourg. — * Hot. du Faucon. — 2 fr.
Genève. — *Hôtel meublé du Théâtre*, 12, boulevard du Théâtre. Lokita je unu el la ĉefaj placoj, kontraŭ la teatro, proksime de la unuversitato, oficejo de U. E. A.. k. t. p. Moderna komforto, elektra lumo, centra hejtado, banĉambroj. — 2,50-5 fr.; aranĝoj por pli longa restado. E. E.
— Hot. des Familles, 14, rue de Lausanne (apud stacidomo). — 3 fr.
— Pension Fugazza, Chemin Krieg. — Pens. 4,50-7,50 fr. tage.
— *Rest. Billaud*, boulevard Georges-Favon. Manĝoj laŭ karto, je 1, 1,25, kaj 1,50 fr. Ĉambro por sinjorinoj. — E. E.
— Rest. Végétarien, rue du Marché. — Veg.
Glarus. — Hot. Glarnerhof. — 3-3,50 fr.
Grindelwald. — Hot. Jungfraŭ. — 1,50, 2; Pens. 5-6.
Interlaken. — Hot. Stadthaŭs — 1-50-3; Pens. 5-7,50.
Kandersteg. — Hot. Gasterntal. — 2-4; Pens. 5-6.
Lausanne. — Pension Sainte-Luce, Petit Chêne. — 3-3,50 fr.
— Rest. Kohler, rue Maupas.
Locarno. — Pension Daheim. — 1,50, 2 fr.; Pens. 5-5,50.
Lugano. — Hot. Zweifel. — 2-3 fr.; Pens. 6-8.
— Hot. du Lac. — 2-4 fr.; Pens. 6-8.
Lungern (Obwalden). — Alpenhof. — 2-2 fr. 50; Pens. 5-6.
Luzern. — Hot. Central. — 2,50-4 fr.; Pens. 6.50-10.
— Rest. Walhalla.
Meggen. — Internacia Esperanta Paradizo. — 2-3 fr.; Pens. 5-8.
Meiringen. — * Hot. Flora. — 2-4 fr.*
Montreux. — Hot. Bonivard. — 3,50-10 fr.; Pens. 9-20.
Neuchâtel. — Hot. du Vaisseau, place Numa-Droz. — 2,50 fr.
— Rest.-Hot. de Tempérance, Croix du Marché.
Ragaz. — Hot. Sankt-Gallerhof. — 2-3 fr. 50; Pens. 7-18.

Rorschach. — Hot. Splügen, Signalstr. — 2-3 fr.
— Rest. Schaeflegarten.
Saanen (Bern). — Hot. Gross-Landhaus. — 2-3 fr. 50; Pens. 6-8.
Sankt-Moritz (Engadin). — Hot. Albana. — 3,50 fr.; Sez. 5 fr.
Schaffhausen. — Hot. Müller. — 3-3,50 fr.
Sion (Valais). — Hot. Suisse. — 2-4 fr.; Pens. 5-7.
Solothurn. — * Hot. zur Krone. — 2,50-4 fr.
Thun. — * Hot. Freienhof. — 2,50 fr.
Vevey. — Pension Paquerette. — Pens. 5-8 fr.
Winterthur. — Hot. Krone, Marktgasse. — 2,50 fr.
Zürich. — Hot. Simplon, Schützengasse, 16. — 2-2,50 fr.; Pens. 5-17.
— Rest. Karl der Grosse, Kirchgasse.

NORD-AMERIKO

KANADO

Surfaco. — 9.701.000 km. 9 provincoj.

Loĝantoj. — 7.192.000 (8 po km²).

Lingvoj. — Angla 70 %, franca 30 %.

Religioj. — Protestanta kaj katolika.

Registaro. — Memstara brita kolonio. Guberniestra generalo (elektata de la reĝo de Anglujo por 5 j.): Duko de Connaught. 14 respondaj ministroj. Parlamento: Senato (87 anoj dumvive elektataj de la guberniestro). Ĉ. de Deputatoj (214 anoj, universala balotado por 5 j.). Ĉefurbo: Ottawa. Ĉiu provinco havas propran registaron sub direkto de Leŭtenant-Generalo elektata de la Guberniestra Generalo.

Armeo. — Regula militistaro de ĉirkaŭ 3.000 viroj. Ĝi tenas la kazernojn, fortikajojn, k. t. p., sed precipe instruas la ĉefan parton de la armeo, la « milicio » el 52.000 viroj.

Instruado. — 13 universitatoj, kun 424 profesoroj. Multaj faklernejoj. Elementa instruado deviga kaj senpaga.

Ekonomio. — Agrikulturo je granda skalo estas la ĉefa okupo de la pli-sudaj partoj de Kanado. La plej produktata greno estas la tritiko. Mineraloj kaj fiŝkaptado estas du grandaj fontoj de trezoro,

kaj, plej norde, multaj specoj de feloj estas aĉetataj de la indianaj ĉasistoj, aŭ kaptataj mem de profesiaj felistoj. Importoj dum 1911 : pli ol 1.000 milionoj da Sm. ; eksportoj 560 milionoj da Sm En la orienta parto, kaj ĉirkaŭ la Grandaj Lagoj, la produktoj estas pli diversaj, fruktoj, vinberoj, diversaj grenoj, k. t. p.

Monsistemo. — Dolaro (= 2 05 Sm) = 100 cendoj. Papero : 1, 5, 10, 20, 100, 1.000 dolaroj. Oraj moneroj : 5 dolaroj. Arĝento : 5, 10, 25, 50 cendoj, 1 dolaro. Kupraj : 1 cendo. — Mezuroj anglaj.

Poŝto. — Oficejoj en ĉiuj iom gravaj lokoj. Let. (enurbe 1 c.), enlande, al Norda Ameriko kaj al Britaj Kolonioj, 2 c. Pk. enlande 1 c.

Fervojoj. — 40.000 km. ; oni rapide konstruas novajn liniojn en ĉiuj direktoj. 100-funta pakaĵaro estas senpage portata de la fervojoj por ĉiu vojaĝanto. Ekzistas diversspecaj biletoj, por ĉiu kombinado de vojoj, distancoj, tempolimoj, specialaj okazoj, k. t. p.

Navigado. — Pli ol 5.000 komercaj marŝipoj vizitas la havenojn de Pacifika kaj Atlantika Kanado ; sur la grandaj lagoj, kaj sur riveroj funkcias ĉirkaŭ 9.000 ŝipoj, ofte tiel grandaj kiel marŝipoj.

Dogano. — Ne severa. Posedaĵoj de enmigrantoj estas sen dogano. Enportaĵoj de Britujo preferataj ; aliaj pagas 12-20 % pli grandan doganon.

Turismo. — Precipe vizitindaj estas la urboj Quebec, Ottawa, Toronto, Victoria (en Brita Kolombio, ĉe Pacifika maro) ; Niagara Faloj, la Rokaj Montoj, k. t. p. La distancoj estas tre grandaj, kaj multaj veturoj estas multekostaj, sed la vasteco de la pejzaĝoj kaj la grandiozeco de multaj natur-belaj partoj, plene rekompencas la koston kaj penadon ilin atingi.

Hoteloj. — 5 Sm. ĝis 10 Sm. por ĉambro nokte en bonaj hoteloj tra la tuta lando. Ĉambro kaj manĝoj, laŭ amerika plano, kostas de 8 ĝis 16 Sm. tage. Pli moderaj prezoj por semajna aŭ monata restado, kiel pensiono.

Enmigrado. — Ĉiuj sanaj homoj rajtas eniri ; ili devas havi 25 dolarojn en mono ; devas esti fizike sanaj, kaj ne devas esti krimuloj aŭ anarkistoj. Flavuloj devas posedi minimume 500 dolarojn por povi eniri. La registaro donas senpage ĉirkaŭ 65 hektarojn da tero, laŭ la jena kondiĉaro : oni devas loĝi sur la tero mem 3 monatojn ĉiujare dum tri jaroj, kaj fari certajn plibonigojn de la tero, t. e. konstrui domojn, plugi la terojn, k. t. p. Post tri jaroj, se oni plenumis la kondiĉojn, oni ricevas rajtdokumenton por tiu terpeco.

MEKSIKUJO

Surfaco — 1.987.300 km. (26 % kulturata, 20 % nekulturebla, resto estas arbaroj kaj paŝtejoj). 27 ŝtatoj, 3 teritorioj, 1 federala distrikto (Mexico).

Loĝantoj. — 15.063.000 (7 po km²). 20 % blankaj, 43 % miksitaj, 37 % indianoj.

Lingvoj. — Hispana, ofte multe ŝanĝita. Diversaj dialektoj de indiana lingvo, kaj miksaĵoj de hispana kaj enlandula lingvoj.

Religio. — Precipe katolika.

Registaro. — Federala Respubliko. Prezidanto (provizore) : Generalo Huerta (duagrada baloto, 6 j.). Kongreso : Senato (2 anoj po ŝtato kaj federala distrikto, 4 j.). Ĉ. de deputatoj (233 anoj, 2 j.). Ĉefurbo : Mexico. Ĉiu ŝtato havas propran registaron. — Dum 1912/13 la lando estis en revolucia stato.

Armeo. — *Tera :* dum paco : 30.000 ; dum milito : 84.500. Servado estas precipe volonta, sed povas esti deviga en certaj okazoj. *Mara :* kelkaj militŝipoj de nenia speciala graveco.

Instruado. — Elementa instruado deviga kaj senpaga. 20 instruistaj lernejoj, 65 profesiaj lernejoj, kaj aliaj por specialaj studoj. Analfabetuloj : 50 %.

Ekonomio. — Meksikujo estas lando de grandega riĉeco. Ĝiaj produktoj, ĝis antaŭ kelkaj jaroj laborataj nur de enlanduloj, kaj en primitivaj manieroj, estas maizo, tritiko, rizo, faboj, hordeo, kafo, tabako, kaŭĉuko, kotono, fibraj plantoj por krudaj teksaĵoj, sukero, bananoj kaj multaj tropikaj fruktoj, valoregaj lignoj, spicoj. Estas vastaj paŝtejoj por bovaroj kaj ĉevaloj, kai la jara eksportado de feloj estas de graveco. Eksportoj (1911) : 260 milionoj da Sm. Importoj : 195 milionoj da Sm. La kulturado de la nature riĉaj plantacioj estis ĉiam malhelpata de politikaj ŝanĝoj. Fremda kapitalo nur kun grandaj riskoj estis enmetita en minejojn, sed havigis ofte grandajn profitojn.

Monsistemo — Peso (= 1,05 Sm) = 100 centavos. Oraj moneroj : 5, 10 pesos. Arĝentaj : 10, 20, 50 centavos kaj 1 peso. Nikelaj : 5 centavos. Kupraj : 2 kaj 1 centavos.

Mezuroj. — La metra sistemo estas uzata. Inter la malnovaj estas : *legua* (5.000 varas) = 4.19 km. 1 *vara* = 3 *pies ;* 1 *pie* = 12 *pulgadas ;* 1 *pulgada* = 12 *lineas.* 1 *libra* (16 *onzas*) = 46 kg.

4 *cuartillos* (po 1.89 litro) = 1 *almud*; 12 *almudes* (po 7.56 litro) = 1 *fanega*; 2 *fanegas* = 1 *carga* (181.62 litro).

Poŝto. — Oficejoj en plej multaj lokoj. Interna afranko : Let. (enurbe, 2 centavos) 5 c. Pk. 2 c. Presaĵoj, 1 c. por 100 gr. Registrigo 10 c. Pakaĵpoŝto. Telegrafo : 10 vortoj por 1 peso, aŭ malpli laŭ distanco. Nokte 1/2 pli.

Fervojoj. — 24.500 km, parte ŝtata kaj parte private posedata.

Navigado. — Regula ŝipkomunikado per kelkaj linioj inter Meksikaj havenoj kaj la ĉefaj havenoj de Eŭropo, Ameriko kaj Azio. Rivera transportado neregula.

Dogano. — Laŭ ĝenerale severaj reguloj oni pagas doganon por pli ol bezona kvanto da iu afero enportata kun si.

Turismo. — Meksikujo estas lando ekstreme interesa por la turisto, pro riĉeco de la naturo tropika, kaj ankaŭ pro la popolo kiu ĝin loĝas. Sed la primitiveco estas forigita nur en kelkaj urboj krom la ĉefurbo, kaj en multaj lokoj la sanstato estas malbona pro multe da febroj, k. t. p.

Hoteloj. — Bonaj kaj ne karaj en ĉiuj urboj, kaj ankoraŭ pli malkaraj en malgrandaj lokoj. En malgrandaj urboj kaj vilaĝoj oni preparas ĉiujn manĝaĵojn laŭ la loka kutimo, uzante multe da forta pipro, k. t. p., ofte malagrabla por eksterlanduloj. Gastemeco estas trajto de la Meksikanoj, kaj vizitanto estas ĉiam bone servata, sed oni devas sin gardi kontraŭ ŝtelemo de malaltrangaj servistoj.

Enmigrado. — Meksikujo kiel ŝtato, faras malmulte da reklamo por enmigrantoj. Oni devas koni la lingvon por profite trakti kun la loĝantoj, kaj laboristo nenion povas gajni pro tio ke ekzistas senlima provizo da malmultekosta laboro (indianoj kaj enlanduloj).

Esperantia hotelo.

Meksiko. — Hot. Gillow, Avenida Isabel la Católica, 17. — 1,50 dol.

USONO

(Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko)

Surfaco. — 7 785.000 km. Kolonioj kaj protektoratoj : 1.893 000 km. 48 ŝtatoj, 2 teritorioj (Alaska kaj Hawaii), 1 federala distrikto (Columbia).

Loĝantoj. — 101.000.000 (14 po km²). Kolonioj : 8.750.000.

Lingvo. — Angla.

Religioj. — Precipe protestanta (diversaj eklezioj) ; katolikoj, 12.000.000 ; hebreoj, 2.000.000 ; mormonoj, 400.000

Registaro. — Federala, Konstitucia Respubliko. Prezidanto : Woodrow Wilson (r. 1913), elektata per popola balotado por 4 j. 9 Ministroj. Kongreso : Senato (ĉiu ŝtato elektas du anojn por 6 j.). Ĉ. de Reprezentantoj (391 anoj, per universala balotado, por 2 j.). Ĉefurbo : Washington, D. C. Ĉiu ŝtato havas propran memstaran registaron similan en principo al tiu de Usono. (Guberniestro kaj du ĉambroj). En keltaj ŝtatoj virinoj rajtas voĉdoni.

Armeo. — *Tera* : Dum paco : 75.000-100.000. Servado pagata kaj nedeviga. Rezerva (neorganizita), 16.000.000. *Mara* : 200 ŝipoj kun 1.600 kanonoj.

Instruado. — Elementa instruado deviga kaj senpaga. 52 Universitatoj. Ĉirkaŭ 600 kolegioj, kaj multaj specialaj lernejoj.

Ekonomio. — Pro vasteco de surfaco kaj diverseco de klimato, Usono produktas, kun malmultaj esceptoj, ĉiujn komercaĵojn. Valoro de agrikulturaj produktoj (1908) : 15.600 milionoj da Sm. Minejaj produktoj (1907) : 4.285 milionoj da Sm. Fabrikitaj produktoj (1905) : 30.000 milionoj da Sm. Importo (1907) : 2.900 milionoj da Sm. Eksportoj : 3.700 milionoj da Sm. Industriaj kaj fabrikantaj regionoj troviĝas precipe en la orienta parto de Usono. Minejoj troviĝas pogrande en la oriento kaj okcidento. La nordaj ŝtatoj havas vastajn arbarojn, precipe grandajn oni trovas en la nord-okcidento. Plej granda parto de la regiono en la valoj de Mississippi kaj Missouri riveroj estas agrikultura. Tiu parto okcidente de la nomitaj valoj, kaj ĝis la Sierra montaro estas monta kaj dezerta, sed enhavas valorajn minejojn, kaj ofte malgrandajn agrikulturajn distriktojn kaj paŝtejojn.

Monsistemo. — 1 Dolaro (2,05 Sm.) = 100 cendoj. Biletoj : 1, 2, 5, 10, 20, 50, 100, 500, 1 000, 5.000, 10.000 dolaroj. Oraj moneroj : 2 1/2, 5,

10, 20 dolaroj. Arĝentaj : 10, 25, 50, 100 cendoj. Nikelaj : 5 cendoj. Kupraj : 1 cendo.

Mezuroj. — Anglaj, kun escepto de la « tuno », kiu egalas nur 2.000 funtojn en Usono.

Poŝto. — Oficejoj ĉie. Let. al Nord-Ameriko, Usonaj kolonioj, Britujo kaj Germanujo, 2 cendoj por 1 unco. Pk. en Nord-Ameriko kaj al Usonaj kolonioj, 1 cendo. Presaĵo, 1 cendo dor 2 uncoj. En 1913 estis enkondukata la « Pakaĵ-Poŝto ». Poŝta Ŝparkaso nun funkcias en multaj lokoj. — Telefon- kaj telegraf-sistemoj ekskluzive privataj, kun diversaj prezoj laŭ distanco.

Fervojoj. — 350.000 km. (30.000 km. pli ol en tuta Eŭropo). Ĉiuj linioj estas posedataj de privataj kompanioj, kies tarifojn kaj regularojn unuformigas «Interŝtata Fervoja Komisiono ». Estas efektive nur unu sola klaso, sed kelkaj superpagoj, pro ekstrema lukseco aŭ rapideco, formas kvazaŭ unuan klason. Biletoj : ĉiuspecaj, simplaj, reiraj, tempolimaj, kaj en formo de kuponaroj valoraj por 1.000 mejloj aŭ pli. Oni portas 150 funtojn da pakaĵo senpage por ĉiu persono. Inter du urboj oni povas veturi per pluraj linioj, se ekzistas. La kosto de bileto estas sama, ĉu oni veturas per rekta vojo aŭ tre malrekta.

Enurbe : Tramoj interne de urbolimoj (kiom ajn granda aŭ malgranda la distanco veturata), tarifo po persono 5 cendoj. Ekzistas multaj interurbaj linioj elektraj, kies tarifoj tre diferencas. Fiakroj estas maloftaj. La tarifo por taksimotoroj estas alta.

Navigado. — Malmultaj marŝipoj pasaĝeraj, sed ofta kaj tre oportuna komunikado per rapidaj ŝipoj de aliaj landoj, inter New-York kaj la ĉefaj Eŭropaj havenoj, kaj inter San Francisco, Seattle, kaj havenoj en Japanujo kaj Ĥinujo. Sur la riveroj kaj laŭlonge de la marbordo multaj linioj de pasaĝeraj ŝipoj malkaraj. Sur la Grandaj Lagoj grandega ŝipkomerco je greno, karbo, kaj metalhava ŝtono. Komerca ŝiparo : 26.000 ŝipoj kuu 7.700.000 t.

Dogano. — Sufiĉe severa, speciale por luksaj aferoj, juvejoj, k. t. p. Oni rajtas kunporti (krom uzitaj vestaĵoj, personaj necesaĵoj, k. t. p.) certajn aliajn aferojn, ĝis la valoro de 150 dolaroj.

Turismo. — De turista vidpunkto plej vizitindaj regionoj estas : Faloj de Niagara, Yosemita Parko, Granda Kanjono de la Kolorada Rivero, Yellowstone Nacia Parko. Vintre plej multaj alveturas al Florida kaj Suda Kalifornio. — Esp. gvidlibroj : Los Angeles kaj Suda Kalifornio » (oficiale dissendata de la « Komerca Ĉambro de Los Angeles », Kalifornio, senpaga), Tacoma.

Hoteloj. — Preskaŭ ĉiam komfortaj kaj modernaj. Prezoj : en

grandaj urboj, 2-5 Sm. tage. En aliaj lokoj, iom malpli. En ĉiu urbo ekzistas pli malkaraj, kaj ankaŭ multe pli luksaj hoteloj. Manĝprezoj diversaj, sed ordinare moderaj ; oni povas eviti trinkmonon laŭvole. Matenmanĝo ĝis 9 h. matene ; tagmanĝo de 12-2 h. ; vespermanĝo, 6-7 h.

Enmigrado. — Neseveraj reguloj pri ebleco de enmigrado. Precipe enmigranto devas esti sana, kaj havi iom da mono. Se li suferas de infekta aŭ nekuracebla malsano, aŭ estas tiel maljuna ke li povus fariĝi dependa de ŝtata helpo, aŭ se li ne havas sufiĉe da mono por iri al la celloko, aŭ se li estas anarkisto, krimulo aŭ alimaniere nedezirinda kiel civitano, tiam oni nepre lin resendos al tiu lando de kie li venis. Kelkaj ŝtatoj speciale invitas enmigrantojn, ekzemple, Washington, Oregon, Kalifornio, la tri okcident-marbordaj ŝtatoj. Tie la kondiĉoj estas speciale favoraj por junaj, fortaj homoj, kiuj volas fondi komfortan hejmon kaj sendependan vivadon.

Por ricevi senpage plenajn informojn rilate al enmigrado al ĉi tiuj tri ŝtatoj, adresu, respektive : « Chamber of Commerce », Tacoma Wash. ; « Commercial Club », Portland, Ore. ; kaj Komerca Ĉambro, Los Angeles, Kalifornio. — D. E. Parrish (Los Angeles).

Esperantiaj hoteloj.

En Nord-Ameriko kaj ekstereŭropaj landoj la servo de la Esperantiaj hoteloj ne estas ankoraŭ sisteme aranĝita.

Baltimore (Maryl.). — Hot. Rennert. — 0,75 dol.
— Rest. Child's Virginia Lunch Room, Monogram.

Boston (Mass.). — United States Hot., Beach, Lincoln & Kingston Streets. — 0,50 dol.

Cedar Rapids (Iowa). — Montrose, Third Ave., and Third Str. — 2 dol.

Chicago. — Morrison Hot., Madison & Clark St. — 1-1,50 dol.
— The Great Northern Hot , Jackson Boul., Dearborn and Quincy Str. — 1-1,50 dol.

Détroit (Mich.). — Randolph Hot. — 1 dol.
— Rest. Battle Creek Food Store, Angulo de Broadway and Witherell Str. — Veg.

Fort Collins (Colorado). — Linden Hot., 242, Walnut Str. — 0,50-1,50 dol. — Pens. 2 dol.

Hartford (Conn.). — Allyn House, Ashlum Str. — 0,50 dol. — Mat. 0,75 ol.
— Rest. Capitol Lunch.

Hoboken (N.-Y.) — Meyers Hot., Angulo de Hudson kaj Third Str. — 0,50 dol.

Long Branch (New-Jersey). — Green's Hot., 27, Third Ave. — 1 dol.
— Rest. Bortz's Café, 180, Broadway.
— Rest. Physical Culture Rest., 829, Chestnut Str. — Veg.

Newport (R. I.). — Perry House, Touro Str. — 1,50 dol.
— Rest. Armstrong, Thames Str. — 1,50 dol.

New-York. — Union Square Hot., Union Spuare kaj 15 th. str. — 1 dol.

Philadelphia (Penn.). — Hot. Windsor, 1227, Hilbert Str. — 0,50 dol.

Pine Bluff (Ark.). — Hot. Pines, Main Str. kaj Fifth Ave. — 2,50 dol.

Tacoma (Wash.). — Kingston Hot., 315, South Eleventh. — 0,50 dol.
— Rest. Sheldons, Angulo de 11th kaj Commerce Str.

Topeka (Kans.). — Hot. National, Kansas Ave. — 1 dol.
— Rest. National Cafe, Kansas Ave.

LEONARD ADAMCZEWSKI

HOTELA SERVO EKSTER EŬROPO

Kvankam la hotela servo ne estis ankoraŭ sisteme aranĝita ekster Eŭropo, ni tie publikigas la liston de kelkaj diverslandaj hoteloj jam aliĝintaj.

AFRIKO

Cape-Town (Kaplando). — The Royal Hotel, Plein Str., 7/6.
— Hot. Mortimer Hall, Wynberg.
— Rest. Haywards Creamery, Adderley Str.

Kairo. — Tewfick Hot. — 2 Sm. Mat. 2,50 Sm.
— Metropol Hot. — 2 Sm. Mat. 2,50 Sm.
— Bristol Hot. — 2 Sm. Mat. 2,50 Sm.
— Pensiono de Dro Sipek, Heliopolis oazo. — 0,75 — 2 Sm. Mat. 1-2,25 Sm. Esp.
— Rest. (sama). — Veg. Lakt.

Sidi-bel-Abbès (Algerio). — Grand Hôt. d'Orient et Continental, rue Prudon. — 2,50-3 fr.

AMERIKO

BRAZILUJO.

Rio-de-Janeiro. — Avenida Hot., Avenida Rio Branco, 152-162.
— Rest. Casa Americana, rua 7 setembro. — Lakt.

KUBA RESPUBLIKO.

Habana. — Gran Hotel America, Industria, 160. — 1 dolaro.
— Rest. Vegetara, Maurique, 140. — Veg.

Matanzas. — Hot. Grand Paris, Tirry. — 2 dolaroj.

AZIO

ĤINUJO.

Hankow. — *Granda Hotelo*, Sing-Sing Road (Hankow Via Shanghai). La mastro J. D. Liu ĝoje akceptos esperantianojn, gvidos ilin vojaĝi tra Centra Ĥinujo, respondos demandojn pri ĥina komerco. E. E.

Shanghai — Bickertone privata Hot., 102, Bubbling Well Road. — 3 Sm.

PERSUJO.

Tabriz. — Hot. Bosfor, Geĝil. — 10 krau. — Mat. 13 Krau.

OCEANIO

NOV-ZELANDO.

Auckland. — Waverley Hot., Queen Str. — 3/6.
— Pens. San Remo, Symonds Str. — 6/- potage. — Esp.

QUEENSLAND.

Brisbane. — The Peoples Palace, Edward Str. — 2/-.
Rest. The Vegetarian Café, Edward Str. — Veg.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

LEONARD ADAMCZEWSKI

UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO

Rue de la Bourse, 10, **GENÈVE** (Svisujo).

ĜENERALA KATALOGO

MENDOJ. — Esperantia Librejo akceptas abonojn por ĉiuj regule aperantaj Esperantaj gazetoj. Krom la libroj montrataj en tiu katalogo, ĝi akceptas mendojn de ĉiuj ĉefaj **Esperantaj libroj**. Aldonoj al tiu ĉi katalogo aperas en *Esperanto* (anoncoj).

PAGOJ. — Kun ĉiu mendo oni devas sendi ĝian valoron per poŝtmandato, ĉeko, bankbiletoj, pagiloj de Esp. Čekbanko, aŭ respondkuponoj. Naciaj poŝtmarkoj (krom svisaj) ne estas akceptataj. Personoj havantaj konton ĉe la Centra Kaso de U. E. A. povas pagi siajn mendojn per tiu konto. Poŝtrepagoj — en la landoj kie tio estas ebla — laŭ deziro de la mendintoj.

PREZOJ. — La prezoj de tiu ĉi katalogo estas montrataj per frankoj.

La sendado okazas je la risko de la mendanto.

Ĉiuj vendaĵoj estas kalkulataj kun sendo.

Estas konsilinde ĉe mendoj por ekstereŭropaj landoj, Balkano, Rusujo kaj Hispanujo, aldoni 0,25 fr. por rekomendo.

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

Esperantia Biblioteko (en Mondformato).

	Prezo (afranke)
Oficiala Dokumentaro de la 1ª Kongreso de U. E. A.	**1 25**
Oficiala Dokumentaro de la 2ª Kongreso de U. E. A.	**1 25**
Oficiala Dokumentaro de la 3ª Kongreso de U. E. A.	**1 25**

12

	Prezo (afranke)
Oficiala Dokumentaro de la 4ª Kongreso de U. E. A., en du partoj	1 25
Tiuj verkoj enhavas la tekston de la raportoj prezentitaj ĉe la Kongresoj de U. E. A., la protokolon de la kunvenoj, la liston de la kongresanoj. Ili liveras tre interesan materialon al ĉiuj Delegitoj de U. E. A.	
Oficiala Jarlibro de U. E. A. 1914. Por membroj de U. E. A.	0 75
— — — Por nemembroj	2 50
La antaŭaj eldonoj ne plu estas riceveblaj.	

NACILINGVAJ PROPAGANDAJ BROŜUROJ

L'Espérantisme (france)	0 25
The Esperantism (angle)	0 25
Der Esperantismus (germane)	0 25
Broŝuro da 24 paĝoj, klariganta la Esperantisman ideon, la organizon kaj servojn de U. E. A. kaj la esperantan gramatikon. Tre utila al ĉiuj propagandistoj. Rabato da 33 1/3 % por mendoj de pli ol 9 ekz. Sendkosto ekskluzive.	

NACILINGVAJ PROPAGANDAJ FOLIOJ

Les relations internationales (france)	100 ekz.	0 75
The International Relations (angle)	500 ekz.	3 »
Die Internationalen Beziehungen (germane)		
Folio faldita en broŝura formo de 8 paĝoj. Informoj pri U. E. A. kaj Esperanto. Tre taŭga por disdonado.		

GVIDFOLIOJ

Gvidfolioj de U. E. A. (kolekto)	0 75
Plena kolekto de ĉiuj aperintaj gvidfolioj, rekomendata por vojaĝoj, ekspozicioj, propagando, k. t. p.	

Oficiala Skribmaterialo.

Oficiala leterpapero	100 folioj	1 85
Oficialaj kovertoj	100 ekz.	1 50
Oficialaj poŝtkartoj	100 ekz.	1 85
Oficialaj markoj	100 ekz.	0 50
Glumarkoj kun bildo de Dro Zamenhof.	500 ekz.	2 »
Por Delegitoj kaj membroj de U. E. A.:		
Pakaĵo enhavanta oficialan skribmaterialon kun sendkosto.		
100 kovertoj, 100 leterfolioj, 100 poŝtkartoj, grandan nombron de glumarkoj. Afrankita ĉien		5 25
Por Rusujo		6 50

REKOMENDINDAJ VERKOJ

En la suba listo oni trovos la plej bonstilajn verkojn de la Esperanta literaturo. Ni rekomendis nur tiujn verkojn, kies stilo estas neriproĉinda kaj kiuj estas indaj esti en la biblioteko de ĉiu bona Esperantisto.

INSTRUADO, HISTORIO

	Prezo (afranke)
Fundamento de Esperanto, kvinlingva, de Dro Zamenhof. Broŝ.	2 20
Kun kartona kovrilo	2 75
Klasika Libro. Oficiala Gramatiko kaj Radikaro en poŝformato. Kun ingo	1 35
Kabe. — **Vortaro de Esperanto.** Luksa, 176 p. Kun kartona kovrilo	4 50
Ch. Verax. — **Enciklopedia Vortareto Esperanto.** Luksa, 250 p.	6 70
Dro Zamenhof. — **Lingvaj Respondoj.** 2 volumoj (ĉiu)	0 80
Ed. Privat. — **Karlo.** Facila rakonto en 20 ĉapitroj, 5ª eld., 36 p.	0 50
Ed. Privat. — **Kursa Lernolibro.** Instruilo per parola metodo, 64 p.	0 50
Kabe. — **Unua Legolibro.** Gradigitaj legaĵoj, 4ª eld., 180 p.	2 »
Dro A. Fiŝer. — **Esperanta Legolibro.** 2ª eld., 116 p.	0 90
Z. Adam (A. Zakrewski). — **Historio de Esperanto** (1887 ĝis 1912), 144 p.	2 30
Ed. Privat. — **Historio de la lingvo Esperanto.** Popola eld., 54 p.	1 25
B. Kotzin. — **Historio kaj teorio de Ido.** 144 p.	1 50
R. de Ladevèze. — **Demandaro pri la historio, literaturo kaj organizaĵoj de Esperanto** (por Esperantaj ekzamenoj).	1 50

LITERATURO

TRADUKOJ

La Nova Testamento. Eldonita de la Brita Biblia Societo. 614 p. Bind.	2 25
Bind. kun nigra ledo	2 75
Luksa	4 »

	Prezo (afranke)
Dro ZAMENHOF. — **Fundamenta Krestomatio.** 460 p.	3 75
Bind.	4 60
Dro ZAMENHOF. — **Hamleto.** Tragedio de *Shakespeare*. 170 p.	2 30
Dro ZAMENHOF. — **Ifigenio en Taŭrido.** Dramo de *Gœthe*. 108 p.	2 30
Dro ZAMENHOF. — **La Rabistoj.** Dramo de *Schiller*. 144 p.	2 30
Dro ZAMENHOF. — **La Revizoro.** Komedio de *Gogol*. 100 p.	1 75
Dro ZAMENHOF. — **Marta.** Rakonto de *Eliza Orzesko*. 238 p.	3 »
M.-F. ZAMENHOF. — **Proverbaro Esperanta.** 82 p.	2 »
FOREL. — **Kultur-celadoj de la nuntempo.** 50 p.	1 25
A. GRABOWSKI. — **Kondukanto kaj Antologio.** 180 p.	2 25
KABE. — **La Faraono.** Romano de *Prus*. Tri volumoj. (ĉiu).	2 60
KABE. — **Patroj kaj filoj.** Romano de *Turgenjev*. 166 p.	3 »
KABE. — **Fundo de l'Mizero.** Romano de *Sieroševskij*. 91 p.	0 85
KABE. — **Pola Antologio.** 2a eld., 154 p.	2 20
S. MEYER. — **Karmen.** Romano de *Mérimée*. 56 p.	1 35
RAMO. — **Fabiola.** Romano de Klo *Wiseman*. 428 p.	4 35
RAMO. — **En Svislando.** Rakontoj de svisaj aŭtoroj. 104 p.	2 »
Dro VALLIENNE. — **Eneido,** de Virgilio. 274 p.	3 35

ORIGINALAJOJ

H.-A. LUYKEN. — **Paŭlo Debenham.** Romano. 228 p.	2 80
H.-A. LUYKEN. — **Mirinda amo.** Romano. 295 p.	3 60
H.-C. MEES. — **La kaŭzo de senlaboreco.** 58 p.	1 40
Ed. PRIVAT. — **Pri Esperanta Literaturo.** Parolado. 24 p.	0 80
Ed. PRIVAT. — **Ginevra.** Lirika dramo. 48 p.	1 25
Ed. PRIVAT. — **Tra l'Silento.** Poemoj	1 50
Luksa eldono	2 50
Dro SCHULOFF. — **Poemaro.** Tri volumoj. (entute).	1 50
Dro VALLIENNE. — **Kastelo de Prelongo.** Romano. 450 p.	4 50
Dro VALLIENNE. — **ĉu li?** Romano. 450 p.	4 50

MUZIKO

K. JOST. — **Esperantista Kantaro.** 17 liedoj. 40 p.	1 »
Esperantista Kantaro. 2a eld., 10a milo. 72 p.	0 75

INSIGNOJ

Ĉiuj Insignoj estas kalkulataj kun sendo rekomendita.
Specialaj kondiĉoj laŭ peto.

Oficialaj insignoj de U. E. A.


	Prezo (afranke)
Por membroj : Broĉo, Pinglo	1 15
— Butono	1 25
Por Delegitoj : Broĉo, Pinglo, Butono	1 25

Aliaj insignoj

Verda stelo « Gasse »

Kun ora surskribo « Esperanto », modela deponita.


Pingloj, broĉoj.	1 ekz.	0 85
— —	10 ekz.	6 »
Kravatpingloj.	1 ekz.	0 75
—	10 ekz.	5 »
Butonoj	1 ekz.	1 10
—	10 ekz.	8 »
Ĉensignoj, ambaŭflankaj	1 ekz.	1 50
— —	10 ekz.	12 »




Pinglo II.



Broĉo II.



Butono II.



Pinglo III.

1. Pinglo kun steleto de 8 m/m.	1 ekz.	0 75
1 1/2. — — — —	10 ekz.	3 65

			Prezo (afranke)
II.	Pinglo kaj broĉo	1 ekz.	0 85
	— — —	10 ekz.	4 35
	Butono	1 ekz.	1 »
	—	10 ekz.	5 50
III.	Pinglo kaj broĉo	1 ekz.	1 15
	— — —	10 ekz.	7 30
	Butono	1 ekz.	1 35
	—	10 ekz.	8 50
	Ĉenpendaĵo	1 ekz.	1 95
	—	10 ekz.	13 75

IV. *Verda stelo sur ronda blanka fundo kun ora rando. Bonega emajlo, 17 m/m.*

Pinglo kaj broĉo	1 ekz.	1 25
— — —	10 ekz.	8 50
Butonoj kaj ĉenpendaĵoj	1 ekz.	1 50
— — —	10 ekz.	10 50

DIVERSAĴOJ

Flageto silka (4 × 6 cm) sur pinglo	1 ekz.	0 30
— — — —	25 ekz.	4 »
Flageto el silka atlaso (10 × 15 cm)	1 ekz.	0 40
Esperantaj glumarkoj kaj sigelmarkoj	100 ekz.	0 50
Ĉefeĉaj ŝlosiloj (angle, boheme, dane, france, germane, hispane, hungare, itale, portugale, ruse, svede)	10 ekz.	0 50
	50 ekz.	2 »
Ĉefeĉaj ŝlosiloj (finne, katalune, kimre, pole, rumane, serbe)	10 ekz.	0 60
	50 ekz.	2 50
Karikaturaj poŝtkartoj de la eminentuloj. Serio de dek. Po serio		1 »

POŜHORLOĜO : L'ESPERO A.



El blanka, tre fortika metalo, oksidita kiel malnova arĝento, kun reliefa kovrilo kaj stelo, laŭ deziro verde pentrita. Preciza radaro je ankro kun 15 rubenoj, plene garantiita por ekzakta funkciado. Utilega al ĉiuj esperantistoj. Tre ŝatata donaco.

Prezo : **30** fr. = **12** Sm.

Al tiu prezo oni aldonu la poŝtelspezojn, malsamajn laŭ la diversaj landoj. Petu la specialan katalogon.

Sola reprezentanto de tiu ĉi kaj de alispecaj horloĝoj de fame konata svisa fabrikejo. Marko : *L'Espero*.

Oni postulu la prezaron kun multaj modeloj por sinjoroj kaj sinjorinoj, kaj juĝoj pri ĝis nun liveritaj horloĝoj.

“ LA ONDO DE ESPERANTO ”

MONATA ILUSTRATA REVUO

(Fondita en la jaro 1909)

Ĉiuj abonantoj de la jaro 1914

krom 12 numeroj de l'gazeto, —ricevos **donace** belan Esper. libron :

ESPERANTA POŜKALENDARO POR LA JARO 1915

“ **La Ondo** ” aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu numero havas 16—24 paĝ. – Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝt. ilustr.).

Anonco en « Koresp. Fako ». — 3 respondkuponoj

La abonpagon (**2 rubl. = 2,120 Sm.**) oni sendu al librejo « *Esperanto* » **(Moskvo, Lubjanskij projezd, 3, Ruslando)** aŭ al aliaj Esper. librejoj— poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

B. KOTZIN

Redaktoro de *La Ondo de Esperanto*

Historio kaj Teorio de Ido

ESPERANTO KRIPLIGITA

kun antaŭparolo de R. BRANDT, profesoro-lingvisto de Moskva Universitato.

VIII + 144 paĝoj

Prezo : Sm. **0,53** ; afr. : Sm. **0,63**

Aĉetebla en ĉiu Esper. librejo kaj ĉe

Universala Esperantia Librejo

10, rue de la Bourse, 10

GENÈVE (Svisl.)

Superforta ambicio

skizo el la esperantista vivo

ORIGINALE VERKITA DE

A.-A. SAĤAROV

Prezo : Sm. **0,22** ; afr. : Sm. **0,25**

Aĉetebla en ĉiu Esper. librejo kaj ĉe

Universala Esperantia Librejo

10, rue de la Bourse, 10

GENÈVE (Svisl.)

Abonu

“ L'ESPERANTO ”

DUONMONATA GAZETO

kiu publikigas en ĉiu numero

Lecionojn de Itala Lingvo per Esperanto

ABONPREZO 1913 Sm. **1** (*Fr. 2.50*)

Kun literatura aldono “ **ITALA ANIMO** ” Sm. **1.600** (*Fr. 4. »*)

Abonprezo 1914 Sm. 1.300 (*Fr. 3.25*). Kun aldono Sm. 1.900 (*Fr. 4.75*)

Plena Klasika Kurso de Latina Lingvo

POR ESPERANTISTOJ

Unu ĉiumonata kajero.

Jarabono por abonintoj de L'ESPERANTO estas Sm. 0.600 (*Fr. 1.50*)

por neabonintoj 1 Sm. (*Fr. 2.50*)

Sin turni al eldonisto **A. PAOLET**, S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italujo)

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista. Londono

Fotografistoj, atentu !

Por germanaj revuoj ni havas bezonon pri

bildoj el la tuta mondo

(ekz. de gravaj okazintaĵoj, interesaj konstruaĵoj, rimarkindaj objektoj kaj belaĵoj de la naturo, k. t. p.)

La bildoj, **prefere fotografaĵoj** 9×12 aŭ 10×15 cm, devas havi **klarigan kuntekston** de proksimume 100 vortoj en Esperanto. Fotografaĵoj kun teksto estas sendeblaj kiel « presaĵo ».

Por ĉiu akceptita bildo ni pagas, laŭ uzebleco kaj intereseco, 1/2 **ĝis 2 Sm.** La netaŭgajn bildojn ni senprokraste resendas.

Internationale Korrespondenz Argus

F. Ellersiek, Wissmannstrasse 46, **Berlin.**

ĈEKBANKO ESPERANTISTA

Merton Abbey, LONDON S.-W.

Efektivigas TRA LA TUTA MONDO

elpagon de mono, enkasigon de ŝuldoj, monigon de kambioj kaj ĉekoj, ŝanĝon de fremdaj notoj, aĉeton kaj vendon de akcioj.

MALFERMAS

kontojn, kies saldoj estas fortireblaj ĉeke aŭ transpagile kaj senaverte. Nombro da kontuloj : 650.

INTERESO

por mono deponita 2 1/2 - 4 % laŭ aranĝo.

PETU LA REGULARON

ĈEKBANKO ESPERANTISTA

Merton Abbey, LONDON S.-W.

La banko estas komisiita vendi kelkajn garantiakciojn (preference shares) kun fiksita dividendo de 6 %, duonjare pagota, nominala valoro £ 10.0.0, en angla industria akcisocieto, kies ordinaraj akciuloj ricevis dum la lastaj 5 jaroj ne malpli ol 15 % da dividendo.

Prezo : £ 11.0.0, Fr. 280, Sm. 110

Tiel oni devas entuziasmigi la publikon por Esperanto!

La konata propagandisto M. PRESTELE sukcesis ellabori bonegan ideon de Esperanta propagando, por atentigi la grandan publikon kaj la gejunularon pri Esperanto. Neniu grupo manku ĝin provi. Nur unufoja aĉeto. Sensacia. Leĝe patentita! Reprezentantoj deziratai en ĉiuj landoj. Tuj petu prospekton kaj detalan klarigon de **Esperanto-Propaganda-Oficejo**, kontraŭ respkup. por eksterlando. Dir. : **M. PRESTELE**, Gross-Gerau, Germanujo, Hessen.

N. B. — La **E. P. O** sin ŝargas per propagandaj paroladoj pri Esp., kun kaj sen lumbildoj, plej kulante ankaŭ por grupetoj. Lumbildserio pri la Parkurbo Esperanto. Lumbild-pruntedonejo je plej favoraj kondiĉoj. Por filatelistoj : mi korespondas kun ĉiuj landoj per kartoj kun filatelia valoro kaj aliaj belaj ajoj ; ĉiu ricevos respondon. Deziras Esp. gazetojn kaj poŝtkartojn ilustritajn el ĉiuj landoj.

Esperantista Poŝkalendaro 1914

La praktika, de ĉiu Esperantisto ŝatata poŝlibro reaperis!

Tre interesa enhavo ; inter aliaj : artikolo pri kalendara reformo, listoj de esperantistaj grupoj kaj de la gazetaro, speciala rubriko por kolektantoj, k. t. p.

La libreto estas vera trezoro por ĉiu propagandisto kaj kolektanto.

Prezo : Sm. 0,400 (Mk. 0,80), sendkosto eksterlanden Sm. 0,100

Ader & Borel, G. m. b. H., Esperanto-Verlag

Dresden-A. 1, Struvestr. 40

UZATA EN ĈIUJ

TELEGR. ADR. KRAMPER



MONDPARTOJ.

GIDEON MOTOR

Benzino, petrolo, krudoleo au akvogaso

Diesel- kaj premegmotoroj. automobiloj.

Plej alta laudaprobo, motorprovado Kopenhago	1903
Honora premio & 1000 mk., dauradprovado Kiel	1905
Plej alta distingo, ekspo de terkulturmaŝinoj Kopo	1906
2 honoraj premioj & 2000 mk., dauradprovo Kiel	1907
Plej altan premion: solan arĝentmedalon ĉe bremsprovado de ekspo en Trondhejmo	1908
Rec. plej alta premio: **arĝentmedalo en Aarhus**	**1909**
do. Bruxelles	**1910**


Pruveble la plej ekonomia & fidinda motoro

Revendistojn ni akceptas, kie ni tiajn ne havas

RUD. KRAMPER & JØRGENSEN. HORSENS

ALBUMO DE JAPANAJ VIDAĴOJ KAJ MOROJ

KUN ESPERANTAJ KLARIGOJ



Ludado de **Koto**, muzikilo havanta 13 fadenoj, precipe ludata de altklasaj virinoj.

50 paĝoj de elektitaj fotografaĵoj presitaj sur propre japana papero de bona kvalito, formato cirkaŭ 25 cm × 18 cm, lukse bindinta laŭ japana stilo, kaj kun kovrilo desegnita ankaŭ japanmaniere.

Prezo ... { 1 vol., po **1.60** Sm., afrankite kaj registrite.
{ 5 vol., po **1.50** Sm., — —

Speciala rabato por pogranda mendo. Monsendo por poŝtmandato sola.

Eldonisto : Inĝ. K. TAKAHAŜI, Del. U. E. A.
Otemaĉi 8 Ĉome, HIROŜIMA (Japanujo).

Vortaro Greka-Esperanta kaj Esperanta-Greka

De Anakreono A. STAMATIADIS, *saniga kuracisto*

Tiu ĉi verko entenas 3 partojn : 1° Antaŭparolon kun la bildo de D^r L.-L. ZAMENHOF kaj Esperanta gramatiko ; 2° Grekan-Esperantan vortaron el 424 paĝoj enhavantaj 26,000 vortojn de Greka kaj Grekmoderna lingvoj da vortoj de Grekmoderna lingvo surhavas steleton kaj resendas al la plej korektaj vortoj de la Greklingvo), kaj 3° Esperantan-Grekan radikaron.

Unu volumo en 16 (13 × 20) ; prezo : Sm. **2.-** ; havebla ĉe **J. KOLLARO**, librovendisto, *str. de Stadio, n° 44*, **ATENO** (Grekujo).

SPERTOPLENAJ ESPERANTISTAJ PRESISTOJ

GARDEN CITY PRESS L^td

Presistoj de Libroj, Katalogoj kaj Ĝeneralaj Presaĵoj

LETCHWORTH (Anglujo)

Precipa kaj speciala atento al la bezonoj de niaj klientoj jam donis al ni eminentan pozicion en la presmondo.

Zorgu, ke vi turnu kun demando al la Ĝardenurba Presejo antaŭ ol mendi presadon.

GLASER & SOHN, DRESDEN-A.

Borngasse, 5. — Telefono 22337

FABRIKISTOJ DE LA OFICIALAJ ESPERANTO-INSIGNOJ

Fako I^a : Stampejo. — Fabrikado de artaj medaloj laŭ ĉiu grandeco. — Reduktado per francaj maŝinoj kaj maŝinoj de propra konstruo. — Stampopremo ĝis 1,000,000 kg. — *Fako II^a :* Sparkestetoj por la hejmo. — *Fako III^a :* Fabrikejo de studentaj armiloj kaj kolorartikoloj. — *Fako IV^a :* Societaj insignoj. — Ordenoj. — Honoraj insignoj. — Festinsignoj. — Emajlado. — Artemetiaj laboroj.

PRESEJO JOBARD, DIJON (FRANCUJO)

LEONARD ADAMCZEWSKI

GRAVAJ KLARIGOJ

1. — Laŭ decido de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la kotizo por la Deka Kongreso estas fiksita po Fr. 15.—.

Familianoj de Kongresano (edzino kaj infanoj) povas ricevi Kongresan Karton, rabate, po Fr. 10.— ; sed ili ne rajtas ricevi senpage la Kongresan Gazeton nek la dokumentojn de la Kongreso eldonotajn de la Centra Oficejo.

Post la 1 de Junio 1914, la kotizoj estos altigitaj po Fr. 10.— ĉiu. **Sekve post la 1 de Junio 1914 ĉiu Kongreskarto kostos Fr. 25.— kaj ĉiu suplementa Karto kostos Fr. 20.—.**

Al la Kongresanoj, kiuj ne povos veni al la Kongreso kaj kiuj tion petos, la Komitato de la Kongreso repagos la senditajn kotizojn, deprenante nur po Fr. 1.— el ĉiu kotizo por pagi la jam faritajn elspezojn, **kondiĉe, ke tiuj Kongresanoj resendu siajn provizorajn kartojn antaŭ la malfermo de la Kongreso.**

La Kongresanoj, kiuj ne povos veni al la Kongreso kaj ne postulos la repagon de sia kotizo ricevos kompreneble senpage la Kongresan Gazeton, la Kongreslibron, la insignon de la Kongreso, ĉiujn programojn kaj la oficialajn dokumentojn publikigitajn dum kaj post la Kongreso.

2. — La Kongresa Gazeto estos eldonita komence de Januaro 1914. Ĉiu Kongresano ĝin ricevos senpage, sed nur depost la tago de sia enskribiĝo.

3. — Tuj post la ricevo de la kotizo la Kongresa Komitato sendos provizoran karton al la nova Kongresano. Se tiu ĉi ne ricevos siatempe sian provizoran karton, li estas petata sciigi tion al la Komitato.

4. — En konvena tempo ĉiu Kongresano ricevos poste diversajn mendilojn por loĝado, kongresaj eldonaĵoj, k. t. p.

5. — Por eviti poŝtajn elspezojn, la Komitato respondos al ĉiuj neurĝaj demandoj de la Kongresanoj pere de la Kongresa Gazeto.

6. — La kvina Kongreso de U. E. A. okazos samtempe kun la Deka Kongreso. Dank' al speciala aranĝo, ĉiuj Kongresanoj rajtos senpage ĉeesti la kunvenojn de U. E. A. kaj ricevi la Kongresan Dokumentaron de U. E. A.

Ĉiuj pagoj al la Kongreso devos esti faritaj en FRANKOJ (franca mono).

Centra Presejo Esperantista V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

PARIS — 2-10 Aŭgusto 1914 — PARIS

3, place Jussieu, Paris

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

Mi subskribint(in)o deziras aliĝi al la ***DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO*** *kaj por tio mi pagas la sekvantajn kotizojn :*

1 Kongresa Karto . . . . . Fr. **15.—**

..... *Suplementa(j) Karto(j) po Fr.* **10** *. . . . . Fr.* .....

Mi sendas ĉi-kune per ..... *la sumon de Fr.* .....

al la **DEKA KONGRESO DE ESPERANTO**
3, place Jussieu, Paris

Familia nomo (1) *(S-ro, S-ino, F-ino)* .....

Persona antaŭ- aŭ bapt-nomo (2) .....

Profesio (2) .....

Nacieco (2) .....

Strato kaj numero (1) .....

Urbo (1) .....

Provinco (1) ..... *Lando* (2) .....

Kune venas familianoj, kies nomoj estas :

(S-ro, S-ino, F-ino) .....

(S-ro, S-ino, F-ino) .....

(S-ro, S-ino, F-ino) .....

Dato : *Subskribo :*

.....

(1) En nacia lingvo.
(2) En Esperanto.

Grave ! Vidu dorse.



Dum la Panama Pacifika internacia Ekspozicio en San Francisko okazos ankaŭ granda Esperantista Kongreso por ĉiuj Esperantistoj en Norda kaj Suda Ameriko, Azio, Oceanio kaj en ĉiuj landoj sur la Pacifika marbordo. Tiu ĉi Kongreso estos la unua facile vizitebla de ĉiuj samideanoj loĝantaj ekster Eŭropo. Tre favoraj specialaj vojaĝ-prezoj sur ŝipoj kaj fervojoj faros la urbon San Francisko en 1915 la plej oportuna kaj facile atingebla punkto de la mondo!

Uzu la okazon por malkare viziti la plej grandan ekspozicion el ĉiuj, la mirindan inĝenieran ĉefverkon kiun ĝi solenas, la belan landon Kalifornion, kaj samtempe, renkonti samideanojn el malproksimaj landoj ĉe la « **Tutpacifika Esperanta Kongreso** ». Okazos ankaŭ sennombraj fakaj kaj specialaj kunvenoj, naciaj kaj internaciaj. Esperante parolantaj oficistoj haj gvidistoj ĉie ĉeestos.

Skribu nun pri kiom da viaj grupanoj kaj amikoj intencas veni, por ke ni povu aranĝi la plej taŭgan akcepton. Por ĉiuj informoj rilate la Ekspozicion aŭ la Kongreson, skribu al

TUTPACIFIKA ESPERANTA KONGRESO

411, Exposition Bldg.

SAN FRANCISKO (Usono) KALIFORNIO

Milka

CHOCOLAT AU LAIT
PUR DES ALPES

*

ALPENMILCH-CHOCOLADE

*

PURE AND DELICIOUS
SWISS-MILK
CHOCOLATE

Suchard, SEUL FABRICANT